

EL LA "PENSOJ"



DE

BLAZIO PASKALO

*elektis kaj tradukis
et la franca originalo*
VALO

SAT-BROŜURSERVO

1986 * 15 FF

El la Pensoj de Paskalo

Ekstraktoj el la franca originalo
esperantigitaj de **Valo**

La partoj de la originalo ne konservitaj en la traduko estas
estas anstataŭataj per streketlinioj :
En la piednotaj tradukoj de la latinaj citaĵoj, post la nomo de
la aŭtoro, mi forstrekis la referencojn, kiuj ŝajnas al mi
neutilaj.

ENKONDUKO

Blazio Paskalo (1623-1662) famiĝis en sia juneco per rimarkindaj sciencaj laboroj, eltrovoj kaj inventoj. En la dua parto de sia vivo li same famiĝis per du literaturaj verkoj : la **Leteroj al Provincano**, polemiko kontraŭ la Jezuitoj, kaj la **Pensoj**, publikigitaj post lia morto.

Sub tiu ĉi titolo aperis kolekto de fragmentoj destinitaj al planita granda verko, nome **Apologio de la kristana religio**. Paskalo, mortinte 39-jara, ne povis efektiviĝi sian vastan projekton. Restas nur la notoj, parte skribitaj de lia mano, parte de li diktitaj, senorde laŭ la momenta inspiro, haste ĵetitaj sur la paperon. Kelkaj frazoj estas ne finitaj, elipsaj, kelkaj eĉ enigmaj por alia ol la aŭtoro mem.

La konstanta celo de tiuj skriboj estis montri, ofte per raciaj rezonadoj, la malforton kaj malfacilcon de la racio, kaj konkludi, ke la sola vojo al vero troviĝas en la instruoj de la (kristana) religio.

Strange, ke tia homo, tiel inteligenta kaj klera, unu el la grandaj geniuloj de sia epoko, dediĉis tiom da tempo kaj tiom da talento al tia afero ; ke li, tiel racie klarpensa, kiam li traktis sciencajn temojn, matematikajn aŭ fizikajn, fariĝis mistika kredanto pri "revelacio", "origina peko", "eŭkaristio", "unu Dio en tri personoj", "mirakloj", ktp, ks.

Estas ankaŭ multaj kritikaj partoj : ne nur atakoj kontraŭ la Jezuitoj, sed ankaŭ malfavoraj opinioj pri aŭtoroj. Pri Montenjo, kies **Eseojn** li legis kaj relegis, kies vastan kulturon kaj erudicion li admiris ; li riproĉis al li ĉefe du faktojn : ke li estis tro dubema, kaj ke li tro parolis pri si. Pri Kartezio, alia samtempa geniulo, matematikisto, fizikisto kaj filozofo kiel li ; inter tiuj du grandaj spiritoj estis reciproka admiro kaj profunda malakordo. Unu preskaŭ pure raciema kaj paciencie deduktema ; la alia, ankaŭ kapabla pri plej racia rezonado, sed donanta prioritaton al la instinkto, la sento, la intuicio, kiu ekkaptas la veron senpere, spontane, en fulma rapido.

La lingvaĵo de la **Pensoj**, kiel tiu de Kartezio, estas ofte peza : longaj frazoj kun multaj subpropozicioj, heredaĵo de la latino, kiu ĝis tiu epoko estis la lingvo de sciencoj kaj filozofio. Al la ankoraŭ balbutanta franca lingvo necesis jarcento, kun influo de la grandaj verkistoj kaj poetoj de la XVII-a jarcento, por senbalastiĝi, aerumiĝi kaj fariĝi fluida, konciza kaj eleganta sub la plumo de Voltero. Tamen, jam ĉe Paskalo, ĝi iafoje atingis tiujn kvalitojn. Kelkaj el liaj frazoj, forte stampitaj, estas ofte citataj kvazaŭ proverbe : "Kial vi mortigas min ? - Nu, ĉu vi ne loĝas trans la akvo?..."
 "Vero ĉiflanke de Pireneoj, eraro transe", "Reĝo sen malenuigo estas homo plena je mizero", "La nazo de Kleopatra..."
 "Sablero en la uretero de Kromvelo", "La koro havas motivojn, kiujn ne konas la racio" (Vortludo pri "**raison**", kiu signifas "racio" kaj ankaŭ "motivo"). Ankaŭ kelkaj, kiujn mi ne trovis en la libro, el kiu mi tradukis : "Koni estas serĉi", "Kompreni estas malmulte, ~~serĉi~~ estas multe", "La "mi" estas malaminda" (Temas pri verkistoj, kiel Montenjo, kiuj trouzas "mi" en literaturo).

Ne ĉio estas facile komprenebla. Kelkaj frazoj estas probable supozitaj el la buŝo de kontraŭdiranto, kiun li intencis refuti. Kelkaj ŝajnas pensitaj en korpa kaj mensa febro de malsanulo. Sendube li opiniis, ke kiam li volos, reprenante kaj ordigante tiujn disajn skizojn, li starigos el ili harmonian tuton. La limigita daŭro de lia vivo ne permesis plenumon de la planita tasko. Anstataŭ la bela monumento al la gloro de la kristanismo, restas nur tiu ĥaosa amaso de materialo, tralumigita de brilaj fajreroj. En tiu senforma aspekto la **Pensoj** tamen konsistigas unu el la majstroverkoj de la franca literaturo.

En mia traduko mi flankelasis la partojn kun teologia aŭ pure religia enhavo, ankaŭ kelkajn fake filozofiajn, elektante tiujn kun pli ĝenerala signifo.

Se oni ne akceptas la pozitivajn konkludojn de la aŭtoro, oni povas tamen konsenti pri multaj el liaj negativaj kritikoj : ekzemple kiam li mokis kelkajn trajtojn de la homa vanteco, kiam li montris la malsaĝon de la moroj kaj kutimoj, la maljuston de la leĝoj kaj de la socia strukturo, kiam li denunciis la kriman stultegon de la milito...

Mi konscias, ke mia traduko ne estas senriproĉa. Certe la kvalitoj de la Paskala stilo ne estas plene konservitaj, kaj la malklaraĵoj ne estas klarigitaj. Mi petas la legontojn pri indulgo. Ne pafu al la tradukinto : li faris, kion li povis.

UNUA PARTO

Pensoj pri la religio destinitaj al Apologio de la kristana religio

FRAKCIO I

Fragmentoj klasitaj de Paskalo

I. ORDO

.....

II. VANTECO

12. Du vizaĝoj similaj, el kiuj neniuj aparte ridigas, kune ridigas per sia simileco.
14. Perseo, reĝo de Makedonio, Paŭlo-Emilio.
Oni riproĉis al Perseo, ke li ne mortigas sin*.
15. Ke afero tiel videbla, kiel estas la vanteco de l' mondo estas tiel miskonata, ke estas strange kaj mirige diri, ke stulte estas serĉi la (materiajn) grandaĵojn : tio estas admirinda.
18. "Li havas kvar lakeojn".
Kiel ĝuste oni distingas la homojn laŭ la ekstero, prefere ol laŭ la internaj kvalitoj ! El ni ambaŭ, kiu antaŭenpasos ? Kiu cedos la lokon al la alia ? Ĉu la malpli lerta ? Sed mi estas tiel lerta kiel li. Necesos interbatali pri tio. Li havas kvar lakeojn, kaj mi havas nur unu. Tio estas simpla ; sufiĉas komputi ; mi devas cedi, kaj mi estas stultulo, se mi tion kontestas. Per tiu rimedo jen ni estas en paco : kio estas la plej granda bono.

* Perseo, venkita de Paŭlo-Emilio, sendis al li mesaĝon por peti, ke li ne prenu lin en sian triumfan procesion. Paŭlo-Emilio respondis : "Li faru tiun peton al si mem". (T.e. : se li ne volas iri en la triumfomarŝon, li mortigu sin.)

19. "Li loĝas trans la akvo" (Vd. 49)
20. Se oni estas tro juna, oni malbone juĝas. Tro maljuna, same.
 Se oni ne sufiĉe pripensas, se oni tro pripensas, oni obstinas kaj persvadiĝas.
 Se oni konsideras sian verkon tuj post kiam ĝi estas finita, oni estas ankoraŭ tute favorigita por ĝi - se tro longatempe poste, oni ne plu penetras en ĝin.
 Same la pentraĵoj vidataj de tro malproksime aŭ de tro proksime, kaj unu sola punkto nedividebla estas la vera loko.
 La aliaj estas tro proksimaj, tro malproksimaj, tro altaj, tro malaltaj. La perspektivo ĝin alsignas en la pentrarto. Sed en la vero kaj en la moralo, kiu ĝin alsignos ?
21. La potenco de la muŝoj : ili gajnas batalojn, malhelpas nian animon, manĝas nian korpon*.
22. La scienco de la eksteraj aferoj ne konsolas min pri la nescio de la moralo, sed la scienco de la moroj ĉiam konsolos min pri la nescio de la eksteraj sciencoj.

La homa kondiĉo

23. Malkonstanteco, enuo, maltrankvilo.
24. La kutimo vidi la reĝojn akompanataj de gardistoj, tamburoj, oficiroj, kaj ĉiuj aferoj, kiuj fleksas la maŝinon al respekto kaj teruro, kaŭzas, ke iliaj vizaĝoj, kiam iafoje ili estas solaj sen akompanoj, estigas en iliaj regatoj respekton kaj teruron, ĉar en la penso oni ne disigas iliajn personojn disde ilia sekvo, ordinaro kunigita ; kaj la homaro, kiu ne scias, ke tiu ĉi efiko estas konsekvenco de la kutimo, kredas, ke ĝi venas de natura forto ; kaj de tio jenaj vortoj : "la dieca karaktero estas stampita sur lia vizaĝo" ktp.
25. La potenco de la reĝoj estas bazita sur la prudento kaj sur la malsaĝo de la popolo, kaj multe pli sur la malsaĝo. La plej granda kaj grava afero en la mondo havas kiel fundamenton la malforton. Nenio estas pli certa ol tio ĉi : ke la popolo estas malforta. Kio estas

* aludo pri rakonto de Montenjo : iam abeloj atakis kaj forkurigis sieĝantojn.

bazita sur la sana racio, tio estas ja malfortike bazita :
kiel la estimo al saĝo.

26. La naturo de la homo ne konsistas el ĉiama irado ; ĝi
havas siajn irojn kaj siajn revenojn.
La febzo havas siajn frostotremojn kaj siajn ardojn ; kaj
la malvarmo montras la ardon de la febzo tiel bone kiel
la varmo mem.
La inventoj de la homoj de jarcento al jarcento iras
same ; same la boneco kaj la malico de la mondo.
"Plerumque gratae principibus vices"*
27. Ĉiuj okupiĝoj de la homoj estas por akiri bienon, kaj ili
ne povas havi pravigon por montri, ke ili ĝin posedas
pro justo, ĉar ili havas nur la fantazion de la homoj,
- nek forton por ĝin posedi sekure.
Same pri la scienco : ĉar malsano ĝin deprenas.
Ni estas kapablaj nek pri vero nek pri bono.
28. "Ferox gens, nullam esse vitam sine armis rati"*
Ili pli amas la morton ol la pacon. Aliaj pli amas la
morton ol la militon. Ĉia opinio povas esti preferinda
al la vivo, kiu tamen ŝajnas tiel forte kaj nature am-
inda.
29. La aferoj plej malraciaj en la mondo fariĝas plej raciaj
pro la elreguliĝo de la homoj. Kio estas malpli racia ol
elekti, por regi, la unuenaskitan filon de reĝino ? Por
regi ŝipon oni ne elektas tiun el la pasaĝeroj, kiu apar-
tenas al la plej bona domo (familio). Tiu leĝo estus
ridinda kaj maljusta. Sed, ĉar tia ĝi estas kaj ĉiam
estos, ĝi fariĝas racia kaj justa ; ĉar kiun oni elektus ?
Ĉu la plej virtan kaj lertan ? Jen ni tuj interbatalantaj.
Ĉiu pretendas esti tiu plej virta kaj lerta. Ni do ligu
tiun kvaliton al io nekontestebla. Li estas la plejaĝa
filo de la reĝo. Tio estas neta, kaj ne okazas disputo.
La racio ne povas pli bone fari, ĉar civila milito estas
la plej granda malbono.

* Plejofte la ŝanĝoj plaĉas al la princoj (Horacio, citita de Monteno, kiu
ŝanĝis "divitibus" al riĉuloj, per "principibus").

** Feroce gento, kiu ne komprenas la vivon sen portado de armiloj.
Tito-Livio, citita de Monteno.

30. La urboj, kiujn oni trapasas, oni ne deziras esti en ili estimata. Sed kiam oni estas en ili ioman tempon loĝonta, oni zorgas pri tio. Kiom da tempo ? Tempo proporcia al nia vanta kaj malfortika daŭro.
32. Kio plej mirigas min, tio estas vidi, ke ĉiuj ne miras pro sia malforto. Oni aĝas serioze, kaj ĉiu sekvas sian staton, ĉar tio estas laŭmoda, kvazaŭ ĉiu sciis certe, kie estas racio kaj justo. Oni estas spitita en ĉiu horo, sed per plaĉa humileco, oni kredas, ke pro sia kulpo, kaj ne pro tiu de la arto, kiun oni ĉiam sin flatas posedi. Sed estas bone, ke en la mondo estas tiom da tiaj homoj, kiuj ne estas pironanoj, por la gloro de l' pironismo, por montri, ke la homo estas tre kapabla pri plej fantaziegaj opinioj, ĉar li estas kapabla kredi, ke li ne estas en tiu natura kaj neevitebla stato de malforto, kaj male, ke li estas en natura saĝo.
Nenio pli fortigas la pironismon, ol tio, ke iuj ne estas pironanoj : se ĉiuj estus tiaj, ili estus malpravaj*.
33. Tiu sekto fortiĝas per siaj malamikoj pli ol per siaj amikoj ; ĉar la malforto de la homo sin montras pli en tiuj, kiuj ne konas ĝin, ol en tiuj, kiuj ĝin konas.

Ŝu-kalkanumo

34. "Ho! kiel bone fabrikita estas tio ! Kia lerta metiisto estas jena ! Kiel sentima estas tiu soldato !". Jen estas la fonto de niaj inklinoj kaj de la elekto de situacioj. "Kiel bone trinkas tiu ! Kiel malmulte trinkas tiu ĉi !" Jen kio faras la homojn sobraj, drinkemaj, bravaj, timemaj...
35. Kiu ne vidas la vantecon de la mondo, tiu estas mem tre vanta. Tiel, kiu ne vidas ĝin, escepte de junuloj, kiuj estas ĉiuj en la bruo kaj la amuziĝo, kaj en la penso pri estonteco, sed deprenu ilian distraĵon : vi vidos ilin sekigi pro enuo. Tiam ili sentos sian neniecon, sen koni ĝin : ĉar estas ja tre malfeliĉe esti en neelportebla malĝajeco, tuj kiam oni estas limigita en memobservado, kaj ne estas disde ĝi distrata.

Metioj

36. La dolĉo de la gloro estas tiel granda, ke al kiu ajn

* Ĉar estus certe, ke ĉio estas malcerta.

- objekto oni ĝin ligas - eĉ al la morto - oni amas ĝin.
37. Tro kaj tro malmulte da vino. Donu al li neniom da ĝi, li ne povas trovi la veron. Donu al li tro da ĝi : same.
38. La homoj okupiĝas pri sekvado de pilko kaj de leporo. Tio estas la plezuro mem de la reĝoj.
39. Kia vantaĵo, la pentrarto, kiu kreas admiron pri la simileco de aferoj, kies originalojn oni ne admiras !
40. Kiam oni legis tro rapide aŭ tro malrapide, oni neniom komprenas.
41. Kiom da regnoj ne konas nin !
42. Malmulto nin konsolas, ĉar malmulto nin afliktas.
43. En la homo estas tiu superreganta parto, tiu majstro de eraro kaj falseco, kaj tiom pli hipokrita, ke ĝi ne ĉiam estas tia ; ĉar ĝi estus nepra regulo pri vero, se ĝi estus nepra regulo pri mensogo. Sed, estante plejofte falsa, ĝi neniam donas signon de sia eco, signante per la sama karaktero la veron kaj la falson. Mi ne parolas pri frenezuloj, mi parolas pri la plej saĝaj, kaj ĝuste inter tiuj ĉi la imago havas plejan rajton por persvadi la homojn. Vane krias la racio, ĝi ne povas pagi la aferojn laŭ ilia ĝusta prezo.
- Tiu superba potenco malamika de la racio, kaj kiu plezure ĝin kontrolas kaj superas, por montri, kiom ĝi povas en ĉiuj aferoj, establis en la homo duan naturon. Ĝi havas siajn feliĉulojn, siajn malfeliĉulojn, siajn sanulojn, siajn malsanulojn, siajn riĉulojn, siajn malriĉulojn; ĝi igas kredi, dubi, nei la racion ; ĝi haltigas la sensojn, ĝi igas ilin senti ; ĝi havas siajn malsaĝajn kaj siajn saĝajn kaj nenio pli spitas nin, ol vidi, ke ĝi plenigas siajn posedantojn per kontenteco multe pli plene ol la racio. La lertuloj laŭ imago plaĉas al si mem tute alie, ol la prudentuloj povas racie plaĉi al si. Ili rigardas la homojn kun sento de supereco ; ili disputas kun maltimeco kaj memfido, la aliaj kun timo kaj malfido ; kaj tiu vizaĝa gajeco ofte donas al ili avantaĝojn en la opinio de la auskultantoj. Tiom la imagaj saĝuloj estas favorataj de samnaturaj juĝantoj!
- Ĝi ne povas saĝigi la malsaĝajn, sed ĝi feliĉigas ilin ; spite al la racio, kiu povas igi siajn amikojn nur mizeraj, ĉar unu kovras ilin per gloro, la alia per honto.

Kiu disdonas famon ? Kiu donas respekton al la personoj, al la verkoj, al la leĝoj, al la granduloj, krom tiu imaga kapablo ? Ĉiuj riĉoj de la tero estas nesufiĉaj sen ĝia konsento.

Ĉu vi ne dirus, ke tiu juĝisto, kies maljuneco trudas respekton al tuta popolo, sin regas per pura kaj sublima racio, kaj juĝas pri la aferoj laŭ ilia naturo, ne atentante tiujn vantajn cirkonstancojn, kiuj vundas nur la imagon de la malfortuloj ? Vidu lin iri al prediko, kien li alportas tute devotan fervoron, fortikigante la firmecon de sia racio per la ardo de sia karitato. Jen li preta aŭdi kun edifa respekto. Aperu la predikanto ; se la naturo donis al li raŭkan voĉon kaj strangan vizaĝaspekton, se lia barbiro malbone razis lin, se plie la hazardo lin makulis, kiel ajn grandajn verojn li anoncas, mi vetas pri perdo de la graveco de nia senatano.

La plej granda filozofo en la mondo, sur lignoplato pli larĝa ol necese, se sube estas abismo, kvankam la racio konvinkas lin pri la sekureco, lia imago superos. Pluraj ne povus elteni la penson pri tio sen paliĝi kaj ŝviti. Mi ne volas raporti pri ĉiuj ĝiaj efikoj. Kiu ne scias, ke la vido de katoj, de ratoj, la bruo de premegata karbopeco, ktp, forportas la racion ? La tono de voĉo influas la plej saĝajn, kaj ŝanĝas paroladon en poemon de forto. Amo kaj malamo ŝanĝas la vizaĝon de la justo. Kaj kiel advokato bone antaŭpagita trovas pli justa la aferon, kiun li pledas ! Kiel lia sentima gesto ĝin ŝajnigos pli bona al la juĝistoj, trompitaĵ per tiu ŝajno ! Plaĉa racio, kiun vento movas al ĉiuj direktoj ! Mi raportus preskaŭ ĉiujn agojn de la homoj, kiuj moviĝas nur per ĝiaj skuoj. Ĉar la racio estas trudata cedi, kaj la plej saĝaj prenas por ĝiaj principoj tiujn, kiujn la imago de la homoj tro memfide enigis en ĉiun lokon. Niaj majstroj bone konas tiun misteron. Iliaj ruĝaj roboj, iliaj peltoj, per kiuj ili sin vindas, la palaco, en kiu ili juĝas, la lilifloroj, tiu tuta aŭgusta aparato estas tre necesa. Kaj se la kuracistoj ne havus sutanojn kaj mulojn*, kaj se la doktoroj ne havus kvadratajn ĉapojn kaj robojn tro ampleksajn je kvar kvinonoj, neniam ili trompus la mondon, kiu ne povas rezisti al tiel aŭtenta montro. Se ili posedus la veron kaj la juston, kaj se la kuracistoj posedus la veran

* La kuracistoj kutime rajdis sur muloj.

arton resanigi, ili neniel bezonus kvadratajn ĉapojn ; la majesto de tiuj sciencoj estus per si mem respektinda*. Sed, ĉar ili havas nur imagan sciencon, necesas, ke ili prenu sur sin tiujn vantajn instrumentojn, kiuj frapas la imagon, al kiu ili rilatas, kaj ja per tio ili altiras al si la respekton. Nur la militistoj ne tiel alivestas sin, ĉar ilia forto estas pli esenca : ili sin starigas per forto, aliaj per grimaco**.

Tiel niaj reĝoj ne serĉis tiajn kostumojn, ne maskis sin per eksterordinaraj vestoj por tiel aspekti, sed ili sin akompanigas de gardistoj, de halebardoj. Tiuj armitaj trupoj, kiuj havas manojn kaj forton nur por ili, la trumpetoj kaj tamburoj, kiuj antaŭe marŝas, kaj tiuj legioj, kiuj ilin ĉirkaŭas, tremigas la plej firmajn. Ili ne havas la kostumon, sed ili havas la forton. Necesus ja havi racion tre purigitan por rigardi kiel alian homon la Grandan Sinjoron ĉirkaŭatan en la superba serajlo de kvardek mil janiĉaroj.

Ni ne povas nur vidi advokaton en robo kaj kun ĉapo sur la kapo, sen avantaĝa opinio pri lia kapablo.

La imago ĉion disponas ; ĝi faras la belon, la juston kaj la feliĉon, kiu estas la tuto de la mondo. Mi volonte vidus la italan libron, de kiu nur la titolon mi konas, kiu per si sola valoras multajn librojn : "Dell' opinione regina del mondo". Sen koni ĝin mi konsentas pri ĝi, krom la malbono, se estas en ĝi.

Jen estas proksimume la efikoj de tiu trompa kapablo, kiu ŝajnas esti donita al ni intence, por instigi nin al necesa eraro. Pri ĝi mi havas ja multe da aliaj principoj.

Ne nur la malnovaj impresoj estas kapablaj trompi nin. La ĉarmo de la noveco havas saman povon. De tio venas la tuta disputado de la homoj, kiuj riproĉas unuj al aliaj, ke ili sekvas siajn falsajn impresojn de la infaneco, aŭ ke ili pro memfido kuras al la novaj. Kiu tenas la ĝustan mezon, tiu sin montru, kaj ĝin pruvu ! Ne estas principo, kiel ajn natura eĉ de la infaneco, kiun oni ne prezentas kiel falsan impreson, ĉu de la instruiteco, ĉu de la sensoj. "Ĉar - oni diras - vi kredis de post la infaneco, ke kofro estas vakua, kiam vi vidas nenion en ĝi, vi kredas la vakuon ebla. Tio

* Nun, kiam la medicino fariĝis pli scienca, la kuracistoj ne plu bezonas tiajn eksterajojn. En multaj landoj la juĝistoj ankoraŭ uzas ilin. Kaj kion diri pri la papo kaj aliaj altrangaj klerikoj ? N. de la tr.

** eble en la tempo de Paskalo, sed nun la militistaj uniformoj...

estas iluzio de viaj sensoj, fortigita de la kulturo, kiun korekti devas la scienco". Kaj aliaj diras : "Ĉar oni diris al vi en la lernejo, ke ne ekzistas vakuo, oni putrigis vian prudenton, kiu komprenis ĝin tiel nete antaŭ tiu malĝusta impresio, kiun necesas korekti helpe de nia unua naturo." Kiu do trompis ? Ĉu la sensoj, ĉu la instruado ?

Ni havas alian principon de eraro : nome la malsanoj. Ili difektas nian juĝkapablon kaj nian prudenton. Kaj se la grandaj ĝin forte aliigas, mi ne dubas, ke la malgrandaj laŭproporcie influas.

Nia propra intereso estas ankoraŭ unu mirinda instrumento por agrable krevigi al ni la okulojn. Al la plej justa homo en la mondo ne estas permesate juĝi pri sia afero. Mi konas iujn, kiuj, por ne fali en tiun memfidon, estas la plej maljustaj en la mondo en kontraŭa direkto. La certa rimedo por perdi tute justan aferon, estas ĝin rekomendigi al ili de iliaj proksimaj parencoj. Justo kaj vero estas du pintoj tiel subtilaj, ke niaj instrumentoj estas tro malakutaj por ilin tuŝi. Se tiuj ĉi atingas ilin, ili malakrigas ilian pinton, kaj apogas ĉirkaŭe, pli sur la falson ol sur la veron.

La homo estas nur subjekto plena de natura eraro, neforigebla sen la graco*. Neniu montras al li la veron, ĉio trompas lin ; tiuj du principoj de vero, racio kaj sensoj, krom tio, ke al ĉiu el ili mankas sincereco, ili trompas unu la alian ; la sensoj trompas la racion per falsaj ŝajnoj, kaj tiun saman trompon, kiun ili faras al la animo, ili siavice ricevas de ĝi : ĝi sin revenĝas ; la pasioj de la animo konfuzas ilin, kaj faras al ili falsajn impresojn. Ili vete mensogas, kaj reciproke sin trompas.

44. La kaŭzo kaj la efikoj de amo : Kleopatra**.

45. Ni neniam tenas nin en la nuntempo. Ni anticipas la estonton kiel tro malrapide venantan, kaj ni revokas la pasinton por ĝin haltigi kiel tro rapideman, tiel malprudentaj, ke ni vagadas en tiuj tempoj, kiuj ne estas niaj, kaj ne pensas pri la sola, kiu apartenas al ni, kaj tiel vantaj, ke ni pensas pri tiuj, kiuj estas nenio, kaj senpripense eskapas el la sola, kiu restas. Tial, ke

* Tie aperas en plena lumo la konstanta intenco de la aŭtoro. N. de la tr.

** Tiu noto estas elvolvita poste (n-roj 195 kaj 413)

ordinare la nuntempo nin vundas. Ni kaŝas ĝin al nia vido, ĉar ĝi nin afliktas, kaj se ĝi estas al ni agrabla, ni bedaŭras vidi ĝin eskapi ; ni penas subteni ĝin per la estonto, kaj planas disponi pri aferoj, kiuj ne estas en nia povo, por tempo, en kiun alveni ni havas nenian certecon.

Ĉiu ekzameni siajn pensojn : li trovos ilin tute okupataj pri la pasinto aŭ la estonto ; ni preskaŭ ne pensas pri la nuno ; kaj se ni pensas pri ĝi, tio estas por preni el ĝi lumon por disponi pri la estonto. Neniam la nuno estas nia celo ; pasinto kaj nuno estas niaj rimedoj ; la estonto sola estas nia celo. Tiel ni neniam vivas ; ĉiam preparante nin por esti feliĉaj, neeviteble ni neniam estos tiaj.

46. La spirito de tiu suverena juĝisto de l'mondo ne estas tiel sendependa, ke ĝi ne estus konfuzebla per la unua bruo farata ĉirkaŭ li. Por malhelpi liajn pensojn ne necesas la bruego de kanono : sufiĉas la bruo de ventoflago aŭ de pulio. Ne miru, se nun li ne bone rezonas : muŝo zumas ĉe liaj oreloj ; sufiĉe por igi lin nekapabla pri bona konsilo. Se vi volas, ke li povu trovi la veron, forpelu tiun animalon, kiu tenas lian prudenton en senpoveco, kaj konfuzas tiun potencan inteligenton.
47. Cezaro estis tro maljuna, al mi ŝajnas, por iri konkeri la mondon. Tiu amuzo estis bona por Aŭgusto aŭ Aleksandro. Ili estis junuloj, malfacile haltigeblaj. Sed Cezaro devis esti pli matura.
48. La Svisoj estas ofendataj, se oni nomas ilin nobeloj, kaj ili pruvas sian rasan (familian) nenobelecon, por esti juĝataj indaj je grandaj oficoj.
49. "Kial vi min mortigas per via avantaĝo ? Mi ne havas armilojn.
- Nu, ĉu vi ne loĝas trans la akvo ? Amiko, se vi loĝas sur tiu ĉi bordo, mi estus murdisto, kaj estus maljuste tiel mortigi vin. Sed, ĉar vi loĝas transe, mi estas bravulo, kaj tio estas justa."
50. Ili* estas truditaj diri : "Vi ne agas en bona fido ; ni ne dormas, ktp." Kiel plaĉas al mi vidi tiun superban racion

* Ili : la dogmistaj filozofoj en diskutado kontraŭ la pironanoj.

humiligita kaj peteganta ! Ĉar ne tia estas la parolo de homo, kies rajton oni disputas, kaj kiu ĝin defendas kun armiloj kaj forto en la mano. Li ne amuziĝas, dirante, ke oni ne agas per bona fido, sed li punas tiun malbonan fidon per forto.

III. MIZERO

52. La aferoj havas diversajn ecojn, kaj la animo diversajn inklinojn ; ĉar nenio estas simpla, el kio sin prezentas al la animo, kaj la animo neniam sin prezentas simpla al iu ajn objekto. De tio venas, ke oni ploras aŭ ridas pri la sama afero.

Malkonstanteco

53. Oni kredas tuŝi ordinarajn orgenojn tuŝante la homon. Estas ja orgenoj, sed strangaj, ŝanĝiĝemaj, variemaj. Kiuj scias tuŝi la ordinarajn, tiuj ne farus agordojn sur tiuj ĉi, ĉar necesas scii, kie estas la klavoj.
54. Ni estas tiel malfeliĉaj, ke ni povas trovi plezuron en iu afero nur sub kondiĉo spitiĝi, se ĝi malprosperas - kion mil aferoj povas fari kaj faras en ĉiu horo. Kiu estus trovinta la sekreton ĝoji pro bono sen spitiĝi pro la kontraŭa malbono, tiu estus trovinta la punkton. Tio estas la senfina movado.
55. Ne estas bone esti tro libera. Ne estas bone havi ĉiujn necesojn.

Tiraneco

56. La tiraneco konsistas el deziro pri supereco universala kaj ekstera al sia ordo. Diversaj ĉambroj : de fortaj, de belaj, de bonaj spiritoj, de piaj, el kiuj ĉiu regas hejme, ne aliloke. Kaj iafaje ili interrenkontas, kaj la forta kaj la bela stulte interbatalas por decidi, kiu estu la mastro de la alia, ĉar ilia mastreco estas diversspeca. Ili ne interkonsentas, kaj ilia kulpo estas, ke ili volas ĉie regi. Tion povas nenio, eĉ ne la forto ; ĝi nenion faras en la regno de la scienculoj, ĝi mastras nur pri la eksteraj agoj.
57. La tiraneco estas voli havi per unu vojo tion, kion oni povas havi nur per alia. Oni donas diversajn devojn al diversaj meritoj : devon de amo al agrablo, devon de timo al forto, devon de fido al scienco. Oni ŝuldas

tiujn devojn, maljuste estas ilin rifuzi, kaj maljuste postuli aliajn.

Jenaj paroloj estas falsaj : "Mi estas bela, do vi devas timi min. Mi estas forta, do vi devas ami min. Mi estas..."

58. Kiam temas juĝi, ĉu oni devas militi kaj mortigi tiom da homoj - kondamni tiom da Hispanoj al morto - prijuĝas unu sola homo, kaj plie, interesata. Devus esti iu indiferenta eksterulo.

59. Sur kio li fundamentos la ekonomion de l'mondo, kiun li volas regi ? Ĉu sur la kaprico de ĉiu unuopulo ? Kia konfuzego ! Ĉu sur la justo ? Li ne konas ĝin. Se li konus ĝin, li ne estus establinta jenan maksimumon, plej ĝeneralan inter la homoj : Ĉiu sekvu la morojn de sia lando. La brilo de la vera justo estus subiginta ĉiujn popolojn, kaj anstataŭ tiu konstanta justo, la leĝofarantoj ne estus prenintaj kiel modelojn la fantaziojn kaj kapricojn de Persoj kaj Germanoj. Oni vidus ĝin plantita en ĉiuj ŝtatoj de la mondo kaj en ĉiuj tempoj ; dume oni vidus nenion justan aŭ maljustan, kiu ŝanĝiĝas je kvalito ŝanĝiĝante je klimato. Trigrada pliproksimo al poluso renversas la tutan juron, meridiano decidas pri la vero. En malmultaj jaroj de posedo, la fundamentaj leĝoj aliĝas, la rajto havas siajn epokojn. La eniro de Saturno en la Leon-konstelacio markas al ni la originon de iu krimo. Plaĉa justo, kiun rivero limigas ! Vero ĉi-flanke de Pireneoj, eraro transe !

Ili konfesas, ke la justo ne estas en tiuj kutimoj, sed ke ĝi kuŝas en la naturaj leĝoj komunaj al ĉiuj landoj. Certe ili tion obstine subtenus, se la temerareco de l'hazardo, kiu dissemis la homajn leĝojn, estus renkontinta almenaŭ unu inter ili, kiu estus universala. Sed la ŝerco estas tia, ke la kaprico de la homoj estas tiel diversiginta, ke ne ekzistas eĉ unu.

Ŝtelo, incesto, murdo de infanoj kaj de patroj, ĉio havis lokon inter la virtaj agoj. Ĉu povas ekzisti io pli plaĉa ol tio, ke homo rajtas mortigi min, tial ke li loĝas trans la akvo, kaj ke lia princo havas kverelon kontraŭ la mia, kvankam mi havas neniun kun li ?

Sendube ekzistas naturaj leĝoj, sed tiu bela putrinta racio ĉion putrigis ; "Nihil amplius nostrum est ; quod nostrum dicimus, artis est*"

* El pli longa frazo de Cicero, Montenjo kaj Paskalo tiel interpretas : "Nenio plu estas nia ; kion ni nomas nia, tio estas konvencia." 15

"Ex senatus consultis et plebiscitis crimina exercentur* "
"Ut olim vitiis, sic nunc legibus laboramus**"

De tiu konfuzo sekvas, ke unu diras, ke la esenco de justo estas la aŭtoritato de la leĝofaranto ; alia, la oportuno de la suvereno ; alia, la nuna kutimo, kaj ĝi estas la plej certa. Laŭ la sola racio, nenio estas justa per si mem ; ĉio moviĝas kun la tempo, la kutimo estas la tuta justo, pro tiu nura motivo, ke ĝi estas akceptata. Tio estas la mistika fundamento de ĝia aŭtoritato. Kiu ĝin rekondukas al ĝia principo, tiu ĝin neniigas. Nenio estas pli kulpa ol tiuj leĝoj, kiuj rerektingas kulpojn. Kiu obeas ilin, tial ke ili estas justaj, tiu obeas al la justo de li imagata, sed ne al la esenco de la leĝo. Ĝi estas tute kunpremita en si ; ĝi estas leĝo, kaj nenio pli. Kiu volas ekzameni ĝian motivon, tiu trovos ĝin tiel malforta kaj malpeza, ke se li ne kutimiĝis kontempli la mirindaĵojn de la homa *imago*, li admiros, ke unu jarcento sufiĉis por akirigi al ĝi tiom da pompo kaj respekto.

La ardo frondi, skuegi la ŝtatojn, estas ŝanceli la establitajn kutimojn ĝis en iliaj fontoj, por marki ilian mankon je aŭtoritato kaj justo. "Necesas, diras oni, elvoki la fundamentajn kaj primitivajn leĝojn de la ŝtato, kiujn abolis maljusta kutimo." Tio estas ludo certa por ĉion perdi ; laŭ tiu pesilo nenio estos justa. Tamen la popoloj facile akceptas tiajn parolojn. Ili skuas la jugon, tuj kiam ili ĝin ekkonas kaj de tio la granduloj profitas por ĝia ruino kaj la ruino de tiuj ekzamenistoj de akceptitaj kutimoj. Tial la plej saĝa el la leĝofarantoj*** diris, ke por la bono de la homoj ofte necesas ilin trompi. Kaj alia, bona politikisto : "Cum veritatem qua liberetur ignoret, expedit quod fallatur****". Necesas, ke ĝi ne sentu tiun veron, ke la leĝo estas uzurpaĵo ; ĝi estis iam senmotive enkondukita ; ĝi fariĝis prudenta ; necesas rigardigi ĝin kiel aŭtentan, eternan, kaj kaŝi

* "Pro senatsekretoj kaj plebiscitoj oni kulpas krimojn". (Seneko, citita de Monteno, III, 1)

** "Iam ni suferis pro niaj malvirtoj ; nun ni suferas pro niaj leĝoj" (Tacito)

*** Platono, en la *Respubliko*.

**** "Ĉar ti ne scias la veron, kiu lin liberigus, utilas al li esti trompata"
(Cito laŭ Sŝa Aŭgusteno, modifita de Paskalo)

ĝian komencon, se oni ne volas, ke ĝi baldaŭ finiĝu.

60. Se ekzistas iu afero, en kio ĝia propra intereso devis aplikigi la racion plej serioze, tio estas la serĉado pri ĝia suverena bono. Ni do vidu, en kio tiuj fortaj kaj klarvidaj animoj ĝin lokis, kaj ĉu ili estas interakordaj. Unu diras, ke la suverena bono kuŝas en la virto ; alia ĝin metas en volupton ; alia en "sekvadon de la naturo"; alia en la veron "Felix qui potuit rerum cognoscere causas"* ; alia en totalan nescion ; alia en neagemon ; alia, rezisti al la ŝajnoj ; alia, nenion admiri : "Nihil mirari prope res una quae possit facere et servare beatum"** ; kaj la bravaj pironanoj, en sia ataraksio, ĉiama dubo kaj atendado ; kaj aliaj, pli saĝaj, diras, ke ne eblas trovi ĝin, eĉ ne per deziro. Jen estas ni bone pagitaj !

Nu, endas vidi, ĉu tiu bela filozofio akiris ion certan per tiel longa kaj streĉa laboro. Ĉu eble almenaŭ la animo sin mem konos ? Ni aŭskultu pri tiu temo la profesorojn de l'mondo. Kion ili opiniis pri ĝia substanco ? Ĉu ili pli sukcesis loki ĝin ? Kion ili eltrovis pri ĝia origino, ĝia daŭro kaj ĝia foriro ?

Ĉu do la animo estas ankoraŭ tro nobla objekto por siaj malfortaj lumoj ? Ni do malaltigu ĝin al la materio. Ni vidu, ĉu ĝi scias, el kio estas farita la propra korpo, kiun ĝi animas, kaj la aliaj, kiujn ĝi kontemplas kaj movas laŭ sia plaĉo.

Kion ili konis pri ĝi, tiuj grandaj dogmismoj, kiuj nenion nescias ?

"Harum sententiarum..."***

Sendube tio sufiĉus, se la racio estus prudenta. Tia ĝi estas sufiĉe por konfesi, ke ĝi trovis ankoraŭ nenion firman, sed ĝi ankoraŭ ne malesperas tien atingi, male ĝi estas tiel arda kiel iam ajn en tiu strebado, kaj certigas, ke ĝi havas en si la fortojn necesajn por tiu konkero.

* Feliĉa, kiu povis koni la kaŭzojn de la aferoj (Vergilio, citita de Monteno).

** Miri pri nenio, estas la sola afero, kiu povas igi kaj konservi nin feliĉaj (Horacio).

*** "Harum sententiarum, quae vera sit, deus aliquis viderit": El tiuj opinioj, kiu estas vera ? iu dio ĝin vidas. (Cicero).

Endas do ĝin finfaligi, kaj, post kiam ni ekzamenis ĝiajn potencojn en iliaj efikoj, ni ekkonu ilin en ili mem ; ni vidu, ĉu ĝi havas kelkajn fortojn kaj kelkajn prenojn kapablajn kapti la veron.

61. Kiel la modo faras la agrablon, same ĝi faras la juston.

62. (Tri kapoj)

Kiu estus havinta la amikecon de la reĝo de Anglio, de la reĝo de Polio aŭ de la reĝino de Svedio, ĉu tiu estus kredinta, ke al li mankos rifuĝejo en la mondo?*

La gloro

63. Admirado putrigas ĉion ekde la infaneco. "Ho! kiel bone dirite! Ho! kiel bone farite! Ho! kiel saĝa li estas! ktp".

La infanoj de Port-Royal, al kiuj oni ne donas tiun instigilon el glordeziro, falas en neagemon.

Mia, cia

64. "Tiu hundo estas mia" diris tiuj povraj infanoj. "Tie estas mia loko en la sunlumo". Jen estas la komenco kaj la bildo de ĉiu uzurpado sur la tuta tero.

65. ...La homo, se oni lin atomigas, kio li estas ? Ĉu la kapo ? la koro ? la stomako ? la vejnoj ? Ĉiu peco de vejno ? la sango ? ĉiu humoro en la sango ?

Urbo, kamparo, vidate de malproksime, estas urbo aŭ kamparo ; sed, laŭgrade kiam oni proksimiĝas, estas domoj, arboj, tegoloj, folioj, herboj, formikoj, kruroj de formikoj, senfine. Ĉio ĉi involviĝas en la nomo kamparo.

Maljusto

66. Dangere estas diri al la popolo, ke la leĝoj ne estas justaj ; ĉar ĝi obeas ilin nur tial, ke ĝi kredas ilin justaj. Tial necesas diri samtempe, ke endas obei ilin, tial ke ili estas leĝoj, samkiel endas obei la superulojn, ne tial ke ili estas justaj, sed tial ke ili estas superuloj. Per tio, jen estas malhelpata ĉia ribelo, se oni povas komprenigi tion, kaj ke tio mem estas la difino pri justo.

* Karlo, reĝo de Anglio, senkapigita (1649). Johano-Kazimiro, reĝo de Polio, eltronigita (1656). Kristina, reĝino de Svedio, abdikinta (1654). La fragmento datiĝas de 1656.

67. La juro estas donita ne por la juristo, sed por la jur-regato. Dangere estas tion diri al la popolo. Sed la popolo havas tro da kredo al vi. Tio ne malutilos al ĝi, kaj povas servi al vi ; endas do ĝin publikigi. "Pasce oves meus" non "tuus"*. Vi ŝuldas al mi paŝtigadon.
68. Kiam mi konsideras la malgrandan daŭron de mia vivo, sorbita en la antaŭa kaj posta eterneco, "memoria hospitis unius diei praeteruntis"**, la etan spacon, kiun mi plenigas kaj eĉ vidas, enprofundigita en la senfina vastego de la spacoj, kiujn mi ne konas, kaj kiuj ne konas min, mi estas terurata, kaj miras vidi min ĉi tie prefere ol tie, kial nun prefere ol iam. Kiu metis min tien ĉi ? Pro kies ordono kaj konduko tiu loko kaj tiu tempo estis al mi donitaj ?
69. Ijobo kaj Salomono (Vd. 75)
70. Se nia kondiĉo estus vere feliĉa, ni ne devus distri nin de la penso pri ĝi.
71. Orgojlo, kontraŭpezanta ĉiajn mizerojn. Aŭ li (la homo) kaŝas siajn mizerojn, aŭ, se li ilin malkovras, li sin gloras, ke li konas ilin.
72. Necesas koni sin mem ; se tio ne utilis por trovi la veron, tio almenaŭ utilas por reguli sian vivon ; kaj nenio estas pli justa.
73. La sento pri la vanteco de la ĉeestaj plezuroj, kaj la nescio pri la vanteco de forestaj plezuroj, kaŭzas la nekonstantecon.
75. Salomono kaj Ijobo plejbone konis kaj plejbone preparolis la mizeron de l' homo : unu plej feliĉa, la alia plej malfeliĉa ; unu konanta la vantecon de la plezuroj per sperto, la alia la verecon de la malbonoj.
76. La Predikanto*** montras, ke la homo sen Dio estas en nescio pri ĉio kaj en neevitebla malfeliĉo ; ĉar voli kaj ne povi estas malfeliĉe. Nu, li volas esti feliĉa, kaj

* Paŝtu miajn ŝafojn, ne ciajn (Evangelio laŭ Johano, vortoj de Jesuo al Petro). Paskalo aldonas : ne ciajn, direkte al la Jezuitoj, kiuj, laŭ la galikana eklezio, troigis la potencon de la papo.

** Kiel la memoro de gasto, gastigita por unu tago, kaj preterpasanta (Libro de saĝo).

*** Libro el la Biblio, post la Sentencoj de Salomono.

certa pri kelka vero ; kaj tamen li povas nek scii, nek ne deziri scii. Li ne povas eĉ dubi.

IV. ENUO KAJ ESENCAJ KVALITOJ DE L' HOMO

77. Scivolemo estas nur vantaĵo. Plejofte oni volas ion scii, nur por paroli pri ĝi ; alie oni ne vojaĝus sur maro, por nenion diri pri tio, kaj por la nura plezuro vidi, sen espero iam komuniki pri tio.

Priskribo de la homo

78. Dependeco, deziro pri sendependeco, bezonoj.
79. Enuo forlasi la okupojn, al kiuj oni ligiĝis. Homo vivas plezure en sia hejmo. Li vidu virinon, kiu plaĉas al li ; li ludu kvin aŭ ses tagojn kun plezuro ; jen li mizera, se li revenis al sia unua okupiĝado. Nenio estas pli ordinara ol ĉi tio.

V. KAŬZO DE LA EFIKOJ

80. La respekto (kiun oni postulas de aliaj) signifas : "Maloportunigu vin."

Tio estas ŝajne vanta, sed tre ĝusta. Ĉar tio estas diri : "Mi ja maloportunigus min, se vi tion bezonus, ĉar mi tion faras sen utilo por vi" - krom tio, ke la respekto estas por distingi la Grandulojn. Nu, se la respekto estus sidi en fotelo, oni respektus ĉiujn homojn, kaj tiel oni ne distingas ; sed, estante maloportunigata, oni tre bone distingas.

81. La solaj universalaj reguloj estas la leĝoj de la lando en la ordinaraj aferoj, kaj la plureco* en la aliaj. De kio venas tio ? De la forto, kiu estas en ili. Kaj de tio venas, ke la reĝoj, kiuj cetere posedas la forton, ne sekvas la plurecon de siaj ministroj.

Sendube la egaleco de la bienoj estas justa, sed...

Ĉar oni ne povas fortigi la juston, oni justigas la forton, por ke justo kaj forto estu kune, kaj ke estu paco, kio estas la suverena bono.

* plureco = plimulto

82. La Saĝo* sendas nin al la infaneco. "Nisi efficiamini sicut parvuli"***

83. La mondo juĝas bone pri la aferoj ; ĉar ĝi estas en la natura nescio, kiu estas la vera sidejo de la homo. La sciencoj havas du ekstremaĵojn, kiuj intertuŝiĝas. La unua estas la pura natura nescio, en kiu troviĝas ĉiuj homoj je la naskiĝo ; la alia ekstremaĵo estas tiu, en kiu alvenas la grandaj animoj, kiuj, trairinte ĉion, kion la homoj povas scii, trovas ke ili nenion scias, kaj sin renkontas en tiu sama nescio, de kiu ili estis ekirintaj - sed tio estas klera nescio, kiu sin konas. Tiuj de la intervalo, kiuj eliris el la natura nescio, kaj ne povis atingi la alian, havas kelkan tinkturon de tiu sufiĉa scienco, kaj ŝajnigas sin kleraj. Tiuj ĉi malklarigas la mondon, kaj juĝas malbone pri ĉio.

La popolo kaj la lertuloj konsistigas la vojiron de la mondo. Tiuj ĉi malŝatas ĝin kaj estas de ĝi malŝatataj. Ili juĝas malbone pri ĉiuj aferoj, kaj la mondo juĝas bone.

Kartezio

84. Endas diri proksimume : "Tio fariĝas per figuro kaj movo". Ĉar tio estas vera. Sed diri kiaj (figuroj kaj movoj) kaj komponi la maŝinon, estas ridinde ; ĉar tio estas neutile, kaj necerte kaj penige. Kaj eĉ se tio estus vera, ni ne opinias, ke la tuta filozofio valoras unu horon da penado.

85. "Summum jus, summum injuria"***. La plureco (la pli-multo) estas la plej bona vojo, ĉar ĝi estas videbla kaj posedas la forton por trudi obeon. Tamen ĝi estas la opinio de la malpli lertaj. Se oni povus, oni metus la forton en la manojn de la justo ; sed, ĉar la forto ne lasas sin manipuli, kiel oni volas, ĉar ĝi estas eco tre palpebla, dum la justo estas eco spirita, kiun oni laŭvole disponas, oni metis ĝin en la manojn de la forto ; kaj tiel oni nomas justa tion, al kiu oni trude devas obei.

* La Saĝo, laŭ Paskalo, estas nomo, per kiu Salomono antaŭsignis Jesuon.

** Se ni ne estas fariĝintaj kiel infanetoj (Parolo de Jesuo al siaj disĉiploj Mateo)

*** Ekstrema juro, ekstreme maljusto (Terenco, Heautout, IV,5,47, kaj Cicero, cititaj de Charron, Pri la Saĝo I)

De tio venas la maljusteco de la Frondo, kiu levas sian pretendatan juston kontraŭ la forton.

Ne tiel estas en la Eklezio ; ĉar tie estas vera justo, kaj nenia perforto*.

86. "Veri juris..."** Ni ne plu havas. Se ni havus, ni ne pre-nus kiel regulon pri justo sekvi la morojn de sia lando. Tie, ne povante trovi la juston, oni trovas la forton, ktp.
87. La kanceliero estas gravmiena kaj survestita de ornam-aĵoj, ĉar lia posteno estas falsa. Kaj ne la reĝo : li havas la forton ; li neniel bezonas la imagon. La juĝistoj, kuracistoj kc. havas nur la imagon.
88. Tio estas efiko de la forto, ne de la kutimo. Ĉar kiuj estas kapablaj inventi, tiuj estas malmultaj. La plej fortaj en nombro rifuzas la gloron al tiuj inventistoj, kiuj ĝin serĉas per siaj inventoj, kaj se tiuj ĉi volas ĝin ricevi, kaj malŝati tiujn, kiuj ne inventas, la aliaj (donas al ili ridindajn nomojn) - donas al ili bastonbatojn. Oni do ne pretendu pri tiu subtileco, aŭ oni sin kontentigu en si mem.
89. Admirinde ! Oni ne volas, ke mi honoru homon vestitan per brokaĵo kaj sekvatan de sep aŭ ok lakeoj. He nu! li batigos min, se mi ne salutos lin. Tiu vesto, ĝi estas forto.

Kaŭzoj de la efikoj

94. Plej granda malbono estas la civilaj militoj. Ili estas certaj, se oni volas rekompenci la meritojn ; ĉar ĉiuj diros, ke ili estas meritaj. La malbono timenda pro stultulo, kiu heredas reĝecon per naskiĝrajto, estas nek tiel granda nek tiel certa.

Opinioj de l' popolo

95. Esti belaspekta ne estas tro vante : ĉar tio montras, ke multaj homoj laboras por vi. Tio montras per la haroj, ke vi havas ĉambriston, parfumiston, kc ; per la kolumo, la fadenoj, la pasamentoj, kc..., ke vi havas brodiston, ĉar ne estas simpla surfaco kaj simpla ornamaĵo, havi

* (!) Noto de la tr.

** Pri vera juro kaj pri pura justo ni ne havas vidon netan kaj fitman. (Cicero)

plurajn brakojn.

Ju pli da brakoj oni havas, des pli forta oni estas. Esti belaspekta, tio estas montri sian forton.

96. La malforto de la homo estas la kaŭzo de tiom da bel-aĵoj, kiujn oni starigas per konvencio. Ne scipovi bone ludi liuton estas malbono nur pro nia malforto.

97. La deziro kaj la forto estas la fontoj de ĉiuj niaj agoj. La deziro faras la volajn agojn, la forto la nevolajn.

98. De kio venas, ke lamulo ne incitas nin, kaj lama spirito nin incitas ? Tial, ke lamulo rekonas, ke ni marŝas rekte, kaj lama spirito diras, ke estas ni, kiuj lamas. Sen tio, ni kompatus al li, ne kolerus.

Epikteto multe pli forte demandas, kial ni ne spitiĝas, se iu diras, ke ni suferas kapdoloron, kaj ni spitiĝas, se oni diras, ke ni malbone rezonas aŭ malbone elektas. La kaŭzo de tio estas, ke ni estas tre certaj, ke ni ne suferas kapdoloron, kaj ke ni ne estas lamaj ; sed ni ne estas tiel certaj, ke ni elektas la veron ; tiel ke, estante certaj nur tial, ke ni ĝin vidas per tuta nia vidkapablo, dum alia vidas la malon per tuta sia vidkapablo, tio metas nin en ŝanceliĝon, kaj nin mirigas ; ankoraŭ pli, kiam mil aliaj mokus nian elekton : ĉar necesas preferi nian lumon al tiom da aliaj ; kaj tio estas maltima kaj malfacila. Neniam ekzistas tia kontraŭdiro en la pensoj koncerne lamulon.

La homo estas tiel farita, ke, daŭre aŭdante diri, ke li estas stulta, li fine tion kredas, kaj daŭre dirante tion al si mem, oni kredigas sin pri tio : ĉar la homo faras sola internan konversacion, kiun endas bone reguli. "Corruptum bones mores colloquia prava"* . Necesas teni sin en silento tiom, kiom oni povas kaj interparoli nur pri Dio, pri kiu oni scias, ke Li estas la vero ; kaj tiel oni persvadas sin mem**.

99. Epikteto. Tiuj, kiuj diras : "Vi suferas kapdoloron.", ne estas same ; oni estas certa pri la sano, ne pri la justo ; kaj ja lia estis stultaĵo.

* Malbonaj interparoloj putrigas bonajn morojn (Menandro, citita de Paŭlo)

** Ĉiam la sama obsedo en la penso de Paskalo. N.de la tr.

Kaj tamen li kredis ĝin demonstri, dirante : "Aŭ en nia povo, aŭ ne".

Sed li ne vidis, ke ne estas en nia povo reguli la koron ; kaj li malprave konkludis tion de la fakto, ke ekzistas kristanoj.*

100. La popolo havas tre sanajn opiniojn. Ekzemple :

1. Elekti la malenuigon kaj la ĉason prefere ol la predon ; la duonkleruloj mokas tion, kaj triumfe montras per tio la malsaĝon de la mondo ; sed, pro motivo, kiun ili ne penetras, oni (la popolo) estas prava.
2. Distingi la homojn laŭ la ekstero : laŭ la nobeleco aŭ la bienposedo ; la mondo ankoraŭ triumfe montras ke tio estas malsaĝa ; sed tio estas tre saĝa.
3. Ofendiĝi pro ricevita vangobato, aŭ tiom deziri gloron.

Sed tio estas ja tre dezirinda, pro la aliaj bonoj, kiuj estas kun ĝi kunligitaj ; kaj homo, kiu ricevis vangobaton sen venĝosento estas superŝutata de insultoj.

4. Labori por necertaĵo, iri sur la maron, trapasi sur lignoplato...

Justo, forto

101. Estas juste, ke la justo estu sekvata, estas necese, ke la forto estu sekvata. Justo sen forto estas kontraŭdirata, ĉar ĉiam estas maliculoj. Forto sen justo estas akuzata. Do necesas meti kune juston kaj forton, kaj por tio fari, ke justo estu forta, aŭ ke forto estu justa.

Justo estas temo pri disputo. Forto estas rekonebla kaj sendisputa. Tiel oni ne povas doni forton al justo, ĉar forto kontraŭdiras juston, kaj diras, ke ĝi estas maljusta, kaj ke al ĝi (la forto) apartenas la justo. Kaj tiel, ne povante fari, ke justo estu forta, oni faris, ke forto estu justa.

102. Kiel granda avantaĝo estas la nobeleco, kiu, ekde la dek-oka jaro, metas homon en kapablon, kiel alia povus meriti kiam kvindekjara : jen estas tridek jaroj senpene gajnitaj.

* La firma memregeco de la kristanaj martiroj fontis el ilia kredo. Oni scias, ke la stoika filozofo Epikteto ne estis malpli firma kaj kuraĝa ol ili, sed tion Paskalo ŝajne ne volis vidi.

VI. GRANDECO

103. Se iu animalo farus per spirito tion, kion ĝi faras per instinkto, kaj se ĝi parolus per spirito tion, kion ĝi parolas per instinkto, por la ĉaso kaj por averti siajn kamaradojn, ke la predo estas trovita aŭ perdita, ĝi ja ankaŭ parolus pri la aferoj, kiujn ĝi plej ŝatas, kiel por diri : "rongu tiun ŝnuron, kiu min vundas, kaj kiun mi ne povas atingi."
104. La kaŭzoj de la efikoj markas la grandecon de l'homino, ke el deziro li ĉerpis tiel belan ordon.
105. La beko de la papago, kiun ĝi viŝas, kvankam ĝi estas neta.
106. Kio en mi sentas plézuron ? Ĉu la mano ? Ĉu la brako ? Ĉu la karno ? Ĉu la sango ? Oni vidas, ke necese ĝi estas io nemateria*.

Kontraŭ la pironismo

107. Estas strange, ke oni ne povas paroli pri tiuj aferoj sen malklarigi ilin. Ni supozas, ke ĉiuj konceptas ilin same, sed tion ni supozas ja senprave ; ĉar pri tio ni havas nenian pruvon. Mi ja vidas, ke oni aplikas tiujn vortojn en samaj okazoj, kaj ke ĉiufoje, kiam du homoj vidas korpon ŝanĝi je loko, ili ambaŭ esprimas la vidon de tiu objekto, dirante unu kaj la alia, ke ĝi moviĝis, kaj ke de tiu konformeco de aplikado oni tiras potencon konjekton pri konformeco de ideoj, sed tio ne estas absolute konvinka ; - ĉar oni scias, ke ofte oni tiras samajn konsekvencojn de malsamaj supozoj. Tio sufiĉas por malklarigi almenaŭ la temon ; ne tial, ke ĝi absolute estingas la naturan lumon, kiu certigas nin pri la aferoj ; sed tio ĝin malklarigas, kaj konfuzas la dogmismojn, por la gloro de la pirona kabalo, kiu konsistas el tiu ambigua ambiguo kaj el iu duba malhelo, kies tutan helon ne povas forigi niaj duboj, kaj niaj naturaj lumoj forigi ĉiujn tenebrojn.
108. Ni trovas la veron ne nur per la racio, sed ankaŭ per la koro. En tiu ĉi lasta maniero ni konas la unuajn principojn, kaj vane la rezonado, kiu en ili ne partoprenas, provas ilin kontraŭbatali. La pironanoj, kiuj havas nur

* (?) N. de la tr.

tion kiel objekton, neutile ĝin prilaboras. Ni scias, ke ni ne revas, kiel ajn senpovaj ni estas por pruvi tion per racio. Tiu senpoveco ne pruvas ion alian ol la malforton de nia racio, sed ne la malcertecon de ĉiuj niaj konoj, kiel ili pretendas. Ĉar la kono de la unuaj principoj, tiaj ke ekzistas spaco, tempo, movo, nombroj, estas tiel firma, kiel tiuj, kiujn donas al ni niaj rezonadoj. Kaj sur tiuj konoj de la koro kaj de la instinkto la racio necese sin apogas, kaj fundamentas sian rezonadon.

La koro sentas, ke estas tri dimensioj en la spaco, kaj ke la nombroj estas senfinaj, kaj poste la racio demonstras, ke ne ekzistas du kvadrataj nombroj, el kiu unu estus duoblo de la alia. La principoj estas sentataj, la propozicioj estas konkludataj, kaj ĉio kun certeco, kvankam laŭ malsamaj vojoj, kaj estus tiel neutile kaj ridinde, ke la racio postulu de la koro pruvojn pri ĝiaj unuaj principoj por konsenti pri ili, kiel estus ridinde, ke la koro postulu de la racio senton pri ĉiuj propozicioj, kiujn ĝi demonstras, por konsenti ilin akcepti.

Do tiu senpoveco devas utili nur por humiligi la racion - kiu volus juĝi pri ĉio - sed ne por kontraŭbatali nian certecon. Kvazaŭ nur la racio povus nin instrui ! Al Dio plaĉu, ke male ni neniam ĝin bezonu, kaj ke ni konu ĉiujn aferojn per instinkto kaj per sento ! Sed la Naturo rifuzis al ni tiun bonon ; male, ĝi donis al ni nur tre malmulte da tiaj konoj ; ĉiuj aliaj estas akireblaj per rezonado.

Tial, tiuj, al kiuj Dio donis la Religion, estas tre feliĉaj kaj tre prave persvaditaj ; sed al tiuj, kiuj ne havas ĝin, ni povas doni ĝin nur per rezonado, en atendo ĝis Dio donos ĝin al ili per korsento - sen kio la kredo estas nur homa, kaj neutila por la saviĝo*.

109. Mi povas ja koncepti homon sen manoj, piedoj, kapo, ĉar nur la sperto instruas al ni, ke la kapo estas pli necesa ol la piedoj. Sed mi ne povas koncepti la homon sen penso ; tio estus ŝtono aŭ bruto.

110. Instinkto kaj racio markas du naturojn.

* Tiuj lastaj frazoj karakterizas la pensoformon de Paskalo : li demonstras per rezonado, ke nur la religia kredo kondukas al vero.

N. de la tr.

Pensanta kano (Vd. 198)

111. Ne el la spaco mi devas serĉi mian dignon, sed el la penso. Mi havos nenian avantaĝon posedante ter-bienojn. Per la spaco, la universo entenas kaj englutas min kiel punkton ; per la penso mi komprenas ĝin.
112. La grandeco de la homo estas granda en tio, ke li sin konas mizera. Arbo ne konas sin mizera. Do estas esti mizera, sin koni mizera ; estas esti granda, scii, ke oni estas mizera.

Senmaterieco de la animo

113. La filozofoj, kiuj regis siajn pasiojn. Kia materio povis tion fari ? *
114. Ĉiuj tiuj mizeroj mem pruvas lian grandecon ; ili estas mizeroj de granda sinjoro, - mizeroj de reĝo senposedigita.

La grandeco de la homo

115. La grandeco de la homo estas ĉerpita eĉ el lia mizero; ĉar kio estas naturo en la animaloj, tion ni nomas mizero en la homo. Per tio ni rekonas ke, ĉar lia naturo estas nun sama kiel tiu de la animaloj, li estas defalinta de alia naturo, kiu iam estis al li propra. Ĉar kiu sin trovas malfeliĉa, ke li ne estas reĝo, krom senposedigita reĝo ? Ĉu oni trovis Paŭlon-Emilion malfeliĉa, ĉar li ne estis plu konsulo ? Male, ĉiu trovis lin feliĉa, ke li estis estinta tia. Sed oni trovis Perseon tiel malfeliĉa ne esti plu reĝo, ĉar lia destino estis, ke li ĉiam estu tia, ke oni trovis strange, ke li elportas la vivon. Kiu sin trovas malfeliĉa havi nur unu buŝon, kaj kiu ne trovas sin malfeliĉa havi nur unu okulon ? Eble neniam oni afliktiĝis, ke oni ne havas tri okulojn, sed oni estas nekonsolebla, se oni havas neniun.

VII. KONTRAŬAĴOJ

Post kiam oni montris la malaltecon kaj la grandecon de la homo.

117. La homo nun taksu sin je sia prezo ; li amu sin, ĉar en li estas naturo kapabla pri bono ; li tamen ne amu la malaltaĵojn, kiuj estas en li. Li sin malamu, li sin amu ; li havas en si la kapablon koni la veron kaj esti

* aludo pri la Stoikistoj.

feliĉa ; sed li ne posedas veron aŭ konstantan aŭ kontentigan.

Mi do volus instigi la homon al la deziro eltrovi veron, al preteco kaj libereco el la pasioj, por ĝin sekvi tie, kie li ĝin trovos, sciante, kiom lia konscio estas mallumiginta pro la pasioj. Mi volus, ke li malamu en si la deziron, kiu lin determinas per si mem, por ke ĝi ne blindigu lin en lia elekto, kaj ke ĝi ne haltigu lin, kiam li estos elektinta.

118. Ni estas tiel pretendemaj, ke ni volus esti konataj de la tuta tero, kaj eĉ de homoj, kiuj venos, kien ni ne estos plu ; kaj ni estas tiel vantaj, ke la estimo de kvin aŭ ses personoj ĉirkaŭ ni amuzas kaj kontentigas nin.
119. Dangere estas tro vidigi al la homo, kiom li estas egala al la bestoj, - sen montri al li lian grandecon - kaj estas ankaŭ dangere tro vidigi al li lian grandecon sen lian malaltecon. Sed estas tre avantaĝe prezenti al li unu kaj la alian. Endas, ke la homo ne kredu, ke li estas egala al la bestoj, nek al la anĝeloj, nek ke li nesciu pri unu kaj la alia, sed ke li sciu pri unu kaj la alia.

Grandeco kaj mizero

120. Ĉar la mizero estas konkludata de la grandeco, kaj la grandeco de la mizero, unuj konkludis la mizeron, kaj tiom pli, ke ili prenis por pruvon pri ĝi la grandecon ; kaj, ĉar la aliaj konkludas la grandecon kun tiom pli da forto, ke ili ĝin konkludis de la mizero mem, ĉio, kion unuj povis diri por montri la grandecon, servis nur kiel argumenton al la aliaj por konkludi la mizeron ; ĉar oni estas des pli mizera, de ju pli alte oni falis ; kaj la aliaj, male. Ili sin portis unuj sur la aliajn per senfina cirklo, ĉar estas certe, ke laŭmezure kiom da lumo havas la homoj, ili trovas en la homo kaj grandecon kaj mizeron. En unu vorto, la homo konas, ke li estas mizera. Li estas do mizera, ĉar li tia estas ; sed li estas tre granda, ĉar li konas tion.
121. Kontraŭdiro : malŝato al nia estaĵo, morti pro nenio, malamo al nia estaĵo.

Kontraŭaĵoj

122. La homo estas nature kredema, nekredema, timema, temerara.

123. Kio estas niaj naturaj principoj, se ne niaj kutimigitaj principoj ? kaj, en la infanoj, tiuj, kiujn ili ricevis de la kutimoj de siaj patroj, kiel la ĉaso en la animaloj ?

Diferenca kutimo donos aliajn principojn. Tio vidiĝas per sperto. Kaj se iuj estas neforigeblaj por la kutimo, estas ankaŭ iuj de la kutimo, kontraŭ la naturo, neforigeblaj por la naturo aŭ por dua kutimo ; tio dependas de la disponebleco.

124. La patroj timas, ke la natura amo de la infanoj foriĝu. Kia estas do tiu naturo forigebla ?

La kutimo estas dua naturo, kiu detruas la unuan. Sed kio estas naturo ? Kial la kutimo ne estas natura ? Mi tre timas, ke tiu naturo mem estas nur unua kutimo, samkiel la kutimo estas dua naturo.

125. La naturo de la homo estas konsiderebla laŭ du manieroj : unu laŭ lia fina celo, kaj tiam li estas granda kaj nekomparebla ; la alia laŭ la multopo, kiel oni juĝas pri la naturo de la ĉevalo kaj de la hundo laŭ la multopo ; kaj tiam la homo estas fia kaj malnobla. Kaj jen estas du vojoj, kiuj igas oni diverse juĝi, kaj igas la filozofojn interdisputi.

Ĉar unu neas la supozon de la alia. Unu diras : "Li ne estas naskita por tiu fincelo, ĉar ĉiuj liaj agoj malproksimigas lin de ĝi". La alia diras : "Li malproksimigas de sia fincelo, kiam li faras tiujn malnoblajn agojn."

126. Du aferoj instruas la homon pri tuta lia naturo : la instinkto kaj la sperto.

Metio.
Pensoj

127. Ĉio estas unueca, ĉio estas diversa. Kiom da naturoj en tiu de la homo ! Kiom da mankoj ! Kaj per kia hazardo ? Ĉiu ordinare prenas tion, kion li aŭdis ŝati.

128. Se li sin laŭdas, mi lin malaltigas ; se li malaltigas, mi lin laŭdas ; kaj ĉiam kontraŭdiros lin, ĝis li komprenos, ke li estas nekomprenbla monstro.

129. La ĉefaj fortoj de la pironanoj - mi flankelasas la pli malgrandajn - estas, ke ni havas nenian certecon pri la vereco de tiuj principoj, krom tio, ke ni sentas ilin nature en ni. Nu, tiu natura sento ne estas konvinka

pruvo, ĉar la Naturo povas esti doninta ilin al ni false, ĉar ne ekzistas certeco, krom la kredo, ĉu la homo estas kreita de bona dio, de malica demono, aŭ per hazardo, estas dube, ĉu tiuj principoj estas donitaj aŭ veraj, aŭ falsaj, aŭ necertaj, laŭ nia deveno.

Plie, ke neniu estas certa, ĉu li dormas aŭ maldormas, ĉar dum la dormo oni kredas sin maldormanta kiel en la maldormo.

Oni kredas vidi la spacojn, la figurojn, la movojn ; oni sentas la tempon flui, oni ĝin mezuras ; kaj fine oni agas same kiel maldormante. Tiel ke, ĉar la duono de la vivo pasas en dormado, kie, kvankam ŝajnas, laŭ nia propra konfeso ni havas nenian ideon pri la vero, ĉar niaj sentoj estas tiam iluzioj, kiu scias, ĉu tiu alia duono de la vivo, en kiu ni opinias maldormi, ne estas alia dormo iom diferenca de la unua, el kiu ni vekigĝas, dum ni opinias dormi ?

Kiu dubas, ke se oni sonĝus en kompanio, kaj hazarde la sonĝoj interakordus, kio estas sufiĉe ordinara, kaj se oni maldormus en solo, oni kredus la aferojn inversigitaj ? Fine, ĉar ofte oni sonĝas, ke oni sonĝas, amasigante sonĝon sur alian, ĉu ne estas eble, ke tiu duono de la vivo, en kiu ni opinias maldormi, estas mem nur sonĝo, - sur kiu la aliaj estas greftitaj - el kiu ni vekigĝas je la morto, en kiu duono de la vivo ni havas ne pli la principojn de vero kaj bono, ol dum la natura dormo ? Tiu tuta fluado de la tempo - de la vivo - kaj tiuj diversaj korpoj, kiujn ni sentas, tiuj diversaj pensoj, kiuj nin agitas, eble estas nur iluzioj similaj al la fluado de la tempo kaj al la vantaj fantomoj de niaj sonĝoj.

Jen estas la ĉefaj fortoj ambaŭflanke. Mi flankelasas la malpli grandajn stultaĵojn, kiel la paroladojn faritajn de la pironanoj kontraŭ la impresoj de la kutimo, de la edukado, de la moroj de la landoj, kvankam ili altiras la plimulton el la ordinaraĵoj, kiuj, starigante dogmojn sur tiuj vantaj fundamentoj, estas renversataj per la plej eta blovo de la pironanoj.

Mi haltas ĉe la unika forto de la dogmistoj, kiu estas ke, parolante bonafide kaj sincere, oni ne povas dubi pri la naturaj principoj.

Al kio la pironanoj kontraŭmetas la necertecon pri nia deveno, kiu enhavas tiun pri nia naturo.

Jen estas la milito inter la homoj ; en kiu necesas, ke

ĉiu elektu partion kaj necese vicigu sin aŭ inter la dogmismoj aŭ inter la pironanoj. Ĉar kiu opinias resti neŭtrala, tiu estos esence pironano. Tiu neŭtraleco estas la esenco de la (pironisma) kabalo. Kiu ne estas kontraŭ ili, tiu necese estas por ili ; en kio montriĝas ilia avantaĝo. Ili ne estas por si mem ; ili estas neŭtralaj, indiferentaj, pendantaj de ĉio sen escepti sin mem.

Kion do faros la homo en tiu stato ? Ĉu li dubos pri ĉio ? Ĉu li dubos, ĉu li maldormas, se oni pinĉas, bruligas lin, ĉu li dubos, ĉu li dubas ? Ĉu li dubos, ĉu li estas ? *

Oni ne povas veni ĝis tie - kaj mi metas kiel fakton, ke neniam estis perfekta efektiva pironano. La Naturo subtenas la racion - senpovan - kaj malhelpas, ke ĝi fantaziegu ĝis tiu punkto.

Ĉu do li diros, male, ke li certe posedas la veron, li kiu, kiel ajn malmulte oni lin puŝas, ne povas montri iun pravigon pri ĝi, kaj estas trudata ellasi la predon ?

Kia ĥimero estas do la homo ? kia novaĵo, kia monstro, kia ĥaoso, kia objekto de kontraŭdiroj, kia mirindaĵo ! Juĝanto pri ĉiuj aferoj, stulta tervermo, deponhavanto de la vero, kloako de necertaĵo kaj eraro, gloro kaj rubaĵo de la universo !

Kiu malimplikos tiun interplektaĵon ?

Certe tio transpasas la dogmismion kaj la pironismion kaj la tutan homan filozofion. La homo transpasas la homon. Oni do konsentu al la pironanoj tion, kion ili tiom kriadis, ke la vero ne estas de ni atingebla nek kaptebla, ke ĝi ne loĝas sur tero, ke ĝi estas domano de la ĉielo, ke ĝi loĝas en la sino de Dio, kaj ke oni povas koni ĝin nur laŭ la mezuro, en kiu plaĉas al li ĝin revelacii. Ni do eksciu nian veran naturon de tiu nekreita kaj enkarnigita Vero ! **

Oni ne povas esti pironano, sen sufoki la naturon ; oni ne povas esti dogmisto sen rezigni pri la racio.

La Naturo konfuzas la pironanojn kaj la racio konfuzas la dogmismojn. Kio do vi fariĝos, ho homo, kiu serĉas, kia estas via vera kondiĉaro kaj via natura racio ? Vi

* Paskalo tie sekvas Kartezion (Mi pensas, do mi estas)

** Ĉiam la postulato, la hipotezo Dio, kiel diris Sébastien Faure. Se oni ne agnoskas ĝin, ne estas eble sekvi la konkludojn de la aŭtoro, kiel ajn forta estas lia argumentado. N. de la tr.

povas nek fuĝi el unu el tiuj sektoj nek resti en unu. Do vi, ho superbaj, ekkonu, kia paradokso vi estas al vi mem. Humiliĝu, senpova racio ! Silentu, stulta naturo ! Eksciu, ke la homo infinite transpasas la homon, kaj aŭdu de via Majstro vian veran kondiĉaron, kiun vi ne konas.

Aŭskultu Dion !

Ĉu do ne estas klare kiel la taglumo*, ke la homo estas duobla ? Ĉar fine, se la homo neniam estus putrinta, li ĝuus, en sia senkulpeco, la veron kaj la feliĉon kun certeco ; kaj se la homo neniam estus estinta neputrinta, li havus ian ideon nek pri la vero nek pri la feliĉo. Sed, ni malfeliĉaj, kaj pli ol se ne estus grandeco en nia kondiĉaro, ni havas ideon pri la feliĉo, kaj ni ne povas atingi ĝin ; ni sentas bildon pri la vero, kaj posedas nur la mensogon, nekapablaj absolute nescii nek certe scii.

Tiel manifeste estas, ke ni iam estis en grado de perfekteco, de kiu bedaŭrinde ni estas defalintaj.

Mirinda afero, tamen, ke la mistero plej malproksima de nia konkapablo, tiu de la transigo de la peko, estas afero, sen kiu ni ne povas havi konon pri ni mem. Ĉar sendube nenio pli ŝokas nian racion ol diri, ke la peko de la unua homo kulpigas tiujn, kiuj, estante tiel malproksimaj de tiu fonto, ŝajnas nekapablaj partopreni ĝin. Tiu sekvo ŝajnas al ni ne nur neebla, ĝi ŝajnas al ni eĉ tre maljusta. Ĉar kio estas pli kontraŭa al la reguloj de nia mizera justo, ol eterne damni infanon ne kapablan pri volo, pro peko, en kiu ĝi ŝajnas havi tiel malmultan parton, ke ĝi estis farita sesmil jarojn antaŭ ol ĝi ekestis. Certe nenio pli drasta skuas nin, ol tiu doktrino. Kaj tamen, sen tiu mistero, la plej nekomprenebla el ĉiuj, ni estas nekompreneblaj al ni mem. La nodo de nia kondiĉaro prenas siajn faldojn kaj siajn turniĝojn el tiu abismo, tiel ke la homo estas pli nekonceptebla sen tiu mistero, ol tiu mistero estas nekonceptebla de la homo.

Certe Dio, volante igi la malfacilaĵojn de nia esto nekompreneblaj por ni, kaŝis ĝian nodon tiel alte, aŭ, por pliĝuste diri, tiel malalte, ke ni estas nekapablaj ĝin

* (?) N. de la tr.

atingi. Tiel, ne per la superbaj agitadoj de nia racio, sed per la simpla submetiĝo de la racio, ni povas vere ekkoni nin.

Tiuj fundamentoj, firme establitaj sur la neperfortebla aŭtoritato de la Religio, sciigas al ni, ke estas du veroj de kredo egale konstantaj.

Unu, ke la homo, aŭ en la stato de la kredo aŭ en tiu de la graco, estas levita super la Naturo - igita kvazaŭ simila al Dio kaj partoprenanta en la dieco - la alia, ke en la stato de putrinteco - kaj de la peko -, li estas defalinta de tiu stato kaj igita simila al la bestoj. Tiuj du propozicioj estas egale firmaj kaj certaj. La Skribo tion deklaras al ni manifeste, ktp (sekvas pluraj citaĵoj el la Biblio)*

VIII. MALENUIGO

131. La homoj, ne povante kuraci la morton - la mizeron, la nescion - inventis, por igi sin feliĉaj, ne pensi pri tioj.

Malgraŭ tiuj mizeroj, li (la homo) volas esti feliĉa, volas esti nur feliĉa, kaj ne povas ne voli tion.

Sed kiel li procedos ? Por bone fari, necesus, ke li sin igu nemortema ; sed, tion ne povante, li inventis malhelpi sin pensi pri tio.

132. Se la homo estus feliĉa, li estus tia des pli, ju malpli li estus distrata, kiel la sanktuloj kaj Dio - Jes ; sed ĉu ne estas feliĉe, povi esti ĝojigata per la distro ? - Ne ; ĉar ĝi venas de aliloke kaj de ekstere ; kaj tiel li estas dependa, kaj sekve, ema esti konfuzata per mil akcidentoj, kiuj faras la afliktojn neeviteblaj.

133. Mi sentas, ke mi povus ne esti ; ĉar la mio konsistas el mia penso ; do mi, kiu pensas, ne estus, se mia patrino estus mortigita, antaŭ ol mi estis animita ; do mi ne estas estaĵo necesa ; mi ankaŭ ne estas eterna nek

* Ĉu Paskalo ne konsciis pri la malforto de sia tezo : nome, ke lia tuta argumenta konstruo disfalas, se oni ne akceptas kiel nediskuteblan veron la asertojn de la Skribo, fundamento de la kristana religio ?

Tio estas la sinteno de la judoj. Ili opinias, kiel la kristanoj, ke la profetoj de la Malnova Testamento anoncis la Mesion, sed ili rifuzas rigardi Jesuon kiel tiun anoncitan Mesion. La legitimeco de Jesuo kiel Mesio (Kristo) estas postulato, ne de ĉiuj agnoskata.

N. de la tr.

infinita ; sed mi ja vidas*, ke en la naturo estas unu estulo necese, eterna kaj infinita.

134. Kiam mi iafoje ekkonsideris la diversajn agitadojn de la homoj kaj la danĝerojn - kaj la penojn - al kiuj ili sin elmetas en la Kortego, en la milito - de kio naskiĝas tiom da kvereloj, da pasioj, da sentimaj kaj ofte malbonaj entreprenoj, - ktp, mi ofte diris, ke la tuta malfeliĉo de la homoj venas de unu sola afero, nome ke ili ne scipovas resti ripoze en ĉambro. Homo, kiu havas sufiĉe da posedaĵo por vivi, se li scipovus resti hejme kun plezuro, ne elirus por iri sur la maron, aŭ al sieĝo de fortikigita urbo ; oni aĉetus tiel multekoste postenon en la armeo, nur tial, ke oni trovus neelporteble ne moviĝi en la urbo, kaj oni serĉas la konversaciojn kaj la malenuigon per la ludoj nur tial, ke oni ne povas resti hejme kun plezuro. Ktp.

Sed, kiam mi pripensis pli proksime, kaj kiam, eltrovinte la kaŭzojn de ĉiuj niaj malfeliĉoj, mi volis eltrovi iliajn motivojn, mi trovis, ke ekzistas unu tre efektiva, kiu konsistas el la natura malfeliĉo de nia malforta kaj mortema kondiĉo, tiel mizera, ke nenio povas konsolidi nin, kiam ni pensas pri ĝi de proksime.

Kiun ajn kondiĉaron oni imagu, en kiu oni amasigu ĉiujn posedaĵojn, kiuj povas aparteni al ni ; la reĝeco estas la plej bela posteno en la mondo, kaj ĉiuj oni imagu reĝon akompanatan de ĉiuj kontentigoj, kiuj povas tuŝi lin. Se li estas sen malenuigo, kaj se oni lasas lin konsideri kaj pripensi, kio li estas, tiu langvora feliĉo ne subtenos lin ; li falos, pro neceso, en vidojn lin minacantajn, eble okazontajn ribelojn, kaj fine la morton kaj la malsanojn, kiuj estas neeviteblaj. Tiel ke, se li estas sen tio, kion oni nomas malenuigo, jen li estas malfeliĉa kaj pli malfeliĉa ol la plej malgranda el liaj regatoj, kiu ludas kaj distriĝas.

De tio venas, ke la ludo kaj la konversacio de la virinoj, la milito, la altaj postenoj estas tiel serĉataj. Ne tial, ke estas ja feliĉo, nek ke oni imagas, ke la vera feliĉo estas posedi la monon, kiun oni povas gajni per ludo, aŭ en la leporo, kiun oni ĉasas ; oni ne volus ĝin havi, se ĝi estus proponita. Oni serĉas ne tiun molan kaj pacan uzadon, kiu lasas nin pensi pri nia malfeliĉa kondiĉo, nek la danĝerojn de la milito, nek la penon de

* (?) N. de la tr.

la postenoj, sed la embarasiĝon, kiu deturnas nin de pripenso, kaj nin malenuigas. - Motivo, pro kiu oni pli amas la ĉason ol la predon.

De tio venas, ke la homoj tiom amas la bruon kaj la movon. De tio venas, ke karcerero estas tiel aĉega torturo ; de tio venas, ke la plezuro de soleco estas nekomprenebla afero ; kaj fine, estas la plej granda kaŭzo de feliĉo en la reĝa kondiĉo, ke senĉese oni provas ilin malenuigi kaj havigi al ili ĉiajn plezurojn. La reĝo estas ĉirkaŭata de homoj, kiuj pensas nur por malenuigi la reĝon, kaj malhelpi, ke li pensu pri si ; ĉar, kvankam reĝo, li estas malfeliĉa, se li pensas pri si.

Jen estas ĉio, kion la homoj povis inventi por feliĉigi sin ; kaj tiuj, kiuj pri tio filozofumas, kaj kredas, ke la mondo estas tre malmulte prudenta, kuri tutan tagon post leporo, kiun ili ne volus esti aĉetintaj, tiuj nemulte konas nian naturon. Tiu leporo ne ŝirmus nin de la vido de la morto kaj de la mizeroj, kiuj nin deturnas (de la feliĉo), sed la ĉaso ŝirmas nin de ĝi. Kaj tiel, la konsilo donita al Pirro, ke li prenu la ripozon, kiun li iris serĉi per tiom da penoj, ricevis multe da malfacilaĵoj.

Kaj tiel, kiam oni riproĉas, ke kion ili serĉas kun tia ardo, tio ne povus ilin kontentigi, se ili respondus, kiel ili devus, se ili bone pripensus, ke en tio ili serĉas nur fortan kaj impetan okupon, kiu deturnas ilin de penso pri si, kaj ke tial ili proponas al si allogan objekton, kiu ĉarmas kaj logas ilin kun ardo, ili lasus siajn kontraŭulojn sen repliko ; sed ili ne tiel respondas, ĉar ili ne bone konas sin mem ; ili ne scias, ke la ĉason, ne la predon ili serĉas. Ili imagas, ke, se ili estus ricevintaj tiun postenon, ili poste ripozus kun plezuro, kaj ne sentas la nesatigeblan naturon de sia deziro. Ili kredas sincere serĉi la ripozon, kaj serĉas ja nur la agitadon. Ili havas sekretan instinkton, kiu inklinas ilin al serĉado de malenuigo kaj okupo en la ekstero, (inklino) kiu venas de la resento de iliaj daŭraj mizeroj, kaj ili havas alian sekretan instinkton, kiu restas el la grandeco de nia unua naturo, kiu sciigas al ili, ke la feliĉo estas ja nur en la ripozo kaj ne en la tumulto ; kaj el tiuj du interkontraŭaj instinktoj formiĝas en ili konfuza projekto, kiu sin kaŝas de ilia vido en la fundo de ilia animo, kiu trudas ilin strebadi al ripozo tra

agitado, kaj ĉiam imagi, ke la kontenteco, kiun ili ne havas, venos al ili, se, superante kelkajn malfacilaĵojn de ili konsideratajn, ili povos per tio malfermi al si la pordon al ripozo.

Tiel fluas nia tuta vivo ; oni serĉas la ripozon kontraŭbatalante kelkajn obstaklojn, kaj se oni superis ilin, la ripozo fariĝas neelportebla, pro la enuo, kiun ĝi naskas ; kaj necesas eliri kaj almozpeti pri la tumulto.

Ĉar, aŭ oni pensas pri la mizeroj, kiujn oni havas, aŭ pri tiuj, kiuj nin minacas ; kaj eĉ se oni vidus sin sufiĉe oportune ĉiuflanke, la enuo, per sia privata aŭtoritato, ne mankus eliri el la fundo de l' koro, kie ĝi havas naturajn radikojn, kaj plenigi la spiriton per sia veneno. Tiel la homo estas tiel malfeliĉa, ke li enuus eĉ sen ia kaŭzo de enuo, per la propra stato de sia konsisto, kaj li estas tiel vanta, ke, dum li estas plena de mil esencaj kaŭzoj de enuo, la plej eta afero, kiel bilardo aŭ pilko, kiun li puŝas, sufiĉas por malenuigi lin.

"Sed, vi diros, kion li celas en ĉio ĉi ?". Li celas sin laŭdi morgaŭ inter siaj amikoj, ke li ludis pli bone ol iu alia. Tiel aliaj estas en sia kabineto por montri al la kleruloj, ke ili solvis algebran demandon ĝis tiam ne solvitajn, kaj tiom da aliaj elmetas sin al ekstremaj danĝeroj, por poste laŭdi sin pri fortikaĵo, kiun ili prenis ; tiel same stulte, laŭ mia opinio. Kaj fine la aliaj mortelacigas sin por rimarki ĉiujn tiujn aferojn, ne por fariĝi pli saĝaj, sed nur por montri, ke ili scias ilin ; kaj tiuj ĉi estas la plej malsaĝaj el la bando, ĉar ili estas tiaj kun kono ; dum oni povas pensi pri la aliaj, ke ili ne estus plu tiaj, se ili havus tiun konon.

Jena homo pasigas sian vivon senenue ; ĉiutage ludante nemultan ludmonon. Donu al li ĉiumatene la monon, kiun li povas gajni ĉiutage, sub kondiĉo, ke li ne ludu ; vi igas lin malfeliĉa. Eble oni diros, tial ke li serĉas la amuzon de la ludo, kaj ne la gajnon. Igu lin do ludi por neniom : li ne ardiĝos en la ludo, kaj enuos. Do ne la solan amuzon li serĉas ; amuzo langvora kaj senpasia enuigos lin ; necesas, ke li ardiĝu en la ludo, kaj sin mem trompu, imagante, ke li estus feliĉa gajni tion, kion li ne volus, ke oni donu al li, kondiĉe ke li ne ludu, por ke li formu al si objekton pri pasio kaj ke li ekscitu sian deziron, sian koleron, sian timon, pri tiu objekto, kiun li formis por si, kiel la infanoj, kiuj timiĝas pri la

vizaĝo, kiun ili pentraĉis.

"De kio venas, ke tiu viro, kiu antaŭ malmulte da monatoj perdis sian unikan filon, kaj kiu, superŝutita de procesoj kaj kvereloj, estis ĉi-matene tiel konfuzita, nun ne pensas plu pri tioj?" - Ne miru pro tio : li estas tute okupata, por vidi tra kie pasos tiu apro, kiun liaj hundoj pelas kun tioma ardo, de antaŭ ses horoj. Pli-multo ne necesas. Homo, kiel ajn plena de malgajo, se oni povas sukcesi enigi lin en kelkan malenuigon, jen li estos feliĉa dum tiu tempo ; kaj homo, kiel ajn feliĉa, se li ne estas distrata per kelka pasio aŭ kelka amuzo, kiu malhelpas la etendiĝon de la enuo, estos baldaŭ ĉagrenita kaj malfeliĉa. Sen malenuigo ne estas ĝojo ; kun malenuigo ne estas malĝojo. Kaj ankaŭ tio formas la feliĉon de la personoj de alta kondiĉo, ke ili havas nombron da personoj, kiuj malenuigas ilin, kaj ke ili havas la povon sin tenadi en tiu stato.

Atentu pri tio ĉi. Kio estas esti superintendanto, kanceliero, unua prezidanto (de tribunalo), krom esti en kondiĉo, en kiu ili havas, matene, grandan nombron da homoj, kiuj venas de ĉiuj flankoj por ne lasi al ili unu horon en la tago, dum kiu ili povu pensi pri si mem ? Kaj kiam ili troviĝas en malfavoro, kaj oni resendas ilin al ilia kampodomo, en kiu ne mankas al ili bienoj kaj servistoj por asisti ilin en iliaj bezonoj, ili ne preterlasas esti mizeraj kaj forlasitaj, ĉar neniu malhelpas ilin pensi pri si.

La vanteco : la plezuro montri ĝin al aliaj.

La danco : necesas bone pripensi, kien oni metos siajn piedojn.

La nobelo sincere kredas, ke la ĉaso estas plezuro granda kaj reĝa plezuro, sed lia ĉasservisto nesamopiniias.

135. Ĉu la reĝa digno ne estas sufiĉe granda per si mem, por tiu, kiu ĝin posedas, por igi lin feliĉa per la sola vido de tio, kio li estas ? Ĉu necesos distri lin de tiu penso, kiel la komunajn homojn ? Mi ja vidas, ke oni igas homon feliĉa, distrante lin de liaj domaj mizeroj, por plenigi lian tutan penson per la zorgo bone danci. Sed ĉu same pri reĝo ? kaj ĉu li estos pli feliĉa, ligante sin al tiuj vantaj amuzoj, ol al la vido de sia grandeco ? kaj kiun pli kontentigan objekton li povus doni al sia spirito ? Ĉu do ne estus damaĝi lian ĝojon,

okupi lian animon per la penso alĝustigi sian paŝon al la kadenco de ario, aŭ lerte loki stangon, anstataŭ lasi lin ĝui la kontempladon de la majesta gloro, kiu lin ĉirkaŭas? Oni faru la provon ; oni lasu reĝon tute sola, sen ia kontentigo de la sensoj, sen iu zorgo en la spirito, sen kompanioj, pensi pri si en tuta oportuno ; kaj oni vidos, ke reĝo sen malenuigo estas homo plena je mizeroj. Tial oni zorge evitas tion, kaj neniam malestas apud la personoj reĝaj granda nombro da homoj, kiuj diligentas por sekvigi iliajn aferojn per distraĵoj, kaj observas ilian tutan liberan tempon por havigi al ili plezurojn kaj ludojn, tiel ke ne okazu malplena tempo. Tio estas, ke ili estas ĉirkaŭataj de personoj, kiuj mirinde zorgas por atenti, ke la reĝo ne estu sola kaj en stato por pensi pri si, sciante ja, ke li estos mizera, kvankam reĝo, se li pensos pri si.

136. Pli facile estas elporti la morton ne pensante pri ĝi, ol la penson pri la morto ne estante en danĝero.

Malenuigo

137. Oni ŝarĝas la homojn, ekde ilia infaneco, per la zorgo pri ilia honoro, ilia bieno, iliaj amikoj, kaj ankoraŭ pli pri la bieno kaj la honoro de iliaj amikoj ; oni superŝutas ilin per aferoj, per la lernado de lingvoj kaj ekzercoj, kaj oni komprenigas ilin, ke ili ne povus esti feliĉaj, sen ke ilia sano, ilia honoro, ilia fortuno kaj tiu de iliaj amikoj estu en bona stato, kaj ke la manko de unu sola el tiuj aferoj igus ilin malfeliĉaj ; tiel oni donas al ili ŝarĝojn kaj aferojn, kiuj maltrankviligas ilin ekde la tagiĝo. "Jen estas, vi diros, stranga maniero por ilin feliĉigi! Kion pli taŭgan oni povus fari, por ilin malfeliĉigi?" - Kiel ? Kion oni povus fari ? Sufiĉus depreni de ili ĉiujn tiujn zorgojn. Ĉar tiam ili sin vidus ; ili pensus pri tio, kio ili estas, de kie ili venas, kien ili iras ; kaj tial oni ne povas tro okupi kaj deturni ilin, kaj tial, post kiam oni preparis por ili tiom da aferoj, se ili disponas kelkan senokupan tempon, oni konsilas al ili uzi ĝin por distriĝi, ludi kaj sin tutajn okupi.

IX. FILOZOFOJ

141. Ni estas plenaj de aferoj, kiuj ĵetas nin eksteren. Nia instinkto igas nin senti, ke necesas serĉi nian feliĉon ekster ni ; niaj pasioj puŝas nin eksteren ; eĉ se la objektoj ne sin prezentus por ilin eksciti ; - la objektoj el la ekstero tentas nin per si mem kaj vokas nin, eĉ kiam ni ne pensas pri ili. Kaj tial la filozofoj vane diras : "Reeniru en vin mem ; vi tie trovos vian bonon." Oni ne kredas ilin, kaj tiuj, kiuj kredas ilin, estas la plej malplenaj kaj plej malsaĝaj.

X. LA SUVERENA BONO

.....

XI. EN PORT-ROYAL

.....

XII. KOMENCO

150. Ni estas plaĉaj, serĉante ripozon en la kompanio de niaj similuloj, mizeraj kiel ni, senpovaj kiel ni. Ili ne helpus nin ; - oni mortos sola.
Endas do fari, kvazaŭ oni estus sola... Kaj tiam, ĉu oni konstruus belegajn domojn, ktp ? Oni serĉadus la veron senhezite... Kaj se oni tion rifuzas, oni tiel atestas, ke oni pli ŝatas la estimon de la homoj ol la serĉadon de la vero.
-
160. Se oni devas doni ok tagojn el la vivo, oni devas doni cent jarojn.
-
164. La lasta akto estas sanga, kiel ajn bela estas la komedio en la tuta cetero ; oni fine ĵetas teron sur la kapon, kaj jen por ĉiam.
-
165. Ni senzorge kuras en la abismon, post kiam ni metis ion antaŭ ni, por malhelpi nin vidi ĝin.
-

XIII. SUBMETIĜO KAJ UZADO DE LA RACIO

176. Kontraŭdiro estas malbona signo pri vereco*. Pluraj aferoj certaj estas kontraŭdirataj. Pluraj malveraj pasas sen kontraŭdiro. Nek la kontraŭdiro estas signo pri malverece, nek la nekontraŭdiro estas signo pri vereco.
-

XIV. BONECO DE TIU MANIERO PRUVI DION

.....

XV. TRANSIRO DE LA KONO DE L' HOMO AL DIO

La antaŭjuĝo nin erariganta

191. Estas priplorinde, vidi ĉiujn homojn pripensi la rimedojn, ne la celon. Ĉiu pensas, kiel li plenumos sian taskon; sed pri la elekto de la tasko (de la metio), kaj de la patrio, la sorto ĝin donas al ni. Estas kompatinde vidi tiom da Turkoj, da herezuloj, da miskredantoj, sekvi la iradon de siaj patroj, pro tiu sola motivo, ke ĉiu el ili estis instruita, ke ĝi estas la plej bona** ; kaj estas tio, kio determinas ĉiun al ĉiu metio : de seruristo, soldato, kc. Pro tio la sovaĝuloj havas nenion por fari el Provenco***
192. Kial mia konkapablo estas limigita ? Mia staturco ? Mia daŭro je cent jaroj prefere ol je mil ? Kian motivaĵon havis la Naturo por ĝin doni al mi tia, kaj elekti tiun nombron prefere ol alian ; ĉar nenio pli logas ol alio ?
193. Ĉar oni ne povas esti universala, sciante ĉion scieblan pri ĉio, necesas scii iom el ĉio. Ĉar estas multe pli bele, scii ion pri ĉio, ol scii ĉion pri unu afero. Tiu universaleco estas la plej bela. Se oni povus havi la du, des pli bone ; sed se necesas elekti, endas elekti tiun ; kaj la mondo tion scias kaj faras ; ĉar ofte la mondo estas bona juĝanto.

* T.e. : La fakto, ke iu afero estas kontraŭdirata, nenion pruvas por aŭ kontraŭ ĝia vereco.

** Ĉu oni ne povus samon diri pri la kristanoj? (N. de la tr.)

*** Montenoj skribis : "Pere de la kutimo ĉiu estas kontenta pri la loko, en kiu la Naturo plantis lin, kaj la sovaĝuloj el Skotio havas nenion por fari el Turlando, aŭ la Skitoj el Tesalio."

196. Vidante la blindecon kaj la mizeron de la homo, rigardante la tutan universon mutan, kaj homon sen lumo, forlasita al si mem, kaj kvazaŭ perdita en tiu angulo de la universo, ne sciante, kiu lin tien metis, kaj por kion fari li venis, kio li fariĝos mortante, nekapabla pri la scio, mi eniĝas en teruron, kiel homo, kiu estus portita dormante en insulon dezertan kaj timegigan, kaj kiu vekigus sen koni, kie li estas, kaj sen rimedo por eliri. Kaj ĉe tio, mi miras, kiel oni ne eniĝas en malesperon pro tiel mizera stato. Mi vidas apud mi aliajn personojn de simila naturo, mi demandas ilin, ĉu ili estas pli bone instruitaj ol mi ; ili diras, ke ne ; kaj ĉe tio tiuj mizeraj perditoj, rigardinte ĉirkaŭ si, kaj trovinte kelkajn plaĉajn objektojn, donis sin al ili kaj sin ligis al ili. Koncerne min, mi ne povis ligi min, kaj konsiderante, kiel pli verŝajne estas io alia, ol tio, kion mi vidas, mi serĉis, ĉu tiu Dio ne estus lasinta kelkan markon pri si.

Mi vidas plurajn religiojn interkontraŭajn, do falsajn, escepte de unu. Ĉiu volas esti kredata pro sia propra aŭtoritato kaj minacas la nekredantojn. Do mi ne kredas ilin pri tio. Ĉiu povas tion diri. Ĉiu povas diri sin profeto. Sed mi vidas la kristanan, en kiu mi trovas profetaĵojn ; kaj tion fari ne povas ĉiu*.

Misproporcio de la homo

197. La homo do kontemplu la tutan Naturon en ĝia alta kaj plena majesto, li forigu sian vidon de la malaltaj objektoj, kiuj lin ĉirkaŭas, li rigardu tiun brilegan lumon metitan kiel eternan lampon por lumigi la universon, la tero aspektu al li kiel punkto kompare kun la vasta turno, kiun tiu astro trakuras, kaj li miru, ke tiu vasta turno sur si mem estas nur tre delikata pinto, rilate al tiu, kiun ĉirkaŭprenas tiuj astroj, kiuj ruliĝas tra la firmamento. Sed se nia vido tie haltas, la imago transiru. Ĝi pli frue sin lacigos konceptadi ol la Naturo provizadi. Tiu tuta videbla mondo estas nur nevidebla streko en la ampleksa signo de la Naturo. Neniu ideo proksimiĝas al ĝi ; vane ni ŝveligas niajn konceptojn trans la imageblaj spacoj, ni naskas nur

* La aŭtoro sendube aludas pri la profetaĵoj de la Malnova Testamento, kiujn la kristanoj interpretas kiel anoncojn pri Jesu-Kristo. N.de la tr.

atomojn en komparo kun la realo de la aferoj. Ĝi estas infinita sfero, kies centro situas ĉie, kaj la cirkonferenco nenie. Fine, ĝi estas la plej granda sentebbla karaktero de la ĉiopovo de Dio, ke nia imago perdiĝas en tiu penso.

La homo, reveninte al si, konsideru, kio li estas, kompare kun tio, kio estas, li sin rigardu kiel perditan en tiu deturnita angulo de la Naturo kaj, de tiu karcero, en kiu li estas lokita, mi diras la universon, li lernu taksi la teron, la regnojn, la urbojn kaj sin mem je ĝusta prezo. Kio estas homo en la Infinito ?

Sed por prezenti al li alian mirindaĵon tiel mirindan, li serĉu, el liaj konataĵoj, la aferojn plej delikatajn : Cirono* prezentu al li, en la malgrando de sia korpo, partojn nekompareble pli malgrandajn, kruojn kun artikoj, vejnojn en tiuj kruoj, sangon en tiuj vejnoj, humorojn en tiu sango, gutojn en tiuj humoroj, vaporojn en tiuj gutoj ; ankoraŭ dividante tiujn lastajn aferojn, li elĉerpu siajn fortojn en tiuj konceptoj, kaj la lasta objekto, kiun li povas atingi estu nun tiu de nia parolado. Eble li opinios, ke jen estas la ekstrema malgrando de la Naturo.

Mi volas vidigi al li en tio novan abismon. Mi volas pentri ne nur la videblan universon, sed la vastegon, kiun oni povas koncepti de la Naturo en tiu ĉi etega parto de atomo. Li vidu en ĝi infiniton da universo, el kiuj ĉiu havas sian firmamenton, siajn planedojn, sian teron, en sama proporcio kiel en la videbla mondo ; sur tiu tero, animaloj kaj fine cironoj, en kiuj li retrovos tion, kion prezentis la unuaj, kaj trovante ankoraŭ en la aliaj la samon, senfine kaj senripoze.

Li vage perdiĝu en tiuj mirindaĵoj, tiel mirindaj en sia malgrandeco kiel la aliaj per sia vasteco. Ĉar kiu ne admiros, ke nia korpo, kiu iom antaŭe ne estis perceptebla en la universo, mem neperceptebla en la sinĝo de la ĉio, estas nun koloso, sed pliĝuste mondo, aŭ pliĝuste iu ĉio, rilate al la nenio, kiun oni ne povas atingi ?

Kiu tiel konsideros sin, tiu terurigos pri si mem ; kaj konsiderante sin tenata, en la maso al li donita de la

* Klaso de malgrandegaj insektoj, kiuj vivas en faruno kaj fromaĝo.

Naturo, inter tiuj du abismoj de la infinito kaj de la nenio, li tremos en la vido de tiuj mirindaĵoj, kaj mi kredas ke, ĉar la scivolemo ŝanĝiĝos en admiron, li estos pli inklina ilin kontempli en silento ol ilin serĉi kun memfido.

Ĉar finfine, kio estas la homo en la Naturo ? Nenio rilate al infinito, ĉio rilate al nenio, mezo inter nenio kaj ĉio. Infinite for de la kompreno pri la ekstremaĵoj, la fino de la aferoj kaj ilia principo estas por li nevenkeble kaŝitaj en nepenetrebla sekreto.

Egale nekapabla vidi la nenion, de kiu li estas ĉerpita, kaj la infiniton, en kiu li estas englutita, kion do li faras, krom ekvidi kelkan ŝajnon el la mezo de la aferoj, en eterna malespero iam koni ilian principon kaj ilian finon ? Ĉiuj aferoj estas ĉerpitaj el nenio kaj pelitaj ĝis infinito*. Kiu sekvas tiujn mirindajn procezojn ? La aŭtoro de tiuj mirindaĵoj komprenas ilin ; neniu alia tion povas.

Manke kontempli tiujn infinitojn, la homoj temerare iris al serĉado pri la Naturo, kvazaŭ ili havus kelkan proporcion kun ĝi.

Strange, ke ili volis kompreni la principojn de la afero, kaj tra tiu vojo atingi konon pri ĉio, pri memfido tiel infinita, kiel ilia objekto. Ĉar estas eksterdube, ke oni ne povas formi tian intencon sen memfido aŭ kapablo infinita, kiel la Naturo.

Kiam oni estas instruita, oni komprenas, ke, ĉar la Naturo stampis sian bildon kaj tiun de sia aŭtoro en ĉiuj aferoj, ili preskaŭ ĉiuj partoprenas en ĝia duobla infiniteco. Tiel ni vidas, ke ĉiuj sciencoj estas infinitaj en la amplekso de siaj serĉadoj. Ĉar kiu dubas, ke la geometrio, ekzemple, havas infiniton da infinitoj da propozicioj por prezenti ? Ili estas same infinitaj en la multego kaj la delikateco de siaj principoj. Ĉar kiu ne vidas, ke tiuj, kiujn oni proponas kiel lastajn, ne sin subtenas per si mem, kaj estas apogitaj sur aliaj, kiuj, havante aliajn kiel apogon, neniam akceptas lastan ? Sed ni faras lastaj tiujn, kiuj tiaj ŝajnas al la racio, kiel en la materiaj aferoj, en kiuj ni nomas nedividebla

* Ĉu la genio de Paskalo antaŭvidis la modernajn teoriojn pri la "origina "big bang" kaj la ekspansio de la universo ?

punkto tiun, trans kiu niaj sensoj perceptas nenion plu, kvankam per sia naturo ĝi estas senfine dividebla. El tiuj du infinitoj de sciencoj, tiu de grandeco estas multe pli sentebla, kaj tial malmultaj personoj pretendis pritrakti ĉiujn aferojn. "Mi parolos pri ĉio" diris Demokrito.

Sed la infinito en malgrando estas tre malpli videbla ; la filozofoj ja pretendis ĝin atingi, kaj tie ili ĉiuj stumblis. Estas tio, kio okazigis tiel ordinarajn titolojn : "Pri la principoj de la aferoj", "Pri la principoj de la filozofio*" kaj al similaj, tiel orgojlaj fakte, kvankam ŝajne malpli, kiel tiu alia, kiu krevigas la okulojn : "De omni scibili"***.

Oni sin kredas nature multe pli kapabla atingi la centron de la aferoj ol ilian cirkonferencon kaj la videbla amplekso de la mondo videble transpasas nin ; sed, tial ke ni transpasas la malgrandajn aferojn, ni kredas nin pli kapablaj ilin posedi ; kaj tamen, necesas ne malpli da kapablo por iri ĝis nenio ol por iri ĝis ĉio ; necesas, ke ĝi estu infinita por unu kaj la alia ; kaj al mi ŝajnas, ke, kiu estus kompreninta la lastajn principojn de la aferoj, tiu povus ankaŭ atingi la konon de la infinito ; unu dependas de la alia, kaj unu kondukas al la alia ; tiuj ekstremaĵoj intertuŝiĝas kaj sin kunigas, tiom pli, ke ili estas malproksimaj***, kaj sin retrovas en Dio, kaj nur en Dio.

Ni do ekkonu nian kapablon. Ni estas io, kaj ne estas ĉio ; kiom da esto ni havas, tio kaŝas al ni la konon de la unuaj principoj, kiuj naskiĝas el nenio, kaj la malmulto da esto, kiun ni havas, kaŝas al ni la vidon de la infinito.

Nia inteligento tenas en la ordo de la kompreneblaj aferoj, la saman rangon kiel nia korpo en la amplekso de la Naturo.

Limigita en ĉiuj manieroj, tiu stato meza inter du ekstremoj troviĝas en ĉiuj niaj povoj. Niaj sensoj perceptas nenion ekstreman ; tro da bruo nin surdigas ; tro da lumo blindigas ; tro da distanco kaj tro da proksimo malhelpas la vidon ; tro da longo kaj tro da mallongo de parolado malklarigas ĝin ; tro da vero nin mirigas ;

* Titolo de latina verko de Kartezio aperinta en 1644.

** "De omni re scibili". Pri ĉiuj scieblaj aferoj. Piko de la Mirandolo (1463-1494), vetis pritrakti ĉiujn temojn kaj diskuti kun kiu ajn pri ĉio sciebla. *** Tiu nocio estas evidente konfuza en la penso de Paskalo. Eble ĝi preciziĝis en la ne-eŭklida geometrio de Riemann kaj en la kosma kvardimensia "kurba" spaco-tempo laŭ Ejnstejn.

la unuaj principoj estas tro evidentaj por ni ; tro da plezuro maloportunigas ; tro da sonsimilo malplaĉas en muziko ; kaj tro da bonfaroj incitas, ni volas havi sufiĉe por superrepagi la ŝuldon : "Beneficia eo usque laeta sunt, dum videntur exsolvi posse ; ubi multum antevenere, pro gratia odium redditur"* ; ni sentas nek la ekstreman varmon nek la ekstreman malvarmon ; la ekscesaj ecoj estas al ni malamikaj kaj ne senteblaj ; ni ne plu sentas ilin, ni suferas ilin ; tro da juneco kaj tro da maljuneco malhelpas la spiriton ; tro kaj tro malmulte da instruiteco.

Fine la ekstremaĵoj estas por ni, kvazaŭ ili ne estus, kaj ni ne estas rilate al ili : ili eskapas de ni, aŭ ni de ili.

Jen estas nia vera stato. Tio igas nin nekapablaj scii certe kaj nescii absolute. Ni naĝas sur vasta medio, ĉiam necertaj kaj dubantaj, pelataj de unu ekstremaĵo al alia ; kiu ajn termo, ĉe kiu ni kredis ligi kaj firmigi nin, moviĝas kaj nin lasas, kaj se ni sekvas ĝin, ĝi eskapas el niaj kaptaj, glitas kaj fuĝas en eterna fuĝado. Nenio haltas por ni. Tio estas la stato al ni natura, kaj tamen la plej mala al nia inklino ; ni brulas pro la deziro trovi firman sidon, kaj lastan bazon konstantan por starigi sur ĝi turon, kiu altiĝu ĝis la infinito ; sed tuta nia fundamento krakas, kaj la tero malfermiĝas ĝis la abismoj.

Ni do ne serĉu certecon kaj firmecon ; nia racio estas ĉiam elrevigita pro la malkonstanteco de la ŝajnoj ; do nenio povas fiksi la finiton inter la du infinitoj, kiuj ĝin enfermas kaj el ĝi fuĝas.

Tion bone kompreninte, mi kredas, ke oni sin tenos en ripozo, ĉiu en la stato, en kiu la Naturo lin lokis. Ĉar tiu mezo, kiu estas al ni donita kiel parto, estas ĉiam fora de la du ekstremaĵoj, kiel grave, se iu alia havas iom pli da kompreno pri la aferoj ? Se li havas, li prenas ilin iom pli alte. Ĉu li ne estas ĉiam infinite for de la ekstremo ? kaj ĉu la daŭro de nia vivo ne estas egale infinite for de la eterneco, se eĉ ĝi daŭras dek jarojn pli ? Ĉe la vido de tiuj infinitoj, ĉiuj finitoj

* Montenjo citis tiun frazon de Tacito, pri la malpravo de Tiberio, perdita pro sia troa malavareco : (la bonfaroj estas agrablaj en la limo, en kiu la ŝuldanfo kredas, ke li povos repagi sian ŝuldon ; kiam ili estas tro grandaj la dankemo ŝanĝiĝas al malamo).

estas egalaj, kaj mi ne vidas motivon por sidigi sian imagon sur unu el ili prefere ol sur iu alia.

La sola komparo de ni al finito nin ĉagrenas (dum la komparo de ni al infinito montras, ke ĉiuj finitoj estas egalaj, kaj konsekvence nin konsolas).

Se la homo unue pristudus sin mem, li vidus, kiel nekapabla li estas pasi transen. Kiel parto povus koni la tuton ? Sed eble li aspiras koni almenaŭ la partojn, kun kiuj li havas proporciojn ? Sed ĉiuj partoj de la mondo havas tian rilaton kaj tian kunligon unu kun alia, ke mi kredas neeble koni unu sen alia kaj sen la tuto.

La homo, por ekzemplo, estas en rilato kun ĉio, kion li konas. Li bezonas lokon por lin enteni, tempon por daŭri, movon por vivi, elementojn por lin konsistigi, varmon kaj manĝaĵojn por sin nutri, aeron por spiri. Li vidas la lumon ; li palpe sentas la korpojn ; fine, ĉio trafas en ligon kun li. Do necesas, por koni la homon, scii, kial li bezonas aeron por pluvivi ; kaj, por koni la aeron, scii, kial ĝi havas tiun rilaton kun la vivo de la homo, ktp.

Do, ĉar ĉiuj aferoj estas kaŭzataj kaj kaŭzantaj, helpataj kaj helpantaj, pere kaj senpere, kaj ĉar ĉiuj sin konservas per natura kaj nesentebla ligilo, kiu kunligas la plej malproksimajn kaj la plej malsimilajn, mi opinias neeble koni la partojn sen koni la tuton, kaj koni la tuton sen koni aparte la partojn.

Kaj kio finplenigas nian senpovecon por koni la aferojn, tio estas, ke ili estas simplaj en si mem, kaj ni estas konsistantaj el du interkontraŭaj kaj diversaj naturoj : el animo kaj el korpo. Ĉar ne eblas, ke la parto en ni, kiu rezonas, estu alia ol spirita ; kaj kiam oni pretendus, ke ni estas nur korpaj, tio ankoraŭ pli ekskluzivus nin el la konkapablo pri la aferoj, ĉar nenio estas pli nekonceptebla ol diri, ke la materio sin mem konas ; ne eblas al ni koni, kiel ĝi sin konus.

Kaj tiel, se ni estas simplaj materiaj, ni povas nenion koni ; kaj se ni konsistas el spirito kaj materio, ni ne povas perfekte koni la aferojn simplajn, aŭ spiritajn aŭ materiajn.

De tio venas, ke preskaŭ ĉiuj filozofoj konfuzas la ideojn kaj la aĵojn, kaj parolas pri la korpaj aferoj spirite, kaj pri la spiritaj korpe, ĉar ili diras sentime, ke la korpoj inklinas malalten, ke ili aspiras al sia

centro, ke ili fuĝas sian detruon, ke ili timas la vakuon, ke ili havas emojn, simpatiojn, antipatiojn, kiuj apartenas nur al la spiritoj ; kaj, parolante pri la spiritoj, ili rigardas ilin kiel sidantajn en unu loko, kaj atribuas al ili moviĝon de unu loko al alia, kio estas aferoj apartenantaj nur al korpoj.

Anstataŭ ricevi la ideojn de tiuj puraj aferoj, ni farbas ilin per niaj ecoj, kaj stampas laŭ nia kompleksa esto ĉiujn simplajn aferojn, kiujn ni kontemplas.

Kiu ne kredus, vidante nin kunmeti ĉiujn aferojn el spirito kaj korpo, ke tiu miksaĵo estus al ni tre komprenebla ? Tamen ĝi estas la afero malplej komprenata ; la homo estas por si mem la plej mirinda objekto en la Naturo ; ĉar li ne povas koncepti, kio estas korpo, kaj ankoraŭ malpli, kio estas spirito ; kaj malpli ol ion ajn, kiel korpo povas esti unuigita kun spirito. Tio estas la plejo el liaj malfacilaĵoj, kaj tamen ĝi estas lia propra esto. "Modus quo corporibus adhaerent spiritus comprehendendi non potest, et hoc tamen homo est"*.

Fine, por finplenigi la pruvon de nia malforto, mi finos per jenaj du konsideroj.

198. La homo estas nur kano, la plej malforta el la Naturo ; sed li estas kano pensanta. Ne necesas, ke la tuta universo sin armu por lin premegegi ; vaporo, akvoguto sufiĉas por lin mortigi. Sed, se eĉ la universo lin premegegu, la homo estus ankoraŭ pli nobla ol tio, kio lin mortigas, ĉar li scias, ke li mortas, kaj la avantaĝo, kiun la universo havas super li, la universo scias neniom pri ĝi.

Do nia tuta digno konsistas el la penso. Per tio endas nin relevi, kaj ne per la spaco kaj la daŭro, kiujn ni ne povus plenigi. Ni do strebu bone pensi : jen estas la principo de la moralo.

199. La eterna silento de tiuj infinitaj spacoj min teruras.

200. Konsoligu : ne de vi vi devas ĝin atendi, sed male, nenion atendente de vi vi devas ĝin atendi.

XVI. FALSECO DE LA ALIAJ RELIGIOJ

.....

* La maniero, en kiu la spiritoj estas unuigitaj al la korpoj estas nekomprenebla por la homoj, kaj tamen tio estas la homo. (Sta Aŭgusteno, citita de Monteno).

XVII. IGI LA RELIGION AMINDA

.....

XVIII. FUNDAMENTO DE LA RELIGIO
KAJ REBATO AL OBJĖTOJ

.....

XIX. KE LA LEĜO* ESTIS FIGURA

.....

257. Portreto kunportas foreston kaj ĉeeston, plezuron kaj malplezuron ; la realo ekskluzivas foreston kaj malplezuron.

.....

XX. RABENISMO

.....

XXI. ĈIAMECO

.....

XXII. PRUVOJ DE MOSEO**

.....

XXIII. PRUVOJ DE JESU-KRISTO***

.....

XXIV. PROFETOJ

.....

XXV. APARTAJ FIGUROJ

.....

XXVI. KRISTANA MORALO

.....

364. Du specoj de homoj en ĉiu religio : superstiĉo, deziro.

.....

Membroj

Komenci per tio

366. Por reguli la amon, kiun oni ŝuldas al si mem, necesas imagi korpon plenan de pensantaj membroj, ĉar ni estas membroj de la tuto, kaj vidi, kiel ĉiu membro devus ami sin, ktp.

.....

* Temas pri la leĝo de la Hebreoj. ** T.e. : en la kvin unuaj libroj de la Biblio (la Pentateŭko) atribuitaj al Moeso kiel verkinto. *** T.e. : pri la sankteco kaj dieco de Jesuo.

368. Por fari, ke la membroj estu feliĉaj, necesas, ke ili havu volon, kaj ke ili konformigu ĝin al la korpo.

372. Se la piedoj kaj la manoj havus apartan volon, neniam ili estus en sia ordo, krom submetante tiun apartan volon al la volo unua, kiu regas la tutan korpon. Ekster tio, ili estas en malordo kaj en malfeliĉo ; sed volante nur la bonon de la korpo, ili faras sian propran bonon*.

XXVII. KONKLUDOJ

FRAKCIO II

Fragmentoj ne klasitaj

410. Tiu interna milito de la racio kontraŭ la pasioj kaŭzis, ke tiuj, kiuj volis havi la pacon, dividiĝis je du sektoj : unuj volis rezigni la pasiojn kaj fariĝi dioj ; aliaj volis rezigni la racion kaj fariĝi brutaj bestoj. Sed nek unuj nek la aliaj povis, kaj ĉiam restas la racio, kiu akuzas la malaltecon kaj la maljuston de la pasioj, kaj konfuzas la ripozon de tiuj, kiuj sin allasas al ili, kaj la pasioj estas ĉiam vivaj en tiuj, kiuj volas ilin rezigni.

Grandeco de la homo

411. Ni havas tiel grandan ideon pri la animo de la homo, ke ni ne povas konsenti esti de ĝi malŝatataj, - kaj ne esti en la estimo de iu animo ; kaj la tuta feliĉo de la homoj konsistas el tiu estimo.

412. La homoj estas tiel - necese - frenezaj, ke estas esti freneza, per alia formo de frenezo, ne esti freneza.

413. Kiu volos plene koni la vantecon de la homo, tiu nur konsideru la kaŭzon kaj la efikojn de la amo. La kaŭzo estas "mi-ne-scias-kio", Kornelio**, kaj ĝiaj efikoj

* En tiuj lastaj paragrafoj kompreneble Paskalo komparas Dion al la korpo, kies membroj estas la homoj. Eble oni povas apliki tiun komparon al la homaro. N.de la tr. ** Kornelio, en Medea (1635): Ofte "mi-ne-scias-kio" ne esprimebla / Nin surprizas, forprenas, kaj trudas ami - en Rodoguna (1645) : la animoj sin ligas unu al alia kaj sin lasas piki per tiuj "mi-ne-scias-kio" neeksplikebla. La modo de tiu esprimo venas de la Italoj. Ankaŭ la antikvaj Latinaj diris : nescio quid.

estas teruraj. Tiu "mi-ne-scias-kio", tiel eta, ke oni ne povas ĝin koni, movas la tutan teron, la princojn, la armeojn, la tutan mondon.

La nazo de Kleopatra, se ĝi estus estinta malpli longa, la tuta vizaĝo de la tero estus ŝanĝita.

Mizero

414. La sola afero, kiu nin konsolas de niaj mizeroj estas la malenuigo kaj tamen ĝi estas la plej granda el niaj mizeroj ; ĉar estas tio, kio precipe malhelpas nin pensi pri ni, kaj igas nin nesenteblye perdiĝi. Sen tio ni estus en enuo, kaj tiu enuo pelus nin serĉi pli firman rimedon por eliri el ĝi ; sed la malenuigo nin amuzas, kaj venigas nin sensente al la morto.

Agitado

415. Kiam soldato plendas pro sia penado, aŭ plugisto, kc, oni metu ilin al nenifarado.
-

Infinito - Nenio

418. Nia animo estas ĵetita en la korpon, en kiu ĝi trovas nombron, tempon, dimensiojn ; ĝi rezonas pri tio, kaj nomas tion naturo, neceso, kaj ne povas kredi ion alian. Unuo aldonita al infinito neniom pligrandigas ĝin, nek futo al mezuro infinita ; finito neniigas fronte al infinito, kaj fariĝas pura nenio.
-

Ni scias, ke ekzistas infinito, kaj nescias pri ĝia naturo : samkiel ni scias, ke estas malvere, ke la nombroj estas finitaj ; do estas vere, ke ekzistas infinito en nombro. Estas malvere, ke ĝi estus para ; estas malvere, ke ĝi estus nepara ; ĉar, se oni aldonas unu, ĝi ne ŝanĝiĝas je naturo ; tamen ĝi estas nombro, kaj ĉiu nombro estas para aŭ nepara. Estas vere, ke tio ja koncernas ĉiun finitan nombron.

.....

Ni do konas la ekziston de la naturo de finito, tial ke ni estas finitaj kaj spacaj kiel ĝi.

Ni konas la ekziston de infinito kaj nescias pri ĝia naturo, tial ke ĝi havas spacan kiel ni, sed ne limojn kiel ni.

(Sekvas la fama diskutado pri la veto. Oni estas devigata veti aŭ por aŭ kontraŭ la ekzisto de Dio. Se oni vetis por, kaj oni malgajnis, oni ~~parolas~~ nenion ; sed se oni gajnis, oni gajnas eternan vivon kaj feliĉon. Do oni ne povas heziti. Kaj Paskalo konkludas jene :)

Fino de tiu parolado

Nu, kia malbono okazos al vi, se vi faros tiun veton ? Vi estos fidela, honesta, humila, dankema, bonfara, amika, sincera, vera... Je vero, vi ne estos en venenaj plezuroj, en gloro, en delicoj ; sed ĉu vi ne havos aliajn (plezurojn) ?

Mi diras al vi, ke vi gajnos en tiu ĉi vivo, kaj ke en ĉiu paŝo, kiun vi faros en tiu vojo, vi vidos tiom da certeco pro gajno, kaj tiom da nenieco en tio, kion vi hazardas, ke fine vi konos, ke vi vetis por afero certa, infinita, por kio vi nenion fordonis.

.....

424. La koro havas siajn motivojn, kiujn ne konas la racio ; tion oni scias pri mil aferoj.

Mi diras, ke la koro amas la universalan eston nature, kaj sin mem nature ; laŭ tio, ĉu ĝi sin donas al tio ; kaj ĝi hardiĝas kontraŭ unu aŭ la alia, laŭ sia elekto. Vi forĵetis unu kaj konservis la alian. Ĉu pro racio vi amas vin ?

425. Oni havas multan dankoŝuldon al tiuj, kiuj avertas pri la difektoj, ĉar ili humiligas. Ili sciigas, ke oni estis malŝatata ; ili ne malhelpas, ke oni estu poste malŝatata ; ĉar oni havas ankoraŭ multajn aliajn difektojn por tion pravigi. Ili preparas la ekzercadon de korekto, kaj la seniĝon de unu difekto.

.....

429.

"Mi ne scias, ili diras, kiu metis min en la mondon, kio estas la mondo kaj mi mem ; mi estas do en terura nescio pri ĉiuj aferoj ; mi ne scias, kio estas mia korpo, kio miaj pensoj, kio mia animo kaj tiu parto mem de mi, kiu pensas tion, kion mi diras, kiu ripensas ĉion kaj min mem, kaj ne konas sin pli ol la ceteron. Mi vidas tiujn teruregajn spacojn de la universo, kiuj enfermas min kaj mi trovas min ligita al unu korpo el tiu vastega spaco, sen scii, kial mi estas situanta en tiu ĉi loko prefere ol en alia, kaj kial tiu mallonga tempo al mi donita por vivi, estas fiksita je tiu

punkto prefere ol je alia en la tuta eterneco, kiu antaŭis min, kaj en la tuta, kiu min sekvos. Mi vidas ĉiuflanke nur infinitojn, kiuj enfermas min kiel atomon kaj kiel ombron, kiu daŭras nur unu momenton sen ebla reveno. Ĉio, kion mi konas, estas, ke mi estas baldaŭ mortonta, sed kion mi plej nescias, tio estas tiu morto mem, kiun mi ne scipovus eviti. Kiel mi ne scias, de kie mi venas, mi ankaŭ ne scias, kien mi iras ; kaj mi scias nur, ke, elirante el tiu ĉi mondo, mi falas por ĉiam aŭ en la nenion, aŭ en la manojn de incitita Dio, sen scii, en kiu el tiuj du kondiĉoj mi estos eterne destinita. Jen estas mia stato, plena je malforto kaj malcerto. Kaj de ĉio ĉi mi konkludas, ke mi devas pasigi ĉiujn tagojn de mia vivo sen serĉi, kio estas al mi okazonta. Eble mi povus trovi kelkan klarigon en miaj duboj ; sed mi ne volas peni por tio nek fari paŝon por ĝin serĉi, kaj poste, traktante per malŝato tiujn, kiuj strebados pri tiu zorgo, mi volas senantaŭvide kaj sentime iri renkonte al tiel granda okazo, kaj lasi min mole konduki al la morto, en la necerteco pri la eterno de mia estonta kondiĉo."

(Supozinte tiajn vortojn el la buŝo de nekredanto, Paskalo daŭrigas jene :)

Kiu dezirus havi kiel amikon homon parolantan tiel ? kiu elektus lin inter la aliaj por komuniki al li siajn aferojn ? kiu sin turnus al li en siaj afliktoj ? kaj fine, al kia uzo de la vivo oni povus destini lin ?

Vere, estas glorie al la religio, ke ĝi havas kiel malamikojn tiel malprudentajn homojn, kaj ilia opozicio estas al ĝi tiel malmulte danĝera, ke male ĝi utilas al la starigo de ĝiaj veroj ; ĉar la kristana kredo iras preskaŭ nur al la starigo de du jenaj aferoj : la putreco de la naturo kaj la reaĉeto per Jesu-Kristo ; kaj mi asertas ke, se ili ne servas por montri la verecon de la reaĉeto per la sankteco de siaj moroj, ili almenaŭ servas admirinde por montri la putrecon de la naturo per tiel denaturigitaj sentoj.

Nenio estas tiel grava por la homo ol lia stato, nenio estas al li pli timinda ol la eterneco ; tial, ke troviĝas homoj indiferentaj al la perdo de sia esto kaj al la danĝero de eterneco el mizeroj, tio ne estas natura ; ili estas tute aliaj rilate al ĉiuj aliaj aferoj ; ili timas eĉ la plej malgravajn, ili antaŭvidas, antaŭsentas ilin ;

kaj tiu sama homo, kiu pasigas tiom da tagoj kaj noktoj en kolerego kaj en malespero pro la perdo de ofico aŭ pro iu imagita ofendo al lia honoro, estas tiu mem, kiu scias, ke li estas ĉion perdonta per la morto, sen maltrankvilo kaj sen emocio. Estas monstra afero, vidi en sama koro kaj en sama tempo tiun sentemon pri la plej etaj aferoj kaj tiun strangan nesentemon pri la plej grandaj.

.....

430. "Jen estas, kion mi vidas, kaj kio min konfuzas. Mi rigardas ĉiuflanken, kaj mi vidas ĉie nur mallumon. La naturo prezentas al mi nenion, kio ne estus objekto de dubo kaj maltrankvilo. Se mi vidus nenion, kio signus Diaĵon, mi determinus min por neado. Se mi vidus ĉie la signojn de kreinto, mi pace ripozus en la kredo. Sed vidante tro multe por nei kaj tro malmulte por min certigi, mi estas en kompatinda stato, en kiu mi centfoje deziris, ke se iu Dio ĝin subtenas, ĝi senambigue ĝin marku ; kaj ke, se la signoj, kiujn ĝi donas (pri la ekzisto de Dio), estas trompaj, ĝi tute forigu ilin ; ĝi diru ĉion aŭ nenion, por ke mi vidu, kiun opinion mi adoptu. Male, en la stato, en kiu mi estas, nescianta pri tio, kio mi estas, kaj kion mi devas fari, mi konas nek mian kondiĉon nek mian devon. Mia koro tute sopiras scii, kie estas la vera bono, por ĝin sekvi ; nenio estus al mi tro multekosta por akiri la eternecon. Mi envias tiujn, kiujn mi vidas en la kredo, vivi tiel neglekteme, kaj tiel misuzi donon, el kiu, al mi ŝajnas, mi farus tiel diferencon uzon."

(En tiuj du lastaj paragrafoj Paskalo citis parolojn de imagataj mal-kredantoj. En 429, temas pri aroganta ateisto - sed la aŭtoro supozas, ke lia senkredeco ne estas tute sincera, kaj ke li sin ŝajnigas tia pro vantemo, por konformiĝi al modo. En 430, temas pri skeptikulo, kiu bedaŭras esti en nescio kaj dubo, kaj ĝemante serĉas deziran kredon.)

.....

431. Neniu alia konis, ke la homo estas la plej bonega kreito. Unuj, kiuj bone konis la realecon de lia bonego, prenis por malkuraĝon kaj por maldankemon la malnoblajn sentojn, kiujn la homoj nature havas pri si mem, kaj la aliaj, kiuj bone konis, kiom tiu malnobleco estas efektiva, traktis kiel ridindan superbon tiujn sentojn

pri grandeco, kiuj ankaŭ estas naturaj en la homo.

"Levu viajn okulojn al Dio" diras la unuj. "Vidu tiun, kiun vi similas, kaj kiu vin faris por adori lin. Vi povas igi vin similaj al li ; la Saĝo egaligos vin al li, se vi volas ĝin sekvi.

"Altigu la kapon, homoj liberaj" diras Epikteto.

Kaj la aliaj diras al li : "Klinu la okulojn al la tero, vi malfortika vermo, kaj rigardu la bestojn, kies kompano vi estas."

"Kio do fariĝos la homo ? Ĉu li estos simila al Dio, ĉu al la bestoj ? Kia timegiga distanco ! Kio do ni estos ? Kiu ne vidas per ĉio ĉi, ke la homo estas erarvaganta, ke li falis de sia loko, ke li ĝin serĉadas kun maltrankvilo, ke li ne povas plu retrovi ĝin. Kaj kiu do turnos lin al ĝi ? La plej grandaj homoj ne povis.

.....
434. Oni imagu nombron da homoj en katenoj, kaj ĉiuj kondamnitaj al morto, kaj, ĉar ĉiutage kelkaj estas buĉataj ĉe vido de la aliaj, la restantoj vidas sian propran destinon en tiu de siaj similuloj, kaj, rigardante unu la aliajn kun doloro kaj sen espero, atendas sian vicon. Tio estas bildo pri la kondiĉaro de la homoj.

435. Oni ne estas mizera sen sento. Ne tia estas ruinigita domo. Nur la homo estas mizera. "Ego vir videns..."
.....

451. Kia diferenco inter unu kaj alia libro !

Mi ne miras, ke la Grekoj verkis la Iliadon, nek la Egiptoj kaj la Ĉinoj siajn historiojn.

Sufiĉas vidi, kiel tio naskiĝis. Tiuj fabelaj historiistoj ne estas samtempuloj de la faktoj, pri kiuj ili verkis. Homero faris romanon, kiun li donis kiel tian, kaj kiu estas ricevita kiel tia ; ĉar neniu ne dubis, ke Trojo kaj Agamemnono ne ekzistis pli ol la Ora Pomo**. Cetere li ne opiniis verki historion, sed nur malenuigon ; li estis la sola verkanta en sia tempo ; la beleco de la verko igas ĝin daŭri ; ĉiu ĝin lernas kaj parolas pri ĝi ; necesas ĝin scii, ĉiu scias ĝin parkere. Kvarcent jarojn

* Mi estas la homo vidanta (sian mizeron) (Jeremio, Lamentadoj)

** Verŝajne, pli freŝdate estis eltrovitaj la ruinoj de Trojo kaj de la palaco de Agamemnono en Mikeno. N. de la tr.

poste, la vidintoj de tiuj aferoj ne vivas plu ; neniu plu scias per propra kono, ĉu ĝi estas vero aŭ febro aŭ historio ; oni nur lernis ĝinde siaj prapatroj, kaj tio povas esti rigardata kiel vera.

Ĉiu historio ne samtempa estas suspektinda ; ankaŭ la libroj de la Sibiloj* kaj de Trismegisto*, kaj tiom da aliaj, kiuj ĝuis kredon en la mondo, estas falsaj, kaj troviĝas falsaj en la sekvo de la tempoj. Ne same estas pri la samtempaj aŭtoroj**.

Estas granda diferenco inter libro verkita de unuopulo, kaj de li jetita en la popolon, kaj libro farita de popolo mem. Oni ne povas dubi, ke la libro estas tiel antikva kiel la popolo mem***.

.....
(La tuta sekvo de la Frakcio II konsistas el citaĵoj el la Biblio, kun komentoj de la aŭtoro, kiu per ili pravigas la kristanan religion)

Fino de la unua parto.

* Orakoloj en grekaj versoj de la sibilo de Eritreo, konservitaj de la Romanoj en la kelo de la templo de Jupitero Kapitola. Post ilia detruo per bruligo, nova kolekto estis konservita en la templo de Apollo. Hermes Trismegita, aŭtoro laŭ la Grekoj de 42 libroj konservitaj de la egiptaj pastroj, kaj el kiuj ili posedis 14 en greka lingvo.

** 1. Sed ĉu valida historio ne necesigas ian tempan distancon en la rigardo ? 2. Ŝajnas, ke ankaŭ la kvar Evangelioj ne estis verkitaj de samtempuloj de Jesuo. N. de la tr.

*** Temas pri la hebrea Biblio. Sed ĉu ne samo estus direbla pri la antikvaj libroj hindaj aŭ ĉinaj ? N. de la tr. 55

DUA PARTO

FRAKCIO I

Personaj meditoj
Malnetaĵoj
Deprenitaj pensoj

(Tiu tuta frakcio konsistas aŭ el puraj religiaĵoj, aŭ el teologiaj kaj politikaj diskutoj kontraŭ la Jezuitoj)

FRAKCIO II

Fragmentoj diversaj
Miksaĵoj

569. Maski la naturon kaj alivesti ĝin. Ne plu "reĝo", "papo" "episkopo", sed "Aŭgusta Monarko" ; ne "Parizo" (sed "Ĉefurbo de l' Regno", ktp. Estas lokoj, en kiuj endas nomi Parizon "Parizo", aliaj, en kiuj endas nomi ĝin "Ĉefurbo de l' Regno".

Laŭmezure, ke oni havas pli da sprito, oni trovas pli da homoj originalaj. La ordinaraj homoj trovas neniom da diferenco inter la homoj.

Diversaj specoj de rekta kompreno ; iuj en certa ordo de aferoj, kaj ne en la aliaj ordoj, en kiuj ili fantaziegas. Iuj bone eltiras la konsekvencojn de aferoj, en kiuj estas multe da principoj.

Por ekzemplo, iuj bone komprenas la efikojn de la akvo, en kiu estas malmulte da principoj ; sed ties konsekvencoj estas tiel delikataj, ke nur ekstrema rekteco de menso povas iri ĝis ili. Kaj tiuj eble ne estus tial grandaj geometroj, ĉar la geometrio enhavas grandan nombron da principoj, kaj ia naturo de iu menso povas esti tia, ke ĝi povas bone penetri malmulte da principoj, kaj neniel povas penetri la aferojn, en kiuj estas multe da principoj.

Ekzistas do du specoj de mensoj : unu, por penetri rapide kaj profunde la konsekvencojn de la principoj, kaj tio estas la ĝusta menso ; la alia, por kompreni grandan nombron da principoj sen ilin konfuzi, kaj tio estas la

geometrieca menso. Unu estas forta kaj rekteca ; la alia estas mensa amplekso. Nu, unu ja povas esti sen la alia, ĉar la menso povas esti forta kaj mallarĝa, kaj povas ankaŭ esti ampleksa kaj malforta.

Diferenco inter la menso geometrieca
kaj la menso fajneca

570. En unu la principoj estas palpeblaj, sed malproksimaj de la ordinara uzado ; tiel, ke oni malfacile turnas la kapon al tiu flanko, pro manko je kutimo ; sed, se nur oni turnas ĝin, oni plene vidas la principojn ; kaj necesas havi la menson tute falsan por malĝuste rezoni pri principoj tiel dikaj, ke estas preskaŭ neeble, ke ili estu nevidataj.

Sed en la menso de fajneco, la principoj estas en la komuna uzado kaj antaŭ ĉies okuloj. Oni neniel bezonas turni la kapon nek perforti sin ; necesas nur havi bonan vidkapablon, sed necesas havi ĝin bona, ĉar la principoj estas tiel delikataj kaj tiel multaj*, ke estas preskaŭ neeble, ke ne eskapu kelkaj el ili. Nu, la forlaso de unu principo kondukas al eraro ; tiel, necesas havi la vidkapablon tre neta por vidi ĉiujn principojn, kaj poste la menson ĝusta por ne false rezoni pri konataj principoj. Do la geometroj estus fajnaj, se ili havus la vidkapablon bona, ĉar ili ne false rezonas pri principoj de ili konataj ; kaj la fajnamensaj estus geometroj, se ili povus fleksi sian vidon al la nekutimaj principoj de geometrio. Kial do certaj fajnmensuloj ne estas geometroj, estas tial, ke ili tute ne povas turni sin al la principoj de geometrio ; sed kial iuj geometroj ne estas fajnaj, estas tial, ke ili ne vidas tion, kio estas antaŭ ili, kaj ke, estante kutimigitaj al la principoj netaj kaj maldelikataj de geometrio, ili rezonas nur, post kiam ili bone vidis kaj manipulis siajn principojn ; ili perdiĝas en la fajnaj aferoj, en kiuj la principoj ne lasas sin tiel manipuli. Oni malfacile vidas ilin, oni sentas ilin plivere ol oni vidas ilin, kaj oni bezonas infinite peni por sentigi ilin al tiuj, kiuj ne sentas ilin per si mem. Ili estas aferoj tiel delikataj kaj tiel multaj, ke necesas sento tre delikata kaj tre neta por ilin senti, kaj juĝi rekte kaj ĝuste laŭ tiu sento, plej

* Tio ŝajnas kontraŭdira, kun la kvara alineo de 569. Sed, se oni bone pripensas, neestas vere kontraŭdiro.

N. de la tr.

ofte sen povi ilin demonstri laŭorde kiel en geometrio ; ĉar oni ne tiel posedas iliajn principojn, kaj estus infinita afero tion entrepreni. Necesas vidi la aferon subite, per unu sola rigardo, kaj ne per grade progresata rezonado, - almenaŭ ĝis iu grado. Kaj tial malofte, la geometroj estas fajnaj, kaj la fajnuloj estas geometroj, tial ke la geometroj volas pritrakti geometrie la aferojn fajnajn, kaj igas sin ridindaj, volante komenci per la difinoj kaj poste per la principoj : kio ne estas la agmaniero en tiu speco de rezonado. Ne tial, ke la menso ne faras ĝin ; sed ĝi faras ĝin silente, nature kaj senarte ; ĉar la esprimo transpasas ĉiujn homojn, kaj la sento apartenas nur al malmultaj homoj.

Kaj la fajnaj mensoj, male, tiel kutimiĝintaj juĝi per unu sola ekvido, estas tiel mirigataj, kiam oni prezentas al ili propoziciojn, en kiuj ili nenion komprenas, kaj en kiuj, por eniri, necesas pasi tra difinoj kaj principoj tiel sterilaj, kiujn ili ne kutimis vidi tiel detale, ke ili senkuraĝiĝas kaj naŭziĝas.

- Sed la falsaj mensoj neniam estas fajnaj nek geometriaj.

La geometroj - kiuj estas nur geometroj - havas do la mensorekta, sed nur se oni bone klarigas ĉiujn aferojn per difinoj kaj principoj ; alie ili estas falsaj kaj neelporteblaj, ĉar ili estas rektaj nur ĉe bone starigitaj principoj.

Kaj la fajnaj, kiuj estas nur fajnaj, ne povas havi la paciencon necesan por malsupreniri ĝis en la unuaj principoj de la supozaj kaj imagaj aferoj, kiujn ili neniam vidis en la mondo, kaj kiuj estas tute eksterkutimaj.

Geometrio. Fajneco

571. La vera elokvento fajfas pri la elokvento. La vera moralo fajfas pri la moralo, t.e. la juĝa moralo fajfas pri la mensa moralo, kiu estas sen reguloj. Ĉar la juĝo estas tiu, al kiu apartenas la sento, kiel la sciencoj apartenas al la menso. La fajneco estas la parto de la juĝo, la geometrio estas tiu de la menso.

Fajfi pri la filozofio, tio estas vere filozofi.

572. La nutrado de la korpo estas iom-post-ioma. Pleneco de nutro kaj malmulte da substanco.

573. Kiam en parolado troviĝas vortoj ripetitaj, kaj, provante ilin korekti, oni trovas ilin tiel propraj, ke oni difektus la paroladon, endas ilin lasi, tio estas la signo. Kaj tio estas la parto de la envio, kiu estas blinda, kaj ne scias, ke tiu ripeto ne estas eraro en tiu loko ; ĉar ne ekzistas ĝenerala regulo.

.....

576. La ekstrema spirito estas akuzata pri frenezo, same kiel la ekstrema manko ; nenio estas bona krom la mezeco. Tion starigis la plimulto, kiu mordas kiun ajn eskapas de ĝi per kiu ajn ekstremo. Mi ne obstinos. Mi ja konsentas, ke oni min tien ^{metu}. Kaj mi rifuzas esti ĉe la malalta ekstremaĵo ; ne tial, ke ĝi estas malalta, sed tial ke ĝi estas ekstremaĵo ; ĉar mi same rifuzus, ke oni metu min ĉe la altan. Eliri el la mezo, tio estas eliri el la homaro.

La grandeco de la homa animo konsistas el scipovo sin teni tie (en la mezo) ; ne el eliro.

.....

583. Montenjo malpravas : la kutimo devas esti sekvata nur tial, ke ĝi estas kutimo, kaj ne tial, ke ĝi estas racia aŭ justa. Sed la popolo sekvas ĝin pro tiu sola motivo, ke ĝi kredas ĝin justa ; alie ĝi ne sekvus ĝin, kvankam ĝi estas kutimo ; ĉar oni volas esti devigata nur al racio aŭ al justo. Sen tio la kutimo estus rigardata kiel tiranaĵo ; sed la regado de la racio kaj de la justo ne estas pli tirana ol tiu de la frandado ; tio estas la principoj naturaj al la homo.

Do estus bone, ke oni obeu la leĝojn kaj kutimojn, tial ke ili estas leĝoj, ke oni sciu, ke ekzistas neniu vera kaj justa por enkonduki, ke en tio ni nenion konas ; kaj ke tial endas nur sekvi la akceptitajn ; per tiu rimedo oni neniam forlasus ilin. Sed la popolo ne estas kapabla pri tiu doktrino, kaj tial, ĉar ĝi kredas, ke la vero estas trovebla, kaj ke ĝi estas en la leĝoj kaj kutimoj, ĝi kredas ilin, kaj prenas ilian antikvecon kiel pruvon pri ilia vereco (kaj ne pri ilia sola aŭtoritato sen vereco). Tial ĝi obeas ilin, sed ĝi estas ema ribeli, tuj kiam oni montras al ĝi, ke ili neniom valoras ; kion oni povas montri pri ĉiuj, rigardante ilin de certa flanko.

584. Malbono estas facila, da ĝi estas infinito ; bono, preskaŭ unika.

Sed certa speco de malbono estas tiel malfacile trovebla kiel tio, kion oni nomas bono, kaj ofte laŭ tiu signo oni prezentas kiel bonon tiun apartan malbonon. Eĉ necesas eksterordinara grandeco por atingi al ĝi, same kiel al bono.

585. La ekzemploj, kiujn oni prenas por pruvi aliajn aferojn, se oni volus pruvi la ekzemplojn, oni prenas la aliajn aferojn, por ke tiuj ĉi estu iliaj ekzemploj. Ĉar, tial ke oni ĉiam kredas, ke la malfacilo kuŝas en tio, kion oni volas pruvi, oni trovas la ekzemplojn pli klaraj kaj pli helpaj por ĝin montri.

Tiel, kiam oni volas montri iun aferon ĝeneralan, necesas doni la apartan regulon de unu kazo ; sed, se oni volas montri iun apartan kazon, necesas komenci per la ĝenerala regulo. Ĉar ĉiam oni trovas malklara la aferon kiun oni volas pruvi, kaj klara tiun, kiun oni uzas por la pruvado ; ĉar, kiam oni proponas iun aferon pruvendan, oni unue sin plenigas per tiu imago, ke ĝi estas do malklara, kaj male, ke tiu, kiu devas pruvi ĝin estas klara : kaj tiel oni facile ĝin komprenas.

586. Mi troviĝis maloportune pro tiaj komplimentoj : "Mi havigis al vi multe da peno" ; "Mi timas enuigi vin" ; "Mi timas, ke tio estos tro longa".

Aŭ oni fortrenas, aŭ oni incitas.

587. Kiel malfacile estas proponi ion al la juĝo de aliulo sen aliigi lian juĝkapablon per la maniero ĝin proponi ! Se oni diras : "Mi trovas ĝin bela, mi trovas ĝin malklara", aŭ io alia simila, oni trenas la imagon al tiu juĝo, aŭ male oni ĝin incitas. Prefere nenion diri, kaj tiam li juĝas laŭ tio, kio li estas, t.e. laŭ tio, kio li estas tiam, kaj laŭ tio, kion la aliaj cirkonstancoj, kies aŭtoro oni ne estas, estos metintaj en ĝin. Sed almenaŭ oni nenion metis ; krom efiko ankaŭ de tiu silento, laŭ la formo kaj interpreto, kiun donas al ĝi lia humoro, aŭ laŭ lia konjekto pri la movoj kaj mieno de la vizaĝo, aŭ pri la tono de la voĉo, laŭ la mezuro, en kiu li estas fiziognomikisto, tiom malfacile estas ne demeti juĝon de ĝia natura sidejo, aŭ pliĝuste, tiel malmultaj juĝoj estas firmaj kaj stabilaj !

588. Tuta nia rezonado reduktiĝas al cedo al sento. Sed la fantazio estas simila kaj kontraŭa al la sento ; tiel ke oni ne povas distingi inter tiuj interkontraŭoj ; unu diras, ke mia sento estas fantazio ; alia, ke mia fantazio estas sento. Necesus havi regulon. La racio sin proponas, sed ĝi estas fleksebla al ĉiuj direktoj. Kaj tiel ne ekzistas regulo.
589. La aferoj, kiuj plej tenas nin, kiel kaŝi sian malmulton da bieno, ofte estas preskaŭ nenio ; ĝi estas nenio, kiun nia imago dikigas kiel monton ; alia formo de imago igas nin senpene ĝin malkovri.
590. Mi skribos tie ĉi miajn pensojn senorde, sed ne en konfuzo senintenca. Tio estas la vera ordo, kiu ĉiam markos sian objekton per la malordo mem. Mi farus tro da honoro al mia temo, se mi traktus ĝin laŭ ordo, ĉar mi volas montri, ke ĝi estas nekapabla pri ordo.
591. Oni imagas Platonon kaj Aristotelon nur kun grandaj roboj de pedantoj. Ili estis honestaj homoj*, kaj, kiel la aliaj, ridantaj kun siaj amikoj kaj, kiam ili distriĝis verkante siajn Leĝojn kaj siajn Politikojn, ili faris tion ludante ; tio estis la parto malplej filozofia kaj malplej serioza el ilia vivo. La plej filozofia estis vivi simple kaj trankvile. Se ili verkis pri politiko, tio estis kvazaŭ por reguli hospitalon de frenezuloj. Kaj se ili ŝajnis paroli pri ĝi kiel pri granda afero, tio estas tial, ke ili sciis, ke la frenezuloj, al kiuj ili parolas, opinias esti reĝoj kaj imperiestroj. Ili eniras en iliajn principojn por moderigi la frenezon al la ebla malplej granda malbono.
592. Tiuj, kiuj juĝas pri iu verko sen regulo, estas rilate al aliaj kiel tiuj, kiuj havas horloĝon** rilate al aliaj. Unu diras : "pasis du horoj". La alia diras : "pasis nur tri kvaronoj da horo". Mi rigardas mian horloĝon, kaj mi diras al unu : "Vi enuas", kaj al la alia : "la tempo ne ŝajnas al vi longdaŭra" ĉar pasis unu horo kaj duono. Kaj mi mokas tiujn, kiuj diras, ke la tempo daŭras al mi, kaj ke mi juĝas laŭ mia fantazio. Ili se scias, ke mi juĝas laŭ mia horloĝo.

* honestaj homoj en la senco de la XVIIa jarcento, t.e. homoj kun kulturo kaj bonaj manieroj. ** Devus esti : kiuj ne havas horloĝon, kaj tiel korektas la plimultaj el la eldonistoj. Sed ĝi estas parolturno sufiĉe kutima ĉe Paskalo, kaj la sekvo permesas restarigi la ordon de la penso. N. de la tr.

593. Ekzistas malvirtoj, kiuj tenas ĉe ni nur per aliaj, kaj se oni forigas la trunkon, ili estas forportataj kiel branĉoj.

.....

595. Kiam la malico havas la racion siaflanke, ĝi fieriĝas, kaj etendas la racion en ĝia tuta brilo.

Kiam la asketeco aŭ la severa elekto ne sukcesis atingi veran bonon, kaj necesas reveni al sekvado de la naturo, tiu ĉi fariĝas fiero pro tiu reveno al ĝi.

.....

597. Estas diferenco universala kaj esenca inter la agoj de la volo kaj ĉiuj aliaj.

La volo estas unu el la ĉefaj organoj de la fidoj ; ne tial, ke ĝi kreas la fidon, sed tial ke la aferoj estas veraj aŭ malveraj laŭ la faco, kie oni ilin rigardas. La volo, al kiu plaĉas unu pli ol alia, deturnas la spiriton de la konsidero pri la ecoj de tiuj, kiujn ĝi ne amas vidi ; kaj tial la spirito, marŝanta sampaŝe kun la volo, haltas ĉe la rigardo al la faco, kiun ĝi amas ; kaj tiel ĝi juĝas laŭ tio, kion vidas la volo.

598. Ĉiuj bonaj maksimumoj estas en la naturo ; mankas nur ilin apliki. Por ekzemplo, oni ne dubas, ke endanĝerigi sian vivon por defendi la publikan bonon, kaj pluraj tion faras ; sed por la religio, ne.

Necesas, ke estu neegaleco inter la homoj, tio estas vera ; sed, kiam tio estas konsentita, jen la pordo estas malfermita, ne nur al plej alta supereco, sed al plej alta tiraneco. Estas necese iom malstreĉi la spiriton ; sed tio malfermas la pordon al plej grandaj diboĉoj.

Oni marku la limojn. Ne estas limŝtonoj en la aferoj - la leĝoj volas iujn meti - kaj la spirito ne povas tion elporti.

599. Naturo diversigas - kaj imitas. Arto imitas - kaj diversigas. Hazardo donas la pensojn, kaj hazardo ilin deprenas ; nenia arto por konservi nek por akiri.

Penso eskapinta. Mi volis ĝin skribi ; mi skribas, dum ĝi estas de mi eskapinta.

.....

608. "Lustravit lampade terras"*. La vetero kaj mia humoro havas inter si malmulte da ligo. Mi havas miajn nebulojn kaj mian belan veteron interne de mi. La bono kaj la malbono de miaj aferoj mem malmulte efikas. Iafoje mi penas de mi mem kontraŭ la fortunon ; la gloro dresi ĝin igas min gaje ĝin dresi ; dum iafoje mi paŭtas en la bona fortuneo.
609. Skribi kiel tiuj, kiuj tro profundigas la sciencojn. Kartezio.
610. La forto estas la reĝo de l' mondo, ne la opinio. Sed la opinio estas tiu, kiu uzas la forton. - Estas la forto, kiu faras la opinion. La moleco estas bela laŭ nia opinio. Kial ? Ĉar kiu volas danci sur ŝnuro**, tiu estos sola ; kaj mi faros kabalon pli fortan, el homoj, kiuj diros, ke tio ne estas bela.
611. Iuj bone parolas kaj malbone skribas. Tial ke la loko, la ĉeestantaro varmigas ilin kaj ĉerpas el ilia spirito plimulte ol ili trovas en ĝi sen tiu varmo.
.....
613. La lingvoj estas ĉifroj en kiuj, ne la literoj estas ŝanĝ- itaj per literoj, sed la vortoj per vortoj, tiel ke nekonata lingvo estas deĉifrebla.
614. La diverseco estas tiel ampleksa, ke ĉiuj voĉtonoj, ĉiuj manieroj marŝi, tusi, nazpurigi, terni... Oni distingas el la fruktoj la vinberojn, kaj inter ĉi tiuj la muskatojn, poste la Kondrian, poste la Desargan, kaj poste tiun grefton. Ĉu ĉio ? Ĉu iu vito iam produktis du samajn traŭbojn ? Kaj ĉu iu traŭbo havas du samajn berojn ? ktp. Mi neniam juĝis ekzakte same pri sama afero. Mi ne povas juĝi pri verko ĝin farante. Necesas ke, kiel la pentristoj, mi malproksimiĝu. - Sed ne tro. - Do kiome ? - Divenu !
615. Tiuj, kiuj faras antitezojn troigante la vortojn, faras kiel tiuj, kiuj faras falsajn fenestrojn por la simetrio. Ilia regulo ne estas paroli ĝuste, sed fari figurojn ĝustajn
.....

* Parto de verso de Cicero tradukita el la Odiseo, kiu signifas : Tia estas la helo, per kiu Jupitero lumas la mondon, kaj estas ankaŭ la humoroj de la homoj.

** Danci sur ŝnuro estas malfacile kaj danĝere. Ĉu mi devas danci sur ŝnuro ? (Epikteto)

617. Ili diras, ke la eklipsoj kaŭzas malfeliĉon, ĉar la malfeliĉoj estas ordinaraj, tiel okazas tiel ofte malfeliĉoj, ke ili ofte divenas, dum, se ili diras, ke eklipsoj anoncas feliĉon, ili ofte mensogus. Ili atribuas feliĉon nur al maloftaj ĉielaj renkontoj ; tiel ili malofte maltrafas diveni.
618. Ekzistas nur du specoj de homoj : unuj justaj, kiuj sin kredas pekuloj ; aliaj pekuloj, kiuj sin kredas justaj.
.....
632. Elokvento estas pentro pri la penso ; tiel, kiuj pentrinte ankoraŭ aldonas, tiuj faras pentraĵon anstataŭ portreton.
.....
633. Simetrio
En tio, kion oni vidas per unu ekvido.
Bazita sur tio, ke ne estas motivo por fari alie
Kaj bazita ankaŭ sur la figuro de la homo ;
De tio venas, ke oni volas la simetrian nur laŭlarĝe,
ne laŭalte kaj laŭprofunde.
634. Skaramuĉo*, kiu pensas nur pri unu afero.
la doktoro*, kiu parolas kvaronhoron post kiam li ĉion diris, tiel plena li estas de la deziro diri.
635. Ŝanĝi je figuro, pro mia malforto**.
636. Diveni : "la parto, kiun mi prenas en via malplezuro".
S-ro Kardinalo*** ne volis esti divenata.
"Mi havas la spiriton plenan de maltrankvilo" ; pli valoras : "Mi estas plena de maltrankvilo".
Elokvento, kiu persvadas per mildo, ne per neperforto ; kiel tirano, ne kiel reĝo.
637. Ekzistas certa modelo de agrablo kaj belo, kiu konsistas el certa rilato inter nia naturo, malforta aŭ forta, tia kia ĝi estas, kaj la afero, kiu plaĉas al ni.
Ĉio formita laŭ tiu modelo estas al ni agrabla : ĉu domo,
.....

* Personoj de la itala "Commedia dell'Arte"

** Strebi al diverseco estas signo de malforto.

*** Ĉu Richelieu, ĉu Mazarino ? Sed tio validas pri ĉiu ŝtathomo.

kanzono, parolado, verso, prozo, virino, birdoj, riveroj, arboj, ĉambroj, vestoj, kc.

Ĉio ne farita laŭ tiu modelo malplaĉas al tiuj, kiuj havas la guston bona.

Kaj, ĉar estas perfekta rilato inter kanzono kaj domo faritaj laŭ tiu bona modelo, ĉar ili similas al tiu unika modelo, kvankam ĉiu laŭ sia genro, sama estas perfekta rilato inter la aferoj faritaj laŭ malbona modelo. Ne tial, ke malbona modelo estus unika, ĉar da ili ekzistas infinito ; sed ĉiu malbona soneto, ekzemple, laŭ kiu ajn falsa modelo ĝi estas farita, perfekte similas al virino vestita laŭ tiu modelo.

Nenio pli bone komprenigas, kiom ridinda estas falsa soneto, ol konsideri ĝian naturon kaj ĝian modelon, kaj poste imagi virinon aŭ domon faritan laŭ tiu modelo.

Poezia belo

Kiel oni diras poezia belo, tiel same oni devus ankaŭ diri geometria belo aŭ medicina belo, sed tion oni ne diras. Kaj la kaŭzo estas, ke oni bone scias, kiu estas la objekto de geometrio, kaj ke ĝi konsistas el pruvo, kaj kiu estas la objekto de medicino, kaj ke ĝi konsistas el resanigo ; sed oni ne scias, kio estas tiu natura modelo, kiun oni devas imiti ; kaj, manke je tiu scio, oni inventis certajn strangajn terminojn : "ora jarcento" "mirindaĵo de nia epoko", "fatala", kc., kaj tiun ĵargonon oni nomas "poezia belo".

Sed kiu imagos virinon laŭ tiu modelo, kiu konsistas el dirado de malgrandaj aferoj per grandaj vortoj, tiu vidos beletan ĝentilulinon tute kovritan de speguloj kaj ĉenoj ; pri kiu li ridos, ĉar oni pli bone scias, el kio konsistas la agrablo de virino ol la agrablo de versoj. Sed kiuj ne kompetentus, tiuj admirus ŝin en tiu ornamaĵo, kaj estas multe da vilaĝoj, en kiuj oni prenas ŝin por la reĝinon ; kaj tial ni nomas reĝinoj de vilaĝoj la sonetojn faritajn laŭ tiu modelo.

Oni ne estas rigardata kiel kompetenta pri versoj, se oni ne metis la ŝildon de poeto, de matematikisto, ktp. Sed la homoj universalaj ne volas ian ŝildon, kaj ne metas multe da diferenco inter la metio de poeto kaj tiu de brodisto.

La homoj universalaj estas nomataj nek poetoj nek geometroj, kc. ; sed ili estas ĉio ĉi, kaj juĝantoj pri ĉiuj tiuj. Oni ne divenas pri ili ; kaj ili parolos pri tio, kion

oni preparolis, kiam ili eniris ; en ili oni ne ekvidas unu kvaliton pli ol unu alian, ekster la neceso ĝin ekuzi ; sed tiam oni memoras pri ĝi, ĉar estas egale konforme al tiu karaktero, ke oni ne diras pri ili, ke ili bone parolas, kiam ne temas pri lingvaĵo, kaj ke oni diras pri ili, ke ili bone parolas, kiam temas pri tio.

Estas do falsa laŭdo, kiun oni donas al homo, kiam oni diras pri li ĉe lia eniro, ke li estas tre lerta pri poezio ; kaj estas malbona marko, kiam oni ne sin turnas al homo, se temas juĝi pri kelkaj versoj.

.....

Grandeco, mizero

Du naturoj

669. Ĉiuj iliaj principoj estas veraj : de la pironanoj, de la stoikuloj, de la ateistoj, kc. Sed iliaj konkludoj estas falsaj, ĉar ankaŭ la malaj principoj estas veraj.

670. Videble la homo estas farita por pensi ; tio estas tuta lia digno kaj tuta lia merito ; kaj tuta lia devo, kiu estas pensi, kiel decas. Nu, la ordo de la penso estas komenci per si, kaj per sia aŭtoro kaj sia fincelo.

Nu, pri kio pensas la mondo ? Neniam pri tio ; sed danci, ludi liuton, kanti, fari versojn, ktp - batali, fari sin reĝo, sen pensi pri kion signifas esti reĝo kaj esti homo.

671. Milito en la homo inter la racio kaj la pasioj.

Se li havus nur la racion sen pasioj.

Se li havus nur la pasiojn sen la racio.

Sed, havante unu kaj aliajn, li ne povas esti sen milito, ne povante havi pacon kun unu sen havi militon kun la alia ; tial li ĉiam estas dividita, kaj kontraŭa al si mem.

Enuo

672. Nenio estas pli neelportebla al la homo ol esti en plena ripozo, sen pasioj, sen aferoj, sen malenuigo, sen aplikado. Li tiam sentas sian neniecon, sian forlasitecon, sian dependecon, sian senpotencon, sian vakuon. Tuj eliros el la fundo de lia animo la enuo, la nigro, la malĝojo, la ĉagreno, la spitiĝo, la malespero.

673. Se estas supernatura blindeco vivi sen serĉi, kio oni estas, estas terura blindeco vivi malbone, kredante pri Dio.

Maljusto

674. Ke la tromemfido estas kunigita kun la neceso, tio estas ekstrema maljusto.

Serĉado pri la vera bono

675. La ordinaraj homoj metas la bonon en la fortunon, kaj en la eksterajn bienojn, aŭ almenaŭ en la malenuigon. La filozofoj montris la vantecon de ĉio ĉi, kaj metis ĝin, kien li povis.

676. La vanteco estas tiel ankrita en la koro de la homo, ke soldato, lakeo, kuiristo, portisto fanfaronas, kaj volas havi admirantojn. Kaj eĉ la filozofoj. Kaj tiuj, kiuj skribas kontraŭe, volas havi la gloron esti bone skribintaj. Kaj tiuj, kiuj ilin legas, volas havi la gloron esti legitaj. Kaj mi, kiu tion ĉi skribas, eble havas tiun deziron. Kaj eble tiuj, kiuj ĝin legos...

Pri la deziro esti estimata de tiuj, kun kiuj oni estas.

677. La orgojlo tenas nin per posedo tiel natura, meze de niaj mizeroj, eraroj, ktp... Ni eĉ perdas la vivon kun ĝojo, se nur oni parolos pri tio.

Vanteco : ludo, ĉaso, vizitoj, komedioj, falsa daŭrado de la nomo...

678. Tiu duobleco de la homo estas tiel videbla, ke iuj opiniis, ke ni havas du animojn. Simpla subjekto ŝajnis al ili nekapabla pri tiaj kaj tiel subitaj varioj de senmezura memfido al horora korfalo.

679. La naturo de la homo estas tute natura, "omne animal"*.

Estas nenio, kion oni ne igas natura ; estas nenio natura, kion oni ne perdigas.

680. Estas bone esti lacigita per la neutila serĉado pri la vera bono, por etendi la brakojn al la liberigonto.

681. La sentemo de la homo pri malgrandaj aferoj kaj lia nesentemo pri plej grandaj aferoj : marko de stranga renverso.

* Predikanto : Ĉiu animalo amas sian similulon, same ankaŭ la homo amas sian proksimulon.

682. Malgraŭ la vido de niaj mizeroj, kiuj nin tuŝas, kiuj nin tenas je la gorgo, ni havas instinkton, kiun ni ne povas subpremi, kiu nin altigas.

683. La afero plej grava por la tuta vivo estas la elekto de metio ; pri ĝi decidis la hazardo.

La kutimo faras la masonistojn, la soldatojn, la tegmentistojn. "Li estas bonega tegmentisto", oni diras, kaj, parolante pri soldatoj : "ili estas tre frenezaj", oni diras. Kaj aliaj, male : "nenio estas pli granda ol la milito ; la cetero el la homoj estas friponoj". Tiom, en sia juneco, oni aŭdis laŭdi tiujn metiojn kaj malŝati ĉiujn aliajn, ke oni elektas ilin, - ĉar nature oni amas la virton, kaj malamas la frenezon. Tiuj vortoj nin emocias. Oni pekas nur en la aplikado.

Tiel granda estas la formo de la kutimo, ke el tiuj, kiujn la naturo faris nur homoj, oni faras ĉiujn situaciojn de la homoj.

Ĉar iuj landoj konsistas tute el masonistoj, aliaj tute el soldatoj, ktp. Sendube la naturo ne estas tiel unuforma. Do tion faras la kutimo ; ĉar ĝi trudas la naturon. Kaj iafaje la naturo superas, kaj retenas la homon en lia instinkto, malgraŭ ĉia kutimo, bone aŭ malbone.

684. Oni amas vidi la eraron, la pasion de Kleobulina*, tial ke ŝi ne konas ĝin. Ŝi malplaĉas, se ŝi ne estus erarinta.

685. "Princo" al reĝo plaĉas, tial ke ĝi malpliigas lian kvaliton**.

686. "Estingi la flamon de la ribelo" : tro bombaste.

"La maltrankvilo de lia genio" : tro, du vortoj emfazaj.

687. Kiam oni fartas bone, oni miras, kiel oni povus konduki, se oni estus malsana ; kiam oni tia estas, oni gaje prenas medicinaĵojn : la malsano al tio klinas. Oni ne havas plu la pasiojn kaj la dezirojn pri malenligo, kiujn havigis la sano, kaj kiuj estas neakordigeblaj kun la necesoj de la malsano. La naturo tiam donas pasiojn kaj dezirojn konformajn al la tiama stato. Nur la timoj, kiujn ni, ne la naturo, donas al ni mem, kon-

* Princino, poste reĝino de Korinto en la romano de F-ino de Skuderi, "La Granda Ciro". Ŝi estis enamiĝinta al unu el siaj regatoj, sed ne konscia pri tiu amo. Ŝi estis tiel longe en tiu eraro, ke kiam ŝi fine ekkonsciis pri ĝi, ŝi jam ne povis reagi. ** La monduma gentileco, aŭ, kiel oni tiam diris, la "honesteco" volis, ke oni ne paradu pri sia titolo.

fuzas nin, tial ke ili aldonas al la stato, en kiu ni estas, la pasiojn de la stato, en kiu ni ne estas.

688. Ĉar la naturo igas nin malfeliĉaj en ĉiuj statoj, niaj deziroj figuras al ni feliĉan staton, ĉar ili aldonas al la stato, en kiu ni estas, la plezuron de la stato, en kiu ni ne estas ; kaj, se eĉ ni atingus tiujn plezurojn, ni ne estus pro tio feliĉaj, tial ke ni havus aliajn dezir-ojn konformajn al tiu nova stato.

Necesas apartigi tiun ĉi ĝeneralan propozicion

(Tie ĉi, en la unua manuskripto, estis la teksto poste lokita en la unua parto, n^o 32)

689. Tiuj, kiuj en malagrablaj aferoj havas ĉiam bonan esperon, kaj ĝojas pri feliĉaj aventuroj, se ili ne egale afliktiĝas pro la malbonaj, estas suspektataj esti tre kontentaj pro la perdo de la afero, kaj ravitaj trovi tiujn pretekstojn de espero por montri, ke ili interesiĝas en tio, kaj kovri per la ĝojo, kiun ili ŝajnigas, tiun, kiun ili havas vidi la aferon perdita.

690. Nia naturo estas en la movado ; la plena ripozo estas la morto.

.....

692. La belaj agoj kaŝitaj estas la plej estimindaj. Kiam mi vidas kelkajn el ili en la historio, kiel en p. 184*, ili tre plaĉas al mi. Sed fine ili ne estis tute kaŝitaj, ĉar ili estas sciitaj ; kaj kvankam oni faris, kion oni povis por ilin kaŝi, tiu malmulto, per kiu ili aperis, ĉion difektas ; ĉar plej bele estas, ke oni volis ilin kaŝi.

.....

694. Justo estas tio, kio estas establita : kaj tial ĉiuj niaj leĝoj establitaj estas rigardataj kiel justaj sen ekzameno ĉar ili estas establitaj.

Sento

695. Memoro, ĝojo estas sentoj, kaj eĉ la geometriaj propozicioj fariĝas sentoj ; ĉar la racio igas la sentojn naturaj kaj la naturaj sentoj svenas per la racio.

Honestulo **

696. Necesas ke oni ne povu diri pri li : "li estas matematik-

* Versajne en tiu paĝo de la Eseoĵ de Montenjo, eldono de 1652.

** Honestulo en la senco, kiun havis tiu vorto en la XVIIa jarcento : t.e. homo, kiu havas konojn pri ĉio, tamen ne estante fakulo en tio.

isto" nek "predikisto" nek "elokventa", sed : "li estas honestulo".

Nur tiu universala kvalito plaĉas al mi.

Kiam, vidante homon, oni memoras pri lia libro, tio estas malbona signo. Mi volus, ke oni vidu iun kvaliton nur per la renkonto kaj la okazo uzi ĝin. "Ne quid nimis"* , time, ke unu kvalito superu, kaj nomigu laŭ ĝi ; oni ne pensu, ke li bone parolas, krom kiam temas pri bona parolo ; sed tiam oni pensu pri ĝi.

.....

699. Ĉu vi neniam vidis homojn, kiuj, por plendi, ke vi ne sufiĉe atentis pri ili, etendas la ekzemplon de altrangaj personoj, kiuj estimas ilin ? Mi respondus al ili : "Montru al mi la meriton, per kiu vi ĉarmis tiujn personojn, kaj mi same vin estimos."

700. La memoro estas necesa por ĉiuj operacioj de la racio.

701. Kiam natura parolado pentras pasion aŭ efikon, oni trovas en si mem la verecon de tio, kion oni aŭdas, pri kiu oni ne sciis, ke ĝi tie estas, tiel ke oni emas ami tiun, kiu igas nin senti ĝin ; ĉar li ne montris al ni sian bienon, sed nian, kaj tiel tiu bonfaro igas lin aminda de ni, krom tio, ke tiu komuneco de inteligento necese inkliligas la koron lin ami.

.....

704. La paroladoj pri humileco estas objektoj de orgojlo al la gloramaj, kaj de humilo al la humilaj. Tiel tiuj de la pironismo estas objektoj de aserto al la asertemaj. Malmulte parolas humile pri humilo, malmultaj ĉaste pri ĉasto ; malmultaj pri la pironismo dubante. Ni estas nur mensogo, duobleco, kontraŭeco, kaj ni kaŝas kaj maskas nin al ni mem.

705. Dum mi skribas mian penson, ĝi iafoje eskapas de mi ; sed tio memorigas min pri mia malforto, kiun mi en ĉiu horo forgesas ; kio instruas min tiom, kiom mia forgesita penso, ĉar mi emas nur koni mian neniecon.

706. Kompati al malfeliĉuloj ne estas kontraŭ la deziro. Male ; oni estas tre kontenta fari tiun ateston pri amikeco, kaj tiri al si la reputacion pri kormildo, sen ion doni.

.....

* Nenio troa. Greka sentenco adoptita de la Latinuoj.

Konversacio

708. Ĉu necesas mortigi por malhelpi, ke estu maliculoj ?
Tio estas fari du anstataŭ unu. "Vince in bono malum"*
(Sta Aŭgusteno).

Spongia solis**

709. Kiam ni vidas efikon okazi ĉiam same, ni konkludas
pri natura neceso, kiel ke morgaŭ estos taglumo, ktp.
Sed ofte la Naturo nin kontraŭdiras, kaj ne trudas sin
al siaj propraj reguloj.

.....

712. La naturo rekomencas ĉiam la samajn aferojn : la
jarojn, la tagojn, la horojn, la spacojn, same ; kaj la
nombroj estas apudapude, sekve unu de alia. Tiel far-
iĝas speco de infinito kaj eterno. Ne tial, ke io el ĉio
ĉi estus infinita kaj eterna ; sed tiuj finitaj estaĵoj
senfine multobliĝas. Tiel, al mi ŝajnas, nur la nombro
- kiu ilin multobligas - estas infinita.

713. La homo estas propre "omne animal" (Vd. 679).

714. La imperio bazita sur opinio kaj imago regas kelkan
tempon, kaj tiu regado estas milda kaj bonvola ; tiu
de la forto regas ĉiam. Tiel la opinio estas la reĝo de l'
mondo, sed la forto estas ĝia tirano.

.....

Elokvento

716. Necesas agrablo kaj realo ; sed necesas, ke tiu agrablo
estu ĉerpita el vero.

717. Ĉiu estas tuto al si mem ; ĉar, kiam li estas mortinta,
ĉio estas morta por li. Kaj de tio venas, ke ĉiu kredas
esti ĉio por ĉiuj. Endas juĝi la Naturon ne laŭ ni, sed
laŭ ĝi.

718. En ĉiu dialogo aŭ parolado oni povu diri al tiuj, kiuj sin
sentas per ĝi ofenditaj : "Pro kio vi plendas ?"

719. Diristo de spritvortoj - malbona karaktero.

720. Ĉu vi volas, ke oni kredu bonon pri vi ? Ne diru
(bonon pri vi mem)

* Venku malbonon per bono.

** Temas eble pri fosforeska ŝtono (ŝtono de Bolonjo), eltrovita en 1604,
kiu ne eligas varmon, kio skuegas la "kutimon".

721. Ni rigardas la aferojn ne nur de aliaj flankoj, sed ankaŭ per aliaj okuloj : ni ne povas trovi ilin samaj.
722. Li ne amas plu tiun personon, kiun li amis antaŭ dek jaroj. Mi ja komprenas ; ŝi ne estas plu la sama, nek ankaŭ li. Li estis juna, kaj ankaŭ ŝi. Eble li ankoraŭ amus ŝin tia, kia ŝi tiam estis.
723. Ni ne tenas nin en virto per nia propra forto, sed per la kontraŭpezo de du interkontraŭaj malvirtoj - kiel ni restas stare inter du interkontraŭaj ventoj. Forprenu unu el tiuj malvirtoj, ni falos en la alian.

Stilo

724. Kiam oni vidas la stilon naturan, oni estas tute miranta kaj ravita ; ĉar oni atendis vidi aŭtoron kaj oni trovas homon ; dum tiuj, kies gusto estas bona, vidante libron, kredas trovi homon, estas tute mirigitaj trovi aŭtoron. "Plus poetice quam humane locutus es"*
Tiuj bone honoras la naturon, kiuj instruas al ĝi, ke ĝi povas paroli pri ĉio, eĉ pri teologio.

725. Necesas, ke la mondo estu tre blinda, se ĝi kredas vin**.

726. La Papo malamas kaj limas la scienculojn, kiuj ne submetis sin al li per sindediĉo.

727. La homo estas nek anĝelo nek besto. Malfeliĉe, kiu volas fariĝi*** anĝelo fariĝas besto.

.....

Ordo

733. La naturo metis ĉiujn siajn virtojn ĉiun en ĝin mem. Nia arto enmetas unujn en aliajn ; sed tio ne estas natura : ĉiu tenas sian lokon.

Gloro

734. La bestoj ne admiras unu la alian. Ĉevalo ne admiras sian kunulon ; ne tial, ke ne estus inter ili vetbatalo en kurado, sed tio estas senkonsekvenca ; ĉar, estante en la stalo, la plej peza kaj malbelforma ne cedas sian avenon al la alia, kiel la homoj volas, ke oni faru al ili. Ilia virto kontentigas per si mem.

* Petrono : Ci parolis poete pli ol home.

** La Jezuitojn

*** aŭ : imiti anĝelon, aŭ : ŝajnigi sin anĝelo.

735. Kiam oni diras, ke la varmo estas nur la movo de kelkaj globetoj, kaj la lumo la "conatus recedendi"*, kiun ni sentas, tio mirigas nin. Kiel ? La plezuro estus nenio alia ol la baletoj de "spiritoj"**. Tiel malsaman ideon ni konceptis pri ĝi kaj tiuj sentoj ŝajnas al ni tiel malproksimaj de tiuj aliaj, kiujn ni diras samaj kiel tiuj, kun kiuj ni ilin komparas ! La sento pri la fajro, kiu nin trafas en tute alia maniero ol la tuŝosento, la ricevo de la sono kaj de la lumo, ĉio ĉi ŝajnas al ni mistera, kaj tamen tio estas kruda kiel ŝtonbato. Estas ja vere, ke la malgrandeco de la spiritoj, kiuj eniras en la porojn tuŝas aliajn nervojn, sed estas ĉiam tuŝitaj nervoj.

736. Mi pasigis longan tempon en la studado de abstraktaj sciencoj ; kaj la malmulto de komuniko, kiun oni povas ricevi de ili, naŭzis min. Kiam mi komencis la studadon pri la homo, mi vidis, ke tiuj abstraktaj sciencoj ne estas propraj al la homo, kaj ke mi pli erarvadis ekster mia kondiĉaro, en ilin penetrante, ol aliaj ilin nesciante ; mi pardonis al aliaj, ke ili malmulton scias pri ili. Sed mi kredis almenaŭ trovi multe da kompanoj en la studado pri la homo, kaj ke tio estas la vera studo al li propra ; fakte estas ankoraŭ malpli multaj, kiuj ĝin studas ol geometrion. Nur pro manko je scipopovon oni serĉas la ceteron. Sed ĉu ne tial, ke tio ankoraŭ ne estas la scienco, kiun devas havi la homo ? kaj ke al li estas plibone nescii pri si por esti feliĉa ?

Kio estas la "Mio" ?

737. Homo, kiu sin metis ĉe la fenestron por vidi la pasantojn, se mi tie pasas, ĉu mi povas diri, ke li sin metis tien por vidi min ? Ne, ĉar li ne pensas pri mi aparte. Sed tiu, kiu amas iun pro ŝia beleco, ĉu li amas ŝin ? Ne, ĉar la variolo, kiu mortigos la belecon sen mortigi la personon, kaŭzos, ke li ne plu amos ŝin.

Kaj se oni amas min pro mia juĝkapablo, pro mia memoro, ĉu "min" oni amas ? Ne, ĉar mi povas perdi kvaliton sen perdi min mem. Kio do estas tiu "mi", kiu estas nek en la korpo nek en la animo ? Kaj kiel ami la

* Kartezio (Principoj de filozofio) tiel difinas la "forton, kiu animas ĉiujn korpojn runde moviĝantajn por malproksimiĝi de la korpoj, ĉirkaŭ kiuj ili moviĝas" (1644).

** Kartezio tiel nomas "partojn de la sango tre subtilajn, kiuj tre rapide moviĝas" (Traktato pri Pasioj, 1-a parto, 1649)

korpon aŭ la animon, krom pro tiuj kvalitoj, kiuj ne estas tio, kio faras la "mion", ĉar ili estas pereemaj ? Ĉar ĉu oni amas la substancon de la animo de persono abstrakte, kaj kiaj ajn estus la kvalitoj en ĝi ? Tio ne eblas, kaj estus maljusta. Do oni neniam amas personon sed nur ĝiajn kvalitojn.

Oni do ne moku plu tiujn, kiuj volas esti honorataj pro funkciaj ŝarĝoj kaj oficoj ; ĉar oni amas iun nur pro pruntitaj kvalitoj.

738. Ne en Montenjo, sed en mi, mi trovas ĉion, kion mi vidas en li(a verko).
-

Ordo

745. Oni ne diru al mi, ke mi diris nenion novan : la aranĝo de la materioj estas nova. Kiam oni pilkludas, per sama pilko ludas unu kaj la alia ; sed unu lokas ĝin plibone.

Mi tiom ŝatus, se oni dirus, ke mi uzis malnovajn vortojn. Kvazaŭ la samaj pensoj ne formus alian korpon de parolado per diferenca aranĝo - tiel same, kiel samaj vortoj formas aliajn pensojn per diferenca aranĝo !

746. Kiuj estas en malreguleco, tiuj diras al tiuj, kiuj estas en la ordo, ke tiuj ĉi malproksimiĝas de la naturo, kaj ili kredas mem sekvi ĝin. Samkiel tiuj, kiuj estas sur ŝipo, kredas, ke tiuj, kiuj staras sur la bordo foriĝas. La lingvaĵo estas ĉiuflanke sama. Por juĝi pri ĝi necesas havi fiksan punkton. La haveno juĝas tiujn, kiuj estas sur ŝipo. Sed kie ni prenos punkton en moralo ?

Naturo sin imitas

747. La naturo sin imitas ; grajno ĵetita en bonan teron produktas ; principo ĵetita en bonan menson produktas. La nombroj imitas la spacon, kiu estas de diferenca naturo.

Ĉio estas farita kaj kondukata de sama mastro : la radiko, la branĉoj, la fruktoj ; la principoj, la konsekvencoj.

748. Kiam ĉio moviĝas - egale - nenio moviĝas - ŝajne kiel en ŝipo. Kiam ĉiuj iras al diboĉo, neniu ŝajnas tien iri. Tiu, kiu haltas, rimarkigas la forportiĝon de la aliaj, - kiel fiksa punkto.
-

750. Kiam oni volas utile admoni, kaj montri al aliu, ke li eraras, necesas observi, de kiu flanko li rigardas la aferon, ĉar ordinare ĝi estas de tiu flanko vera, kaj konfesi al li tiun verecon, sed malkovri al li la flankon, de kiu ĝi estas malvera. Li kontentiĝas per tio, ĉar li vidas, ke li ne eraris, kaj ke al li mankis nur vidi ĉiujn flankojn ; ĉar oni ne spitiĝas, ke oni ne ĉion vidis, sed oni ne volas esti erarinta. Kaj eble ĉio ĉi venas de tio, ke nature la homo ne povas ĉion vidi, kaj nature li ne povas erari pri la flanko, kiun li rigardas : kiel la kaptoj de la sensoj estas ĉiam veraj.

.....

758. Ni tiel malbone nin konas, ke pluraj opinias esti baldaŭ mortontaj, dum ili fartas bone, kaj pluraj opinias esti bonfartaj, dum ili estas proksimaj al morto, ne sentante la baldaŭan febron aŭ la absceson pretan formiĝi.

759. Necesas ne deturni la spiriton aliloken, krom por mallacigi ĝin, sed en la tempo, en kiu tio estas konvena: ĝin mallacigi kiam necese, kaj ne alie ; ĉar kiu mallacigas eksterterpe, tiu lacigas, kaj kiu lacigas eksterterpe, tiu mallacigas, ĉar tiam oni ĉion lasas. Tiom la malico de la deziro propraplaĉe faras la malon de tio, kion oni volas ricevi de ni sen doni al ni plezuron, kiu estas la mono, por kiu ni donas ĉion, kion oni deziras.

Forto

760. Kial oni sekvas la plimulton ? Ĉu tial, ke ĝi havas pli da prudento ? Ne, sed pli da forto.

Kial oni sekvas la malnovajn leĝojn kaj malnovajn opiniojn ? Ĉu ili estas pli sanaj ? Ne, sed ili estas unikaj, kaj deprenas de ni la radikon de la diverseco.

761. Iu persono iam diris al mi, ke li havas grandan ĝojon elirante el konfeso. Alia diris, ke li restas en timo. Mi pensis pri tio, ke el tiuj du oni farus unu bonan, kaj ke al ĉiu mankas, ke li ne havas la senton de la alia. Ofte same okazas en aliaj aferoj.

.....

764. Ĉefa talento, kiu regas ĉiujn aliajn.
765. Timi la morton ekster la danĝero, kaj ne en la danĝero
- ĉar oni devas esti homo.
766. La riveroj estas vojoj marŝantaj, kaj portantaj onin,
kien oni volas iri.
.....
769. Moralo kaj lingvo estas sciencoj specialaj, sed univer-
salaj.
.....
771. Vane la Eklezio kreis tiujn vortojn : anatemo, herezo,
kc. : oni uzas ilin kontraŭ ĝin.
.....

Du infinitoj, mezo.

774. Kiam oni legas tro rapide aŭ tro malrapide, oni nenion
komprenas.
775. Kion povas la virto de homo, tion oni devas mezuri ne
laŭ liaj penoj, sed laŭ lia kutima agado.
.....
780. Ĉiuj falsaj belaĵoj, kiujn ni mallaŭdas en Cicero, havas
admirantojn, kaj en granda nombro.
.....
783. Al tiuj homoj mankas koro. Oni ne farus el ili siajn
amikojn. Poeto, kaj ne honestulo*.
.....

784.
De kio venas, ke oni kredas tiom da mensoguloj,
kiuj diras, ke ili vidis miraklojn, kaj ke oni kredas neniun
el tiuj, kiuj diras, ke ili havas sekretojn por igi la homon
senmorta aŭ por rejunigi ?

785. Konsiderinte, de kio venas, ke oni kredas tiom da men-
soguloj, kiuj diras, ke ili havas kuracilojn, ĝis ofte meti
sian vivon en iliajn manojn, ŝajnis al mi, ke la vera
motivo estas, ke ekzistas veraj ; ĉar ne estus eble, ke
ekzistu tiom da falsaj, kaj ke oni tiom fidu ilin, se ne
ekzistus veraj. Se neniam estus rimedo al iu malsano,
kaj ĉiuj malsanoj estus nekuraceblaj, estus neeble, ke la

* en la senco de la XVIIa jarcento : homo kun kulturo kaj bonaj manieroj.

homoj estus imagintaj, ke ili povus doni (kuracilojn), kaj ankoraŭ pli, ke tiom da aliaj estus fidintaj al tiuj, kiuj fanfaronis tiajn havi : same kiel, se iu homo pretendus malhelpi morti, neniu lin kredus, ĉar estas neniu ekzemplo pri tio. Sed, ĉar ekzistis kvanto da kuracrimedoj, kiuj troviĝis veraj, - laŭ la kono mem de plej grandaj homoj - la kredemo de la homoj fleksiĝis al tio ; kaj, ĉar tio estas konita kiel ebla, oni de tio konkludis, ke tio estas. Ĉar la popolo ordinare rezonas tiel : "Io estas ebla, do ĝi estas". Ĉar la afero ne povas esti ne-ata ĝenerale, pro tio ke ekzistas iuj apartaj efikoj, kiuj estas veraj, la popolo, kiu ne povas distingigi, kiuj el tiuj apartaj efikoj estas la veraj, kredas pri ili ĉiuj. - Same, kio faras, ke oni kredas tiom da falsaj efikoj de la luno, tio estas, ke ekzistas veraj, kiel la tajdo de la maro.

.....

786. Konsiderinte, de kie venas, ke estas tiom da falsaj mirakloj, da falsaj revelacioj, sorĉoj, ktp., ŝajnis al mi, ke la vera kaŭzo estas, ke ekzistas veraj ; ĉar ne estus eble, ke estu tiom da falsaj mirakloj, se ne ekzistus veraj, nek tiom da falsaj revelacioj, se ne ekzistus veraj, nek tiom da falsaj religioj, se ne ekzistus unu vera. Ĉar, se neniam estus ekzistinta el ĉio ĉi, estus kvazaŭ neeble, ke la homoj estus imagintaj, kaj ankoraŭ pli neeble, ke tiom da aliaj kredus. Sed, ĉar estis tre grandaj aferoj veraj, kaj ke tial ili estis kredataj de grandaj homoj, tiu impresio estis kaŭzo, ke preskaŭ ĉiuj fariĝis kapablaj kredi ankaŭ la falsajn. Kaj tial, anstataŭ konkludi, ke ne ekzistas veraj mirakloj, ĉar estas tiom da falsaj, - konvenas diri - male, ke ekzistas veraj mirakloj, tial ke estas tiom da falsaj, kaj ke ekzistas falsaj pro tiu sola kaŭzo, ke ekzistas veraj, kaj same, ke ekzistas falsaj religioj nur tial, ke ekzistas unu vera.

Objeto al tio : ke la sovaĝuloj havas religion ; sed tio estas tial, ke ili aŭdis pri la vera, kiel vidigas per la kruco de Sta Andreo, la diluvo, la cirkumcido, ktp. Tio venas de tio, ke la homa menso, troviĝante fleksita al tiu flanko per la vero, troviĝas pro tio inklina al ĉiuj falsoj*...

* Tiu paragrafo estas tipa ekzemplo de la rezonmaniero de Paskalo. Postulato : la kristana religio estas la vera. N. de la tr.

787. Kiam oni estas kutimiĝinta uzadi malbonajn rezonojn por pruvi la efikojn de la naturo, oni jam ne volas akcepti la bonajn, kiam ili estas eltrovitaj. La ekzemplo, kiun oni donis, estis pri la sangocirkulado, por klarigi, kial la vejno ŝveliĝas sub la streĉligilo.

788. Oni ordinare sin persvadas plibone per la rezonoj, kiujn oni mem eltrovis, ol per tiuj, kiuj venis en la menson de aliaj.

.....

792. La aritmetika maŝino* faras efikojn, kiuj proksimiĝas al la penso pli ol ĉio, kion faras la animaloj ; sed ĝi faras nenion, kiu povus dirigi, ke ĝi havas volon kiel la animaloj.

793. Kvankam iuj personoj ne havas intereson de tio, kion ili diras, oni ne konkludu absolute, ke ili ne mensogas ; ĉar ekzistas homoj, kiuj mensogas simple nur por mensogi.

.....

795. Kiam oni ne scias la veron pri iu afero, estas bone, ke ekzistu komuna eraro, kiu fiksas la spiriton de la homoj ; kiel, ekzemple, la luno, al kiu oni atribuas la ŝanĝon de la sezonoj, la progreson de la malsanoj, kc. ; ĉar la ĉefa malsano de la homo estas la malkvieta scivolemo pri la aferoj, kiujn li ne povas scii ; kaj al li estas malpli malbone esti en eraro, ol en tiu neutila scivol-emo.

La verkmaniero de Epikteto, de Montenjo kaj de Salomon de Tultie**, estas la plej uzata, kiu plej bone enŝoviĝas, kiu plej restas en la memoro, kaj kiu farig-
as plej citata, tial ke ĝi estas tute konsistanta el pensoj naskitaj de la ordinaraj interparoloj de la vivo ; kiel, kiam oni parolos pri la komuna eraro estanta en la mondo, ke la luno estas kaŭzo de ĉio, oni ne preterlasos diri, ke Salomon de Tultie diras, ke "kiam oni ne scias la veron pri iu afero, estas bone, ke estu komuna eraro...ktp., - kio estas la ĉi-supra penso.

.....

* komputmaŝino inventita kaj konstruita de Paskalo, la unua, praulo de la modernaj komputiloj.

** Anagramo de Louis de Montalte, kaj pseŭdonomo, sub kiu Paskalo intencis publikigi sian Apologion.

800. La tuta indo de la homo estas en la penso. Sed kio estas tiu penso ? - Kiel stulta ĝi estas !
La penso estas - do - afero admirinda kaj senkompara pro sia naturo. Necesis, ke ĝi havu strangajn difektojn por esti malŝatinda ; sed ĝi havas tiajn, ke nenio estas pli ridinda. Kiel granda ĝi estas pro sia naturo ! Kiel malalta ĝi estas pro siaj difektoj !

La forfluado

807. Estas horora afero senti forfluadi ĉion, kion oni posedas.
.....

809. Penso. Faras la grandecon de la homo.
.....

811. Ĉiuj grandaj distraĵoj estas danĝeraj por la kristana vivo, sed inter ĉiuj, kiujn inventis la mondo, neniu estas pli timinda ol la komedio. Ĝi estas prezento tiel materia kaj tiel delikata de la pasioj, ke ĝi ekmovas kaj naskas ilin en nia koro, kaj precipe tiun de amo ; pleje, kiam oni prezentas ilin tre ĉastaj kaj tre honestaj. Ĉar ju pli senpeka ĝi aspektas al senpekaj animoj, des pli tuŝeblaj de ĝi ili estas ; ĝia forto plaĉas al nia memamo, kiu tuj formas deziron kaŭzi la samajn efikojn, kiujn oni vidas tiel bone prezentitaj ; kaj samtempe oni faras al si konscion bazitan sur la honesteco de la sentoj, kiujn oni vidas en ĝi, kiu deprenas la timon de la puraj animoj, kiuj imagas, ke tio ne vundas la purecon, ami per amo, kiu ŝajnas al ili tiel senpeka. Tiel oni foriras de la komedio kun koro tute tiel pleningita de ĉiuj belaĵoj kaj dolĉaĵoj de amo, ke oni estas tute preparita por ricevi ĝiajn unuajn impresojn, aŭ pliĝuste, por serĉi okazon naski ĝin en la koro de iu, por ricevi la samajn plezurojn kaj la samajn oferojn, kiujn oni vidis tiel bone pripentritaj en la komedio.

812. Se la fulmo falus sur malaltajn lokojn, ktp., al poetoj kaj al tiuj, kiuj scias rezoni nur pri aferoj de tia naturo, mankus pruvoj.
.....

815. La racio ordonas al ni multe pli trude ol mastro ; ĉar malobeante al unu oni estas malfeliĉa, kaj malobeante al la alia oni estas stulta.
.....

817. La ekzemplo de la ĉasteco de Aleksandro ne faros tiom da abstinenculoj, ol kiom tiu de lia drinkemo faris da malsobruĵoj.

Oni ne hontas, se oni ne estas tiel virta kiel li, kaj ŝajnas ekskuzeble ne esti pli malvirta ol li. Oni kredas ne esti tute en la malvirtoj de la ordinaraj homoj, kiam oni sin vidas en la malvirtoj de tiuj grandaj homoj. Kaj tamen oni ne atentis pri tio, ke en tio ili apartenas al la komuna homaro. Oni sin tenas ĉe ili je la ekstremaĵo, je kiu ili sin tenas ĉe la popolo ; ĉar, kiel ajn altaj ili estas, tamen ili estas unuigitaj kun la malplej grandaj el la homoj per iu parto. Ili ne estas pendantaj en la aero, tute abstraktitaj disde nia socio...ne, ne. Se ili estas pli grandaj ol ni, estas tial, ke ili havas la kapon pli alta ; sed ili havas la piedojn tiel malaltaj kiel niaj ; ili ĉiuj estas ĉe la sama nivelo, kaj sin apogas sur la sama tero ; kaj per tiu ekstremaĵo ili estas tiel malaltaj kiel ni, kiel la plej malgrandaj, kiel la infanoj, kiel la bestoj.

818. Daŭra elokvento enuigas.

La princoj kaj la reĝoj iafoje ludas ; ili ne ĉiam sidas sur sia trono ; ili tie enuas. La grandeco bezonas esti lasita por esti sentata. La daŭrado naŭzas en ĉio. La malvarmo estas agrabla por sin varmigi.

La naturo agas laŭ grada progresado itus et reditus* ; ĝi pasas kaj revenas, kaj iras pli antaŭen poste duone malpli, poste pli ol iam, ktp.

La tajdo de la maro tiel fariĝas. La suno ŝajnas tiel marŝi :



"Vi estas malafabla. Ekskuzu min, mi petas". Sen tiu ekskuzo mi ne estus ekvidinta, ke estis insulto.

"Respekte parolante". Nenio estas pli malbona ol ilia pardonpeto.

819. Al ni plaĉas la batalo, sed ne la venko. Oni amas vidi batalon inter animaloj, sed ne la venkinton en pasia kruelego kontraŭ la venkito. Kion oni volis vidi, krom la fino de la venko ? Kaj, tuj kiam ĝi venas, oni estas de ĝi satigita. Tiel same en ludo ; tiel same en la serĉado pri vero. Oni amas vidi en la disputoj la batalon de la opinioj, sed kontempli la trovitan veron, tute ne.

* = ĝi iras kaj reiras

Por plezure rimarkigi ĝin, necesas vidigi ĝin naskita de la disputo. Same, en la pasioj, estas plezure vidi du kontraŭajn interbatalantojn ; sed kiam unu eksuperas, estas plu nur brutaleco.

Ni neniam serĉas la aferojn, sed la serĉadon pri la aferoj.

Tiel same en la komedioj, la scenoj kontentecaj - sen timo - neniom valoras, ankaŭ la ekstremaj mizeroj sen espero, ankaŭ la brutalaj amoj, ankaŭ la akraj severaĵoj.

.....

824. Oni ne instruas al la homoj esti honestaj homoj, kaj oni instruas al ili ĉion ceteran ; kaj ili neniam pretendas scii ion pri tiu cetero, kiom esti honestaj homoj. Ili pretendas scii nur la solan aferon, kiun ili ne lernas.

825. La infanoj timiĝantaj pri la vizaĝo, kiun ili desegnaĉis, estas infanoj ; sed per kiu rimedo tio, kio estas tiel malforta en la infaneco, estus tre forta en la matura aĝo ! Oni nur ŝanĝis je fantazio.

Ĉio, kio perfektigas per grada progreso, ankaŭ pereas per grada progreso. Ĉio, kio estis malforta, neniam povos esti absolute forta. Oni vane diras : "Li estas kreskinta, li estas ŝanĝita." : li estas ankaŭ la sama.

.....

827. La teleskopoj kaj mikroskopoj malkovras al ni kiom da estaĵoj, kiuj ne ekzistis por la antaŭtempaj filozofoj ! Oni sentime kontraŭdiris la Sanktan Skribon pri la granda nombro da steloj, dirante : "Estas nur mil dudek du, tion ni scias." "Sur la tero estas herboj, ni vidas ilin". De la luno oni ne vidus ilin. "Kaj sur tiuj herboj estas haroj, kaj en tiuj haroj etaj animaloj ; sed post tio, nenio plu." Ho vi tromemfidaj ! "La miksaĵoj konsistas el elementoj, kaj la elementoj ne." Ho tromemfidaj ! Jen estas delikataĵo. "Oni ne diru tion, kion oni ne vidas." - Necesas ja diri kiel la aliaj, sed ne pensi kiel ili.

828. Kiam oni volas peli la virtojn ĝis ekstremo, de unu kaj alia flanko, sin prezentas malvirtoj, kiuj nesentible enŝoviĝas en iliajn nesentemajn vojojn flanke de la malgranda infinito ; kaj sin prezentas amase malvirtoj flanke de la granda infinito. Tiel ke oni perdiĝas en la malvirtoj, kaj oni ne vidas plu la virtojn.

829. Vortoj diverse aranĝitaj faras diversajn sencojn, kaj sencoj diverse aranĝitaj faras diversajn efikojn.

.....

834. La sencoj.

Sama senco ŝanĝiĝas laŭ la vortoj, kiuj ĝin esprimas. La sencoj ricevas de la vortoj sian dignon, anstataŭ doni ĝin al ili.

Necesas serĉi ekzemplojn pri tio.

.....

839. Terno absorbas ĉiujn funkciojn de la animo, same kiel la koito, sed oni ne tiras el ĝi la samajn konsekvencojn kontraŭ la grandeco de la homo, tial ke ĝi estas kontraŭvola ; tio ne estas cele al la afero mem, tio estas por alia celo, - kaj tiel, tio ne estas marko de la malforto de la homo, kaj de lia servuteco sub tiu ago. Ne estas honte al la homo fali sub la doloro, kaj estas honte fali sub la plezuro. Kio ne venas de tio, ke la doloro venas al ni de aliloke, kaj ke ni serĉas la plezuron ; ĉar oni povas serĉi la doloron kaj fali sub ĝi - intence - sen tiu speco de malnoblo.

De kie do venas, ke estas gloro al la prudento fali sub la forto de la doloro, kaj ke estas honte fali sub la forto de la plezuro ? Estas tial, ke ne la doloro tentas kaj logas nin ; estas ni mem, kiuj propravoле ĝin serĉas, kaj volas superigi ĝin super ni ; tiel ke ni estas mastroj de la afero ; kaj en tio estas la homo, kiu falas sub si mem ; sed en la plezuro estas la homo, kiu falas sub la plezuro. - Nu, nur la mastreco kaj la regeco faras la gloron, kaj la servuteco faras la honton.

.....

846. La tempo kuracas la dolorojn kaj la kverelojn, tiel ke oni ŝanĝiĝas ; oni ne estas plu la sama persono ; nek la ofendinto nek la ofendito estas plu la samaj. Estas kiel popolo, kiun oni incitis, kaj kiun oni revidus post du generacioj : ili estas ankoraŭ la Francoj, sed ne la samaj.

847. Se ni songus ĉiunokte la saman aferon, ĝi trafus nin tiom, kiom la objektoj, kiujn ni ĉiutage vidas. Kaj se iu metiisto estus certa songi ĉiunokte dum dek du horoj ke li estas reĝo, mi kredas, ke li estus tiel feliĉa kiel reĝo, kiu ĉiunokte dum dek du horoj songus, ke li estas metiisto.

Se ni sonĝus ĉiunokte, ke ni estas pelataj de malamikoj, kaj agitataj de penigaj fantomoj, kaj oni pasigus ĉiujn tagojn en diversaj okupoj, kiel kiam oni faras vojaĝon - oni suferus preskaŭ tiom, kiom se tio estus reala, - kaj oni antaŭtimus dormi samkiel oni antaŭtimas la vekigon, kiam oni efektive timas eniri en tiaj malfeliĉojn - kaj ja ili kaŭzas proksimume la samajn malbonojn, kiel la realo.

Sed tial ke la sonĝoj estas ĉiuj diferencaj, kaj ke unu mem diversiĝas, tio, kion oni vidas en ĝi trafas multe malpli ol tio, kion oni vidas maldormante, pro la daŭreco ; kiu tamen ne estas tiel daŭra kaj egala, ke ĝi ne ankaŭ ŝanĝiĝus, sed malpli abrupte, krom malofte, kiel en vojaĝo ; - kaj tiam oni diras : "Al mi ŝajnas, ke mi sonĝas." Ĉar la vivo estas sonĝo, iom malpli malkonstanta.

.....

849. Sciante la ĉefan pasion de ĉiu, oni estas certa plaĉi al li ; kaj tamen ĉiu homo havas siajn fantaziojn kontraŭajn al sia propra bono, en la ideo mem, kiun li havas pri la bono ; kaj tio estas strangaĵo, kiu metas onin ekster gamo.

850. Ni ne kontentiĝas per la vivo, kiun ni havas en ni kaj en nia propra esto ; ni volas vivi en la ideo de la aliaj per imagita vivo, kaj por tio ni penas iel aspekti, ni senĉese baraktas por plibeligi kaj konservi nian imagan eston, kaj neglektas la veran. Kaj se ni havas aŭ la trankvilecon aŭ la grandanimecon aŭ la fidelecon, ni impetas tion sciigi, por ligi tiujn virtojn al nia alia esto ; kaj ni prefere deligus ilin de ni por ilin doni al la alia. Ni volonte estus timemaj por akiri la famon esti brava. Granda marko de la nenieco de nia esto, ne esti kontenta de unu sen la alia, kaj ofte ŝanĝi unu kontraŭ la alia ! Ĉar kiu ne mortus por konservi sian honoron, tiu estus malnoblega.

.....

857. Neniam oni faras malbonon tiel plene kaj gaje, ol kiam oni faras ĝin per konscienco.

858. Samkiel oni difektas sian menson, oni difektas ankaŭ sian senton.

Oni formas sian menson kaj sian senton per konversacioj.

oni difektas sian menson kaj sian senton per konversacioj. Tiel la bonaj aŭ la malbonaj formas aŭ difektas ilin. Do entute gravas scii bone elekti la konversaciojn por formi kaj ne difekti la menson kaj la senton; kaj oni ne povas fari tiun elekton, se oni ne havas ilin formitaj kaj ne difektitaj. Tiel, tio faras cirklon, el kiu feliĉaj estas tiuj, kiuj eliras.

.....

865. Necesas ne miskoni sin ; - ni estas aŭtomato tiom kiom menso. Kaj de tio venas, ke la instrumento, per kiu fariĝas la persvado, ne estas la - sola - demonstro. Kiom malmulte da aferoj estas demonstritaj ! La pruvoj konvinkas nur la menson ; - la kutimo faras niajn pruvojn plej fortajn kaj plej kredatajn ; - ĝi klinas la aŭtomaton, kiu kuntrenas la menson, sen ke tiu ĉi pensu pri tio. Kiu demonstris, ke morgaŭ estos taglumo, kaj ke ni mortos ? Kaj kio estas pli kredata ? Estas do la kutimo, kiu nin persvadas pri tio. Estas ĝi, kiu faras tiom da kristanoj ; estas ĝi, kiu faras la Turkojn, la paganojn, la metiojn, la soldatojn, kc. La kristanoj havas la kredon ricevitan en la bapto plian ol la paganoj. - Fine ni devas voki al ĝi, kiam la menso unufoje vidis, kie estas la vero, por trinki kaj tinkturi nin per tiu vero, kiu en ĉiu horo eskapas de ni ; ĉar havi ĉiam pri ĝi la pruvojn ĉeestantaj, estas troe. Necesas akiri kredon pli facilan, kiu estas tiu de la kutimo, kiu, senperforte, senarte, senargumente, igas nin kredi pri la aferoj, kaj klinas ĉiujn niajn povojn al tiu kredo, por ke nia animo falu nature en ĝin*. Kiam oni kredas nur per la forto de la konvinko, kaj la aŭtomato estas inklina kredi la malon, ne estas sufiĉe. Do necesas kredigi niajn du partojn ; la menson, per la raciaj motivoj, kiujn sufiĉas esti vidinta unu fojon en sia vivo; kaj la aŭtomaton, per la kutimo, ne permesante al ĝi kliniĝi al la malo.

"Inclina cor meum, Deus!"**

La racio agas malrapide kaj kun tiom da rigardoj al tiom da principoj, kiuj devas esti ĉiam ĉeestantaj, ke en ĉiu horo ĝi endormetiĝas aŭ erarvagas, pro manko havi ĉiujn siajn principojn ĉeestantaj. La sento ne tiel

* Konsilo de Paskalo por akiri la kredon : "flekxi la aŭtomaton", kutimiĝi al la gestoj de la kredo. Ĉu tio ne estas la recepto de ĉiu religio ?
N. de la tr. ** "Klinu mian koron, Dio!"

agas ; ĝi agas en unu momento, kaj ĉiam estas preta por agi. Necesas do meti nian fidon en la senton ; alie ĝi estos ĉiam ŝanceliĝanta.

Historioj de Ĉinio

866. Mi kredas nur la historiojn, kies atestantoj lasus sin buĉi. Ne temas vidi tion pogrande : mi diras al vi, ke en tio estas por blindigi kaj por lumigi. Per tiu sola vorto mi ruinigas ĉiujn viajn rezonojn. - "Sed Ĉinio - mallumigas" vi diras ; - kaj mi respondas : "Ĉinio - mallumigas, sed estas trovenda lumo ; serĉu ĝin." Tiel ĉio, kion vi diras, faras por unu el la intencoj, kaj ne kontraŭ la alia. Tiel, tio servas, kaj ne malutilas. Do necesas vidi tion podetale ; neceso meti paperojn sur tablon.

867. Heredanto, kiu trovas aktojn pri sia domo. Ĉu li diros : "Eble ili estas falsaj ?" kaj neglektos ilin ekzameni ?

871. La ŝnuroj, kiuj ligas la respekton de unuj al aliaj, ĝenerale estas ŝnuroj de neceso ; ĉar necesas, ke ekzistu diversaj gradoj - ĉiuj homoj volas superi, kaj ne ĉiuj povas, sed povas nur kelkaj. Sendube ili interbatalos, ĝis la pli forta partio subpremos la pli malfortan, kaj ke fine estos superanta partio. Sed, kiam tio estas unufoje determinita, tiam la mastroj, kiuj ne volas, ke la milito plu daŭru, ordonas, ke la forto, kiu estas en iliaj manoj, estu sekvata laŭ ilia plaĉo : unuj per la elekto de la popoloj, aliaj per la naskiĝa heredo, ktp.

Kaj tie komencas la imago ludi sian rolon ; ĝis tie la pura forto tion faris. Tie ĉi, estas la forto, kiu per la imago sin tenas en iu partio : en Francio, nobeloj ; en Svisio nenobeloj, ktp.

Nu, tiuj ŝnuroj, kiuj ligas la respekton al tiu aŭ alia persone, estas ŝnuroj de imago.

872. Tiuj grandaj penoj de menso, en kiujn la animo iafaje eniras, estas aferoj, en kiuj ĝi ne sin tenas ; ĝi iafaje nur saltas sur ilin, ne kiel sur tronon, por ĉiam, sed por momento nur.

III PENSOJ PRI LA MIRAKLOJ

889. Montrante la veron, oni kredigas pri ĝi ; sed montrante la maljustecon de la mastroj, oni ne korektas ĝin ; oni firmigas la konsciencon, montrante la falsecon ; oni ne certigas la salajron, montrante la maljuston*.

909. Kiun motivon ili havas por diri, ke oni ne povas reviviĝi ? kio estas pli malfacila, ĉu naskiĝi aŭ renaskiĝi ? ke tio, kio neniam estis, estu, aŭ ke tio, kio estis, estu ankoraŭ ? Ĉu estas pli malfacile veni en eston, ol tie resti ? La kutimo faras al ni unu facila, la manko je kutimo faras la alian neebla : popola maniero juĝi ! Kial virgino ne povas naski ? Ĉu kokino ne faras ovojn sen virkoko ? Kio distingas ilin ekstere disde la aliaj ? kaj kiu diris al ni, ke kokino ne povas formi en ili semon tiel bone kiel la virkoko ?

910. Estas tioma misproporcio inter la merito, kiun li kredas havi, kaj lia stulteco, ke oni ne povus kredi, ke li tiel forte eraras.

916. Neniu diras "kortegano", krom tiuj, kiuj ne estas tiaj, "pedanto", krom pedanto, "provincano", krom provincano, kaj mi vetus, ke estas la presisto, kiu ĝin metis kiel titolon al la "Leteroj al provincano".

917. Ĉiuj okupoj de la homoj estas por havi bienon ; kaj ili havas nek rajton por ĝin posedi juste nek forton por ĝin posedi sekure. Same la scienco, la plezuroj. Ni havas nek la veron nek la bonon.

Pironismo

931. Ĉio estas parte vera, parte falsa. La esenca vero ne estas tia ; ĝi estas tute pura kaj tute vera. Tiu mikso ĝin malhonoras kaj neniigas. Nenio estas pure vera, kaj tiel nenio estas vera, tion komprenante pri la pura vero. Oni diros, ke estas vere, ke la hommortigo estas malbona. - Jes, ĉar ni bone konas la malbonon kaj la mal-

* Temas pri la salajro de servistoj, kaj ilia rajto pagi sin mem, kiam iliaj mastroj estas maljustaj. Tion pritraktis Paskalo en la 12a letero al Provincano.

veron. Sed pri kio oni diras, ke ĝi estas bona ? Ĉu la ĉasteco ? - Mi diras ne ; ĉar la mondo (la homaro) finiĝus. - Ĉu la geedziĝo ? - Ne, la seksabstino pli valoras. - Ne mortigi ? - Ne ; ĉar la malordoj estus aĉegaj, kaj la maliculoj mortigus ĉiujn bonajn. - Mortigi ? - Ne ; ĉar tio detruas la naturon.

Ni havas nek veron nek bonon krom nur parte, kaj miksitita kun malbono kaj malvero.

Probableco

932. Ili havas kelkajn principojn verajn ; sed ili trouzas ilin. Nu - la trouzo de veroj estas tiom puninda kiom la enkonduko de mensogoj.

935. Homoj sen parolfido, sen kredo, sen honoro, sen vero, duoblaj en koro, duoblaj en lango, kaj similaj, kiel estis al vi iam riproĉite, al tiu amfibia animalo - de la fabelo - kiu sin tenis en duba stato inter la fiŝoj kaj la birdoj*.

APENDICO I

937. S-ro de Roannez diris : "La motivoj venas al mi poste, sed unue la afero plaĉas al mi aŭ ŝokas min, sen ke mi scius la motivon, kaj tamen tio ne ŝokas tiun motivon, kiun mi trovas nur poste." Sed mi kredas, ne ke tio ŝokis pro tiuj motivoj, kiujn oni trovas poste, sed ke oni trovas tiujn motivojn nur tial, ke tio ŝokas.

938. Subita morto timenda, kaj tial la konfesprenantoj sidas ĉe la granduloj.

Pripensoj pri la memestimo kaj ĝiaj efikoj

940. La naturo de la memestimo kaj de tiu "mio" homa estas ami nur sin kaj konsideri nur sin. Sed kion li faros ? Li ne povus malhelpi, ke la objekto de li amata estas plena de difektoj kaj de mizero ; li volas esti granda, kaj li sin vidas malgranda ; li volas esti feliĉa, kaj li sin vidas mizera ; li volas esti perfekta, kaj li sin vidas plena de malperfektaĵoj ; li volas esti objekto de la amo kaj de la estimo de la homoj, kaj li vidas, ke

* temas pri la jezuitoj.

liaj difektoj meritas nur ilian malamon kaj ilian malŝaton. Tiu embaraso, en kiu li troviĝas, produktas en li la plej maljustan kaj kriman pasion imageblan ; ĉar li kovas mortigan malamon kontraŭ tiu vero, kiu lin admonas, kaj lin konvinkas pri liaj difektoj. Li dezirus ĝin neniigi, kaj ne povantedetruĝi ĝin en ĝi mem, li ĝin detruas tiom, kiom li povas, en sia kono kaj en tiu de la aliaj ; t.e., ke li metas sian tutan zorgon por kovri siajn difektojn al aliaj kaj al si mem kaj ke li ne povas akcepti, ke oni vidigu ilin al li, nek ke oni vidu ilin.

Sendube estas malbone, esti plena de difektoj, sed estas ankoraŭ pli granda malbono, esti plena de ili kaj ne voli ilin rekoni, ĉar tio estas ankoraŭ aldoni tiun de propravola iluzio. Ni ne volas, ke aliaj trompu nin ; ni ne trovas juste, ke ili volu esti de ni estimataj, pli ol ili meritas ; do estas ankaŭ ne juste, ke ni trompu ilin, kaj ke ni volu, ke ili nin estimu, pli ol ni meritas. Tiel, kiam ili malkovras nur malperfektaĵojn kaj malvirtojn, kiujn ni ja havas, ili faras al ni neniun maljustaĵon, ĉar ne ili estas ties kaŭzo ; kaj ili faras al ni bonon, ĉar ili helpas nin por liberiĝo de malbono, kiu estas la nescio (aŭ la ignoro) pri tiuj malperfektaĵoj. Ni ne devas esti ĉagrenitaj, pro tio ke ili konas ilin, kaj ke ili malŝatas nin ; ĉar estas juste, ke ili konu nin tiaj kiaj ni estas, kaj ke ili malŝatu nin, se ni estas malŝatindaj.

Jen estas la sentoj, kiuj naskiĝus el koro, kiu estus plena de justeco. Kion do ni devas diri pri la nia, vidante en ĝi tute kontraŭan inklinon ? Ĉar ĉu ne estas vere, ke ni malamas la veron kaj tiujn, kiuj ĝin diras al ni, kaj ke ni amas, ke ili eraru por nia avantaĝo, kaj ke ni volas esti de ili estimataj aliaj, ol ni ja estas ? Jen estas pruvo, kiu kaŭzas al mi hororon. La katolika religio ne devigas malkovri siajn pekojn indifereinte al ĉiuj homoj ; ĝi permesas, ke oni restu kaŝita al ĉiuj aliaj ; sed ĝi esceptas unu solan, al kiu ĝi ordonas, ke oni malkovru la fundon de sia koro, kaj sin vidigu tia, kia oni estas. Nur tiun solan homon en la mondo ĝi ordonas, ke ni elerarigu, kaj ĝi devigas lin al neromp- ebla sekreto, kiu faras, ke tiu scio estas en li kvazaŭ ĝi ne estus. Ĉu oni povas imagi ion pli karitatan kaj pli mildan ? Tamen la putreco de la homo estas tia, ke li trovas ankoraŭ malmildon en tiu leĝo ; kaj tio estas

unu el la ĉefaj motivoj, kiuj ribeligis kontraŭ la Eklezion grandan parton de Eŭropo.

Kiel maljusta kaj malprudenta estas la koro de la homo, por trovi malbone, ke oni devigu lin fari kontraŭ unu homo tion, kion estus juste, iamaniere, ke li faru kontraŭ ĉiuj homoj ! Ĉar ĉu estas juste, ke ni trompu ilin ? Estas diversaj gradoj en tiu malamo al vero ; sed oni povas diri, ke ĝi estas en ĉiuj iagrade, ĉar ĝi estas nedisigebla de la memestimo. Estas tiu malbona delikateco, kiu devigas tiujn, kiuj estas en neceso admoni aliajn, elekti tiom da elturniĝoj kaj tiom da moderigoj por eviti ilin ŝoki. Necesas, ke ili ŝajnu ilin ekskuzi, ke ili miksu laŭdojn kaj atestojn pri amo kaj estimo. Malgraŭ ĉio ĉi, tiu kuracado tamen estas amara al la memestimo. Ĝi prenas da ĝi la eblan malplejon, kaj ĉiam kun naŭzo, kaj ofte eĉ kun sekreta spitiĝo kontraŭ tiuj, kiuj ĝin prezentas al ĝi.

Pro tio okazas, ke, se oni havas kelkan intereson esti de ni amata, oni evitas fari al ni servon, pri kiu oni scias, ke ĝi estus al ni malagrabla ; oni traktas nin tiel, kiel ni volas esti traktataj ; ni malamas la veron, oni ĝin kaŝas al ni ; ni volas esti flatataj, oni flatas nin ; ni amas esti trompataj, oni trompas nin.

Tio faras, ke ĉiu grado de bona fortune, kiu nin altigas en la mondo, pli malproksimigas nin de la vero, ĉar oni pli timas vundi tiujn, kies amo estas pli utila, kaj malamo pli danĝera. Princo estos la fablo de tuta Eŭropo, kaj li sola ne scios pri tio. Mi ne miras pri tio : diri veron estas utile al tiu, al kiu oni ĝin diras, sed malavantaĝe al tiuj, kiuj ĝin diras, ĉar ili sin malamigas. Nu, tiuj, kiuj vivas kun la princoj, pli amas siajn interesojn ol tiun de la princo, kiun ili servas ; kaj tial, ili ne riskas havigi al li avantaĝon, malutilante al si mem.

Tiu malfeliĉo estas sendube pli granda en la plej grandaj fortunoj ; sed la malpli grandaj ne estas je ĝi senaj, ĉar ĉiam estas ia intereso, sin amigi de la homoj. Tiel la homa vivo estas nur ĉiama iluzio ; oni nur sin intertrompas kaj interflatas. Neniu parolas pri ni en nia ĉeesto, kiel li parolas en nia foresto. La unio inter la homoj estas fondita sur universala trompado ; kaj multo da amikecoj pludaŭrus, se ĉiu scius, kion lia amiko diras pri li, kiam li ne ĉeestas, kvankam li tiam

parolas sincere kaj senpasie.

La homo do estas nur masko, mensogo kaj hipokrito, kaj en si mem kaj rilate al aliaj. Li ne volas, ke oni diru al li la veron ; li evitas diri ĝin al aliaj ; kaj ĉiuj ĉi emoj, tiel malproksimaj de justo kaj racio, havas naturan radikon en lia koro.

.....

942. Ni faris la unufirmecon de la diverseco, ĉar ni estas ĉiuj unufirmaj en tio, ke ni estas ĉiuj fariĝintaj unufirmaj.

.....

945. La lasta afero, kiun oni trovas, farante verkon, estas scii tiun, kiun necesas meti la unuan.

APENDICO II

Paroloj atribuitaj al Paskalo

.....

B. Iuj aŭtoroj, parolante pri siaj verkoj, diras : "Mia libro, mia komento, mia historio, ktp." Ili odoras kiel burĝo kiu posedas domon, kaj ĉiam havas unu "ĉe mi" en la buŝo. Ili plibone diras : "Nia libro, nia komento, nia historio, ktp.", tial ke ordinare estas en tio pli da alies havaĵo ol da ilia.

.....

E. Mortinta S-ro Paskalo, kiam li volis doni ekzemplon pri revaĵo, kiu povis esti aprobita per obstinemo, proponis ordinare la opinion de Kartezio pri la materio kaj pri la spaco.

.....

G. Ĉiuj falsaj belaĵoj, kiujn ni trovas en Sankta Aŭgusteno havas admirantojn, kaj en granda nombro.

H. Mortinta S-ro Paskalo nomis la kartezian filozofion la romano de la naturo, simila proksimume al la historio de Don Kifoto*.

* En pluraj lokoj Paskalo esprimis malfavorajn opiniojn pri Kartezio. Inter tiuj du samepokaj grandaj spiritoj, scienculoj kaj filozofoj, estis reciproka admiro kaj profunda malakordo.

EN LA SAMA SERIO :

- La Aperoj de Ahasvero (Han Riner)*
Argentina Novelaro
Bazoj de Anarkiismo (Balkanski)
Kiel diri...? (Lentaigne)
Elekto de tekstoj de Bakunin
Por ekologia socio (Murray Bookchin)
Etiko I (Kropotkin)
Tekstoj de Krishnamurti
Individuista Manlibreto (Han Riner)
Jaro 2000 (Henri Muller)
La Kvina Evangelio (Han Riner)
Kontraŭflue (Valo)
El la kara infaneco... (Valo)
Lingvaj anguloj (Baronnet)
La Mondo ne havas atendejon (Dekker)
Migrante tra metioj (Valo)
Memvola servuto (La Boétie)
Mia vivo. Artikolaro (Bartelmes)
Naciismo kaj Esperantismo (Aarse)
Naciismo (Lanti)
La nova paradigmo en psikologio (Feldman Gonzalez)
Proverbaro Franca/Esperanta (Bourgeois)
Esperanto kaj Literaturo (Laval)
Politika Neperforto (M.A.N.)
Sepdek jaroj sub la verda stelo (Valo)
Sveda Novelaro
Tiel diru! (Lentaigne)
La Turo de l'Popoloj (Han Riner)
Varsovio 1887 (Lopez Luna)
Ĉu ni vere helpas la trian mondon?(Roberts)
Veraj Interparoladoj de Sokrato (Han Riner)
El Verkoj de Lanti (3 volumoj)
El Verkoj de Leo Tolstoj

VENONTAJ ELDONAĴOJ :

- Filozofio Zoologia (Lamark)*
INTER-metodo (internacia E-kurslibro)

Presis : C. Baudé * Cercle espérantiste de l'Agenais
"Laùte!" * F. 47340 Laroque-Timbaud